


eLIBRO

Upton Sinclair

La gnomauto



INKO



Upton Sinclair
LA GNOMAŬTO
Tradukis Runo Stridell

eLIBRO
Arangis: Franko Luin

ISBN 91-7303-115-1
inko@omnibus.se
<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO
AŬGUSTO 2001

Unua ĉapitro

En kiu Elizabeto renkontas Bobon

Knabineto promenis en kalifornia arbaro. La arboj en tiu arbaro estas inter la plej grandaj en la mondo, kaj la knabineto neniam vidis ion similan. Ŝi plupaŝis tute mirigita kaj apenaŭ kredis al siaj okuloj.

Dum la aŭtoveturo oni parolis pri "la grandaj arboj", "la gigantaj sekvojoj". Sed la vortoj ne signifis multon al la knabino.

Ili veturis sur ŝoseo en klara printempa suno, turnante tien kaj reen en la montara tereno. Subite la sunlumo estis for, krepuskiĝis, kaj solena sensoneco regis, kaj ili troviĝis en arbaro, kiu konsistis el la plej grandaj el la vivantaj estaĵoj.

Ili haltis kaj eliris el la aŭto. Nun la knabineto hazarde estis sola inter la arboj. Panjo estus ĉion detruinta dirante: "Vi malpurigos viajn ŝuojn", aŭ "Povas esti sonserpentoj en la arbaro".

Ĉe la vojrandoj staris granda elkavita arbo. Interne estis restoracieto, kie oni povis sidi ĉe tablo kaj trinki glason da zingibra trinkaĵo aŭ soda akvo. — 'Kredu tion aŭ ne', informis ŝildo sur la arbo. Ekzistis bildkartoj pri ĝi, kaj la kunvojaĝanto de panjo, fraŭlino Jellifer, deziris sendi kelkajn al amikoj sur la orienta marbordo. Panjo helpis al ŝi elekti ilin, la ŝoforo aĉetis benzinon, kaj tiamaniere Elizabeto ricevis eblecon senĝene rondiri inter la interesaj arboj.

Malantaŭ ĉiu giganto estis alia pli mirinda, tiel ke oni es-

tis kvazaŭ tirata de nevideblaj magnetoj. Estis arboj tiel grandaj, ke necesis kvindek knabinoj por fari rondon ĉirkaŭ ilia piedo. La ŝelo estis grizbruna kaj havis profundajn fendojn. Ĝi aspektis tiel mola, ke oni pensis, ke estus eble kunpremi ĝin per la manoj, sed vere ĝi estis malmola kiel fero; la tero estis kovrita per dika, mola tapiŝo, kiu konsistis el defalaĵoj de la arboj dum jarmiloj. Ĉirkaŭ la ŝvelitaj bazoj de la arboj estis amasoj da delikata verdaĵo, lumigita de pala sunlumo, senviva sunlumo, kiu venis de longa distanco kaj preskaŭ perdis siajn fortojn. Super ĉio ripozis profunda foresto de sonoj, kiu apartenas al krepuskiĝo, al dimanĉo, al interno de katedralo — kun ĉiu soleneco, kiun oni povas al si imagi.

Elizabeto estis plena de miro pri ĉi tiu beleco. Malrapide kaj timplene ŝi daŭrigis, logita de unu stranga afero post la alia, forgesanta ĉion alian en la mondo. Ĉiuj arboj estis unikaj. Tiuj, kiuj kreskis pli longe for, aspektis pli altaj ol la proksimaj. Ŝi vivis en urbo kaj konis nur parkarbojn kaj plantitajn arbarojn. Subite ŝi estis en nova mondo, kiu renversis ĉiujn ŝiajn konceptojn.

Tial ŝi ne fariĝis speciale mirigita pri tio, kio poste okazis. Se la plej grandaj el ĉiuj vivantaj estaĵoj troviĝas en ĉi tiu arbaro, kial ne eblu ĉi tie trovi ankaŭ la plej malgrandajn? Ĉio estas ebla en loko, kie oni havas kontakton kun centmiljara historio, kaj kie la naturfortoj ĉiam povis libere agi.

Elizabeto trovis arbon kun granda funnigrigita truo rekte tra la trunko. La truo estis tiel granda, ke oni povus traveturi ĝin per la granda limuzino de panjo sen difekti la aŭton. Ŝi provis rigardi internen, sed estis tiel mallume, ke ŝi timiĝis, kaj anstataŭe ŝi rondiris la trunkon. Ĉe la alia flanko estis roko, super kiu kreskis arbo. La supro de la roko estis ornamita

per belaj kreskaĵoj — azaleoj kaj oksalidoj kaj filikoj. Kaj super ili ŝi ekvidis etan vizaĝon, kiu rigardis ŝin. La vizaĝo estis proksimume granda kiel pugno, se vi ne havas eksterordinare grandan pugnon. Ĝi povus bone aparteni al sciuro aŭ strigo aŭ ursido. Sed tiel ne estis — estis en ĉiuj rilatoj homa vizaĝo, nur ne rilate grandecon. Ĝi havis rondajn rozajn vangojn kaj malgrandajn bluajn okulojn, kaj sur la maizflava hararo tronis bruna ĉapo kun sunŝirmilo. Estis miriga vizaĝo, kaj Elizabeto subite haltis. Tie ili staris, ambaŭ rigardante unu la alian.

Finfine la vireto ekparolis:

”Mi ne timas vin,” li pepis.

”Ne, tion vi ne bezonas,” Elizabeto tuj diris.

La vireto serioze esploris ŝin, poste li klarigis:

”Vi aspektas tre afabla.”

”Panjo estas kutime sufiĉe kontenta pri mi,” Elizabeto diris.

La vireto denove okulesploris ŝin.

”Vi ne kutimas damaĝi diversajn objektojn, mi esperas?” li fine demandis.

”Ne vole aŭ konscie,” respondis Elizabeto.

”Sed ĉu vi kutimas falhaki arbojn?”

”Ho ne, mi fakte neniam faligis arbon.”

”Sed vi faros tion, kiam vi fariĝos pli aĝa?”

”Ne, ne, mi promesas. Tio ne konvenas al virino.”

La vireto aspektis kontenta.

”Kiel belan robon vi havas,” li poste diris. ”Kie oni ricevas tian?”

”Ĉi tiu venas de Marcel’s,” Elizabeto diris. ”Estas vendejo sur Kvina Avenuo,” ŝi aldonis, ”en Novjorko.”

La vireto skuis la kapon. "Mi loĝis ĉi tie en la arbaro dum mia tuta vivo. Mi estas tre senscia."

"Mi estas certa, ke vi povus rakonti multajn interesajn aferojn," Elizabeto diris kompleze.

"Mi volonte rakontos al vi ĉion, kion mi konas," diris la eta viro. "Se mi nur scius, ke estas taŭge de mi paroli kun vi," li aldonis senkviete.

"Kial tio ne estus taŭga?"

"Vi estas la unua grandulo, kun kiu mi parolis. Mi neniam havis eblecon paroli kun iu."

"Kiu malpermesas tion al vi?"

"Glogo."

"Kaj kiu estas Glogo?"

"Tio estas mia avo."

"Kaj kial vi ne rajtas paroli kun granduloj?"

"Li diras, ke ili ĉiuj estas murdistoj."

"Tio ne estas vera."

"Ili murdas la arbojn. Ili detruas la arbarojn, kaj tio signifas finon de ĉiu vivo."

Elizabeto pripensis dum momento.

"Se oni serioze pripensas la aferon, vi certe pravas," ŝi diris. "Sed vi devas kredi al mi, kiam mi diras, ke mi neniam damaĝis eĉ al la plej etan arbon. Kaj koncerne la grandajn arbojn, mi ne povus damaĝi al ili, eĉ se mi volus."

"Sed iom post iom vi fariĝos pli granda, ĉu ne estas tiel? Vi ne estas plenkreska homo. Kiom da jaroj vi havas?"

"Dek du jarojn."

"Estas strange pripensi tion, ke vi estas tiel granda, kvankam vi havas nur dekdu jarojn."

”Homoj diras, ke mi estas malgranda laŭ miaj jaroj. Kiom da jaroj vi havas?”

”Mi farigis centjara pasintsemajne.”

”Kaj tamen vi tute ne aspektas aĝa.”

”Glogo havas pli ol mil jarojn.”

”Ho, tiel mirinde! Li devas esti pli aĝa ol la arboj ĉi tie.”

”La arboj ekzistis ĉi tie antaŭ la tempo de la avo de Glogo. Neniu scias, kiom aĝaj ili estas.”

Elizabeto denove rigardis la arbojn. Ili vere estis tiom aĝaj, kiom ili aspektis. Ŝi lasis sian rigardon vagi supren al la gigantaj kolonoj, kiuj iom post iom ricevis ruĝetan koloron kie ili strebis alten, — supren, supren, al la plej alta pinto de la mondo. Ili sternis siajn branĉojn kaj arkaĵon da verdaĵo tiel alte, ke oni ne povis vidi el kio ĝi estis farita. Kaj oraj sunradioj dancis inter la ruĝo kaj verdo en la sorĉiga malbruo tie supre.

Ŝi lasis sian rigardon revagi malsupren al la grandega bazo, kiu portis videblajn spurojn post atakoj de fajro kaj fulmo, sed kion la naturo pacience riparis kaj ekipis per novaj ŝelapogiloj tridek centrimetrojn dikaj. Tute apude estis splitita arbostumpo, el kiu novaj arboj kreskis. Malantaŭ ĝi kuŝis falinta arbo, kiu certe kuŝis tie dum mil jaroj sen eĉ unu signo de humiĝo. Nur kelkaj filikoj kreskis laŭ la trunko.

”Ĉi tiu estas vere tre stranga arbaro,” Elizabeto diris, ”kaj estis tre interese vidi ĝin. Ĉu ĝenas vin rakonti, kio vi vere estas?”

”Avo diras, ke ni estas gnomoj.”

”Mi legis pri gnomoj, sed mi ne sciis, ke ili vere ekzistas.”

”Mi vere ekzistas,” diris la gnomo.

”Mi estas certa, ke vi estas tre afablaj kaj bonedukitaj estaĵoj. Ĉu vi estas multaj?”

”Laŭ mia scio ni estas nur du. Glogo kaj mi mem.”

”Ho, kia surprizo! Kio okazis al la aliaj?”

”Mi ne scias, kien ili malaperis. Glogo diras, ke la kaŭzo estas, ke homoj faligas la arbarojn.”

”Estas ja terure. Mi neniam pensis pri tio pli frue.”

”Glogo estas tre malgaja,” daŭrigis la gnomo. ”Li estas malgaja pro multaj aferoj kaj rifuzas rakonti al mi kial. Mi estas tre maltrankvila pro li. Kaj mi jam de longe pensis, ke mi devas demandi al iu grandulo pri konsilo. Ĉu vi kredas, ke vi povus helpi min?”

”Mi estas ja nur infano, vi komprenu, kaj mi ne scias multon,” klarigis Elizabeto. ”Sed mi helpos vin, kiom mi povas.”

”Ĉu vi iam aŭdis pri homo, kiu konstante sidas por si mem kaj malgaje fiksrigardas kaj rifuzas manĝi?”

”Jes certe,” Elizabeto diris. ”Estis same kun mia onklino Genevieve. Oni devis konsulti tre multajn kuracistojn pro ŝi. Tiel nomatajn specialistojn.”

”Kaj kion ili diris?”

”Ili nomis tion neŭrastenio.”

”Mi kredas, ke tiun vorton mi ne povos elparoli,” diris la gnomo.

”Estas kuracista kutimo,” Elizabeto diris. ”Ili kreas tiajn longajn vortojn por timigi nin.”

”Kion oni faris kun via onklino?”

”Tre multe — oni proponis banojn kaj masaĝon kaj elektran ŝokterapion kaj pilolojn, sed nenio helpis. Fine ili klarigis, ke ŝi bezonas ŝanĝi medion. Panjo diris, ke tio estis pro tio, ke la kuracistoj estis tro lacaj je ŝi.”

”Nu, ĉu ŝanĝo de medio helpis ŝin?”

”Tion mi ne scias. Ŝi estas en Eŭropo nun. Ŝi sendas jen kaj jen salutkartojn al ni.”

”Mi miras, ĉu mediŝanĝo povus helpi al Glogo. Ni estis en ĉiuj arbaroj en la ĉirkaŭaĵo.”

”Dum mil jaroj li certe jam koniĝis kun la arbaroj interne kaj ekstere, mi kredas. Eble li devus ŝanĝi sian dieton. Kion vi kutimas manĝi?”

”Ni vivtenas nin per semoj de filikoj.”

”Kaj kion vi trinkas?”

”Ni trinkas nektaron de la floroj.”

”Ĉu, kiel interese! Sonas vere agrable. Sed ĉu ne postulas longan tempon kolekti sufiĉe da filikaj semoj kaj nektaro?”

”Ni gnomoj havas multe da tempo.”

”Ne estas maleble, ke nova dieto povus helpi al Glogo. Estas ankaŭ eble, ke mediŝanĝo kaj novaj spertoj pri la mondo havus al li influon.”

”Kiel tio povus okazi?” demandis la gnomo maltrankvile. La amatoreca doktoro falis en pensojn.

”Mi havas onklon, kiu nomiĝas Rodney,” ŝi diris post momento. ”Ni veturas por viziti lin kaj lian patron — do mian avon — en granda urbo Seattle. Vi eble ne scias, kio estas urbo? — Estas loko, kie loĝas tre multaj homoj. Rodney estas iomete pli aĝa ol mi. Li vizitis gimnazon kaj scias konsiderinde pli multe ol mi. Krome li estas bona kaj afabla. Li neniam faligis arbon, tial Glogo ne devas timi renkonti lin.”

”Mi ne scias,” diris la gnomo. ”Certe povas fariĝi malfacila aranĝo.”

”Rodney — mi nomas lin tiel, ĉar li diras, ke ”onklo” igas lin senti sin maljuna — estas tre agrabla homo, mi opinias. Li diras multajn bonhumorajn aferojn, kaj certe li farus Glogon

bonhumora. Krome li havas iom da mono, kaj tion mi ne havas.”

”Mono? Kio estas tio?”

”N-jes, estas iom malfacile klarigi. Estas io, por kio oni ricevas objektojn, inter ni homoj, mi opinias. Vi devas havi monon, se vi volas, ke Glogo havu ŝancon vidi iom de la mondo.”

La gnomo pripensis tion.

”Ĉu vi kredas, ke Rodney emus veni por viziti Glogon?”

”Li certe emos. Kredeble li neniam renkontis gnomon pli frue, tial tio estus por li raviĝo.”

”Ĉu vi scias, kion mi kredas? Estas plej saĝe nenion diri al Glogo. Eble li furiozos kaj kaŝos sin en la arbaro kaj neniam plu montros sin. Rodney devas veni ĉi tien kaj diskuti la aferon kun mi, kaj poste ni devos aranĝi, ke Glogo renkontu lin tute neatendite.”

”Estas ja brila ideo,” ekkriis la knabino.

”Kiam vi povas esti ĉi tie, kion vi kredas?”

”Laŭ plano ni venos al la urbo morgaŭ. Mi parolos kun Rodney, kaj tiam ni venos ĉi tien tri tagojn post hodiaŭ. Se ni ne venos, tio dependas de tio, ke li estas forveturinta, estas malsana aŭ io alia.”

”Sed vi ja venos, se vi povos.”

”Jes certe, estas tute klare. Estas ja ti-i-i-el interese! Vere klerige. Eĉ panjo konsentus tion — kondiĉe, ke ŝi kredus je tio. Mi certe ne rakontos al ŝi pri tio. Ŝi ĉiam diras, ke mi havas tre viglan fantazion kaj ŝi nur kredus, ke mi eltrovis ĉion kaj kverelus kun mi.”

Elizabeto eksilentis, kvazaŭ ŝi ekhavis la penson, ke ne estas tute konvene por juna knabino koni sian patrinon tiel bo-

ne. En la sama momento la kvieto de la arbaro rompiĝis de aŭtomobila signalilo ne malproksime.

”Estas la aŭto,” Elizabeto diris.

”Tia dometo, kiun mi kelkfoje vidis preterveturi je terura rapideco. Kio igas ĝin moviĝi?”

”Estas la motoro,” Elizabeto diris. ”Rodney povas klarigi tion al vi multe pli bone ol mi. Li havas mem aŭton, vi vidos ĝin, kiam ni venos. Ne, nun ni devas daŭrigi, alie panjo kredos, ke mi erarvadis. Ŝi vokas min.”

Voĉoj aŭdiĝis iom fore, kaj Elizabeto metis ambaŭ manojn al la buŝo kaj aŭdigis akran ”Ho-hooo ...”, sono kiu igis la vi-
reton enigi fingrojn en la orelojn.

”Ho-ho, kian teruran voĉon vi havas.”

”Mi uzos ĝin por voki vin,” diris la knabino. ”Sed kiun mi voku? Vi ankoraŭ ne diris vian nomon.”

”Mi nomiĝas Bobo.”

”Bobo kaj Glogo. Kiel ĉarmaj nomoj! Mi nomiĝas Elizabeto.”

”Estas longa nomo,” diris Bobo kaj ripetis ĝin malrapide. ”Mi lernos eldiri ĝin antaŭ ol vi revenos. Ĉar vi ja revenos?”

”Estu certa pri tio,” vokis Elizabeto, kiu jam survojis en la direkton de la sonoj. ”Ĝis revido, Bobo.”

La eta ronda vizaĝo malaperis malantaŭ la verdaĵo, kaj Elizabeto kuris tiel rapide kiel ŝi povis al tiu loko, kie la du virinoj malkviete atendis.

”Ho,” ekkriis panjo. ”Vi detruis viajn ŝuojn.”

Kaj ŝi aldonis:

”Ĉu vi ne scias, ke estas sonserpentoj en ĉi tiuj arbaroj?”

Fraŭlino Jellifer diris:

”Vi estus povinta ricevi glason da soda akvo en unu el la arboj.”

”Mi volas lerni trinki nektaron el floro.”

”La knabino havas tre viglan fantazion,” ĝemis panjo, kiam ili eniris la aŭton.

Dua ĉapitro

En kiu Rodney renkontas Bobon

”**M**aljuna Sinsabow” estis konata kiel unu el la ”ligno-reĝoj” ĉe la nordokcidenta marbordo. Li loĝis en granda impona domo, kiun li konstruigis el sia propra ligno. Estis malnovstila domo, miraklo de ’lignaĵista ĝojo’, kun arkfenestroj, kun gabloj kaj turoj kaj dekoracioj. En tiu domo li edukis grandan familion kaj sendis la infanojn en la mondon kun diversaj komisioj. Nun li estis sepdekjara kaj ĉiuj filinoj estis edziniĝintaj, du filoj prizorgis la lignaĵaferojn, la tria estris la familian bankon, la kvara estis ŝipekipisto. Ĉiuj portis honoron al la familio Sinsabow, krom la plej juna, kies nomo estis Rodney.

Rodney ne multe interesiĝis pri lignaj varoj, nek pri aliaj negocoj entute. Li partoprenis per gajhumoraj rimarkoj pri ĉio kaj ĉiuj, inkluzive la familion. Ĉi tiuj rimarkoj igis ilin pro iu kialo senti sin malpli gravaj — kaj tio estas io, kion plej multaj homoj ne ŝatas. La maljuna Sinsabow, kiu estis pli dikhaŭta ol la aliaj, kutimis jen kaj jen montri severan rideton. Kaŭzo plendi pri la konduto de Rodney ne estis. Li tutsimple ŝatis legi librojn kaj skribi poemojn. La maljunulo opiniis, ke li povas permesi al si unu filon, kiu estis alispeca. Dume Rodney havis sufiĉan jarsubtenon kaj daŭrigis fari nenion krom legi kaj skribi. Kiam li havis kun si amikon en la aŭto, li povis diri, kiam li ekvidis nudhakitan arbaron: ”Tio estas la

nordokcidenta turo de nia domo,” aŭ: ”Tio estas la jakto de mia frato,” aŭ: ”Tio estas mia jarsubteno por la venonta jaro”.

Posttagmeze, kiam Elizabeto venis al la urbo, ŝi tuj iris al sia ĉarma onklo. Ŝi frapis al la pordo kaj demandis ĝentile, ĉu ŝi rajtas eniri, kaj eksidis en apogseĝo, en kiu ŝi preskaŭ dro-nis, kaj diris:

”Rodney, ĉu vi iam vidis sekvojojn? Mi vidis ilin hieraŭ por la unua fojo, sed mi ne havis tempon multe rigardi ilin, ĉar panjo kaj fraŭlino Jellifer urĝis. Ĉu vi volas fari al mi grandan servon?”

”Kaj tio estus?”

”Mi tre ŝatus denove rigardi la arbojn. Kaj mi volas konfi-di al vi sekreton, — almenaŭ parton de sekreto. Mi vidis ion en la arbaro — mi ne volas diri kion, ĉar vi ne kredus min. Sed vi devas kredi al mi, kiam mi diras, ke temas pri io eksterordi-nare stranga, kaj ke vi ne pentos, se vi veturigos min tien.”

”Mia eta nevino sopiras alidire al pikniko.”

”Sed nur vi kaj mi, kara Rodney. Alie ĉio paneos.”

”Kaj kiam vi volas veturi?”

”Morgaŭ, se vi povas aranĝi tion. Panjo diras, ke ŝi havas nenion kontraŭ tio, se vi promesas ne veturi tro rapide.”

Rodney prenis la telefonon kaj sciigis al la ĉefkelnero, ke li volas havi unu termoson kun glacimalvarma suko, unu kun varma kafo kaj sendviĉojn kaj fruktojn por du personoj kaj la aŭton preta por ekskurso je la oka. Elizabeto estis dankema kaj tre sekretema.

La sekvontan matenon ili komencis longan veturon. Sed ĝi ne estis tiel longa laŭ tempo, ĉar ne troviĝis trafikpolicistoj sur la plurcent kilometrojn longa ŝoseo. Rodney havis speci-ale konstruitan aŭton kaj estis tre lerta ŝoforo. Krome li opi-

niis tute nature, ke la ŝoseoj estis konstruitaj speciale por la familio Simsabow.

Je la dekdua horo ili atingis tiun lokon, kie la aŭto de panjo estis parkinta. Ili ankaŭ parkis sian aŭton tie, kaj Elizabeto transprenis la gvidadon. Ŝi portis plejdon, sur kiu oni povos sidi, kaj Rodney prenis la lunĉan korbon, kaj poste ili iris de arbo al arbo la saman vojon, kiun Elizabeto memoris, ke ŝi iris la antaŭan tagon. Ili venis ĝis la granda ŝtono kun la filikoj, kaj tie ili haltis. Elizabeto, kiu havis 'la koron en la kolo' mallaŭte vokis "Bobo", kaj poste pli laŭte "Booboo"!

Tuj aŭdiĝis mallaŭta pepo. Ĉiu silabo por si mem, kvazaŭ pepante, iu klopodis elparoli la nomon korekte:

"E-li-za-be-to."

Rodney aspektis mirigita, kaj ili ambaŭ rigardis ĉirkaŭ si por eltrovi, de kie la sono venis. La posedanto de la eta voĉo ridis ĉarmigita, ĉar li opiniis, ke estas ridinde, ke la granduloj ne povas vidi lin. Rekte antaŭ ili estis malnova arbostumpo, el kiu dekduo da novaj arboj kreskis. Kiam Elizabeto serĉis inter la branĉoj, ŝi ekvidis la etan rondan vizaĝon kun la rozaj vangoj kaj la bruna ĉapo kun sunŝirmilo.

"Ĉaŭ Bobo!" ŝi vokis, kaj poste ŝi diris: "Tio estas Rodney! Rodney, ĉu vi permesas al mi prezenti mian amikon Bobo!"

"Jes, jes," Rodney diris mirigita, kaj poste li ripetis ŝafe: "Jes, jes."

"Mi ne rakontis al Rodney pri vi, Bobo," klarigis la knabino. "Mi pensis, ke li eble timus vin," kaj poste ŝi aldonis: "Sed agrable li estas, tute kiel mi diris."

Bobo premis sin inter la branĉetojn kaj okupis lokon sur la ekstera rando de la arbostumpo kaj esplorigardis sian gaston. Li vidis junan sunbrunan viron kun helaj haroj kaj mopsa

nazo kaj interesa esprimo en la vizaĝo, kiu kaŭzis faldetojn ĉirkaŭ la okuloj.

”Ĉi tio estas vere interesa,” diris la juna viro. ”Mi tre ĝojas ekkoni vin.”

”Mi scias, ke vi estos, Rodney. Komprenu, ke Bobo estas gnomo kaj ke li loĝis en ĉi tiu arbaro dum cent jaroj.”

”Gnomo! Mi ja legis pri gnomoj, sed estas la unua fojo, ke mi havas la ĝojon renkonti unu. Ĉu mi rajtas demandi, ĉu estas kutimo inter via popolo, sinjoro Bobo, ke oni skuas manon, kiam oni estas prezentata?”

”Mi neniam pli frue estis prezentata,” respondis Bobo.

”Mi ne scias, kiel ĉi tiu kutimo skui la manojn estiĝis,” diris Rodney. ”Devas esti antaŭ multaj jarmiloj, kaj mi supozas, ke la viroj donis la dekstran manon unu al la alia por montri, ke ili estas sen armiloj kaj ke ili ne havas malbonajn intencojn. Ĉu vi permesas al mi montri, kiel ni faras?”

Rodney prenis tre singarde la etan manon kaj levis ĝin supren-malsupren dufoje.

Bobo estis ekzakte tridek ses kaj kvaronan centimetron alta, kaj kiam li estis sata kaj kontenta li pezis kvin kilogramojn kaj tricent gramojn. Sentiĝis strange tuŝi la etan fragilan manon.

”Bobo neniam pli frue parolis kun grandulo antaŭ ol li renkontis min,” klarigis Elizabeto. ”Li loĝas tute sola ĉi tie en la arbaro kune kun sia avo. Ili tute ne scias, kio okazis al la cetero de ilia popolo. Ili malaperis kaj Glogo — tio estas lia avo — kredas, ke la kaŭzo estas la detruado de la arbaroj.”

”Ankoraŭ atakpunkto kontraŭ la lignaĵa industrio,” rimarkigis Rodney.

”Kio estas lignaĵa industrio?” demandis Bobo.

”Estas ĝi, kiu forhakas la arbojn.”

”Ho, tiam estas abomena industrio.”

”Jes, de longa tempo mi ankaŭ havas la saman opinion. Sed mia situacio estas iom embarasa, ĉar granda parto de mia familio okupas sin pri tiu speco de negocoj. Mia patro estas lignokomercisto kaj same ankaŭ kelkaj el miaj fratoj.”

”Kiel terure!” La gnomo aspektis kvazaŭ li volus forkuri.

”Rodney ne kulpas pri tio,” Elizabeto diris senkulpigante.

”Ne, Bobo, tion mi certigas. Mi estas la plej juna filo, kaj oni rigardas min kvazaŭ iom malsaĝeta, kaj neniu serioze respektas, kion mi diras. Miaj parencoj daŭrigas forhaki arbojn, kaj se ili ne farus, aliaj homoj farus tion, ĝis eĉ ne unu arbo restos sur la tera surfaco.”

Esprimo de teruro aperis sur la vizaĝo de la gnomo.

”Glogo kaj mi do estas kondamnitaj,” li diris.

”Ne, ne,” Rodney diris rapide. ”Mi troigis. Temas pri ĉiuj arbaroj, kiujn ili povas atingi. Dank’al Dio ĉi tiuj arbaroj tiurilate estas sekuraj. Ĉi tiu arbaro estas nacia parko, kie ĉiu kreskaĵo estas protektita. Vi kaj via avo povas ĉiam havi hejmon ĉi tie, kaj homoj povas veni viziti vin, se vi deziras.”

”Ili ne volas, ke homoj venu viziti ilin,” klarigis Elizabeto. ”Bobo turnis sin al mi, nur pro tio, ke li estas malkvieta pri Glogo.”

”Kio mankas al Glogo?”

”Ŝajnas esti atako de neŭrastenio,” Elizabeto respondis kun sia kuracista mieno.

”Kiel tio esprimas sin?”

”Li tute perdis sian emon por filikaj semoj; li nur sidas kovante kaj ne diras multajn vortojn.”

”Sed se li havas nur Bobon, kun kiu li povas paroli, tiam li

certe jam de longe diris ĉion, kion li havas por diri. Kiom aĝa li estas?”

”Pli ol miljara.”

”Ĉu ne eble estas tiel, ke li komencas fariĝi maljuna? Ĉu ni povas paroli kun li?”

”Certe ne estas facile,” diris Bobo. ”Li tre timas grandulojn. Kaj neniam en sia vivo li montris sin al iu.”

”Sed ĉu oni ne povas klarigi al li, ke ni ne estas kiel la pli-multo? Ni ŝatas arbojn kaj arbarojn, kaj neniam povus fari malbonon al iu.”

”Li kredeble koleros al mi, kiam li ekscios, ke mi estis malobeema al li. Povas esti, ke li kaŝos sin en la arbaro kaj neniam plu montros sin al mi.”

”Oho, estas vere komplikite,” diris Rodney.

”Mi pripensis la aferon dum tri tagoj,” daŭrigis la gnomo, ”kaj nun mi kredas, ke mi fine trovis manieron por aranĝi renkonton. Sed promesu, ke vi ne timiĝos.”

Poste li faris ion neatenditan. Li mallevis la kapon kaj suprenigis la genuojn tiel ke li preskaŭ fariĝis pilko. Kaj poste li komencis ruliĝi malsupren laŭ la arbostumpo, dum Elizabeto kaj Rodney mirigitaj rigardis. La gigantaj sekvojoj ĉiam estas ŝvelaj ĉe la bazo, kaj la gnomo resaltis kontraŭ la arba ŝelo ĝis li fine atingis la teron kaj kuŝis senmova.

”Ho, ĉu vi vundiĝis?” vokis la knabino kaj alkuris.

”Nur iomete,” diris Bobo. ”Sufiĉe forte, sed ne tro danĝere.”

Poste li eksidis kaj deklaris:

”Mi ne volas mensogi al Glogo, sed nun mi povas diri, ke mi falis de arbo kaj ricevis dolorojn kaj ke vi venis kaj helpis

min. Kaj tial Glogo ne povos riproĉi min, kaj krome li devos esti ĝentila al vi.”

”Kia brila ideo,” diris Rodney.

”Ĉu vi estus afablaj kaj portos min ...?”

”Lasu tion al mi,” vokis Elizabeto. Rodney prenis la plejdon kaj la lunĉan korbon, dum Elizabeto tre singarde levis la etan estaĵon kaj portis ĝin kvazaŭ ĝi estus bebo.

”Kiel malpeza vi estas, Bobo, kaj tiel agrable portebla. Vi estus mirinda favoritbesto.”

”Mi povus mordi kaj grati, se mi emus ...” diris Bobo.

Sed ŝajnis, ke li tamen ŝatas la situacion, ĉar li premis sin al Elizabeto kvazaŭ hundido aŭ katido.

Tria ĉapitro

En kiu ambaŭ renkontas Glogon

Elizabeto, kiu portis Bobon, kaj Rodney, kiu portis la korbbon, daŭrigis en la arbaron sekvante la indikojn de Bobo.

Fariĝis longa silento. La du granduloj ne havis eblecon konstati, ĉu Glogo troviĝas en la proksimeco, sed tion evidente povis Bobo, ĉar li komencis paroli:

”Glogo, mi falis de arbo kaj batiĝis, kaj tiuj granduloj helpis min. Ili estas tre afablaj kaj bonkoraj. Ili ŝatas la arbojn kaj kunhelpas flegi ilin, tial estu bona kaj pardonu al mi, ke mi lasis al ili porti min.”

Fariĝis nova paŭzo ĝis ili subite aŭdis voĉon el granda aro da azaleoj. La voĉo estis pli profunda ol la voĉo de Bobo kaj malgraŭ la manko de volumo ĝi estis severa:

”Diru al la granduloj, ke ili sidigu vin kaj foriru.”

”Sed Glogo, tio estus malĝentila.”

”Granduloj neniam estas ĝentilaj. Ili estas murdistoj.”

”Ne Glogo, ĉi tiuj estas tre saĝaj homoj. Rodney estas studento kaj povas rakonti al vi multon pri la mondo.”

Nova paŭzo.

”Bona Glogo respondu.”

”Mi ne volas scii ion, kion la granduloj havas por rakonti.”

”Kredu al mi, Glogo. Rodney konas multajn aferojn. Li povas rakonti al vi pri ĉi tiu arbaro, ke ĝi estas nacia parko kaj neniam detruigoŝ.”

”Li mem detruigoŝ, kaj lia nacio kaj iliaj arbaroj.”

Nova silento. Bobo komencis petegi kun timo en la voĉo — li eble kredis, ke la strangaj granduloj ofendiĝos kaj foriros.

”Kredu al mi, Glogo, ĉi tiuj homoj havas eblecon instrui multajn aferojn. Ili havas eblecon ĉirkauveturi — Rodney kunprenos nin — por helpi nin trovi aliajn gnomojn en aliaj arbaroj. Ili vere volas nin helpi.”

”La gnomoj estis feliĉaj kaj ili ne bezonis helpon de granduloj. La sola ago, kiun la granduloj povas fari por ni estas forkuri — kiel eble plej longe for.”

Bobo rigardis al Elizabeto, kaj ŝi vidis, ke li havas larmojn en la okuloj. Ankaŭ Rodney rimarkis tion kaj faris paŝon antaŭen.

”Ĉu mi rajtas diri kelkajn vortojn?” li diris.

Li direktis sin al la azaleo-arbustoj kaj komencis:

”Mi bone scias, ke ni granduloj estis tre naivaj kaj kruelaj. Kelkaj el ni provas ŝanĝi tion kaj havas multajn malfacilaĵojn. Estas eble, ke ni ne sukcesos. Ni povas nenion promesi. Sed mi provis tamen laŭ mia povo. Mi aĉetis parton de ĉi tiuj sekvojaj arbaroj kaj donacis ilin al la ŝtato por ke ili estu gardataj por ĉiam. Ni povas veturi kaj rigardi. Ĉe iu loko apud la ŝoseo estas ŝildo el bronzo kun mia nomo enĉizita. Sekve vi estu iom dankema al mi, Glogo, malgraŭ tio, ke mi havis la malfeliĉon naskiĝi tiel granda.”

”Estas nenio, kion mi povas fari por vi,” diris la severa voĉo en la azalea arbusto.

”Vi eraras, Glogo. Mi estas studento, kaj mi vizitis la arbarojn kaj mi vane provis lerni paroli kun la arboj. Vi povas instrui tion al mi.”

”Kiel vi scias, ke mi povas paroli kun la arboj?”

”Mi komprenas, ke saĝa viro kiel vi ne povas loĝi en arbaro

dum mil jaroj sen lerni paroli kun ĉio vivanta. Mi scias, ke la arboj havas animon, same kiel la homoj.”

”Ili tute ne estas kiel la homoj. Ilia animo estas bona. Ĉu arbo iam faris akran hakilon por detrui objektojn aŭ estaĵojn? Arbo konstruas. Ĝi laboras konstante, tage kaj nokte. Ĝi faras kolosan laboron. Ĝi suĉas la arbosukon el la tero, kaj el tio ĝi preparas la arboŝelon kaj la kernlignon kaj branĉojn kaj foliojn.”

”Ĝuste tiel. Kaj eĉ ne la plej lertaj sciencistoj en la mondo komprenas, kiel tio povas okazi. Kiel arbo povas scii, en kiu loko ĝi faru ŝelon kaj kie foliojn. Kiel ĝi scias, se ĝi fariĝis vundita, ke ĝi povas direkti arbosukon por fari novan ŝelon kaj novan kernlignon.”

”Arbo scias ĉion, kio estas grava por ĝia vivo kaj por la pluvivo de la naturo en la estonteco.”

”Kiel okazas, kiam arbo parolas kun vi, Glogo? Ĉu ĝi uzas vortojn?”

”Arbo ne havas langon, per kiu ĝi povas formi vortojn. Arbo parolas per gestoj. Se vi amas ĝin kaj vivas kun ĝi, ĝia animo unuiĝas kun via propra animo, kaj oni komprenas ĝin kaj malamas tiujn senbridulojn, kiuj murdas ĝin.”

”Aŭskultu Glogo. Vi estas maljuna kaj saĝa, kaj mi estas nur infano. Mi nur vivis dum dudek jaroj — kaj ne multon oni sukcesas lerni dum tiu tempo. Mi petas vin humile konfidi al mi la sekretojn de la arbaro. Poste mi povos reveturi kaj pludoni al la homoj la konojn pri ili, tiel ke ili eble rekaptos sian prudenton.”

”Vi petas min rompi leĝon, kiu validis dum miliono da jaroj,” diris la severa voĉo post momento. ”Estas ne nur mi, sed generacioj de gnomoj, kiuj malpermesas tion.”

”Sed Glogo, se estas malbona leĝo — ĉu ne sufiĉas, ke oni havis ĝin dum jarmiloj? Pro tiu leĝo nur vi kaj Bobo restas, kaj kio okazos kun li, kiam vi estos for?”

”Ne parolu tiel,” vokis la voĉo de la azaleaj arbustoj, kaj ĝi sonis tre ĉagrenita.

”Sed estas vere, Glogo. Kio okazos kun la gnoma gento, se vi ne sukcesos trovi edzinon por via nepo?”

Aŭdiĝis nur ĝemo el la arbustoj.

”Ĉu vi pensis pri tio, Glogo?”

La respondo venis, kvazau flustro:

”Mi ne pensis pri io alia dum multaj jaroj.”

”Ĉu pro tio vi estas tiel malfeliĉa?”

”Ne ekzistas pli malfeliĉa estaĵo sur la tero ol mi.”

”Sed Glogo,” diris Bobo, ”vi ne estu malfeliĉa pro mi. Mi ne bezonas edzinon.”

”Naiva stultulo,” diris la voĉo. ”La tuta estonteco de la gnomoj dependas de via edzino.”

Longa silentado.

”Mi deziras, ke mi povus diri, ke mi scias, kie troviĝas aliaj gnomoj,” diris fine Rodney. ”Sed kiel vi scias, ili kaŝas sin de homoj. Mi povas nur diri, ke mi volonte estas via amiko, se mi rajtas, kaj ke mi faros mian plejeblon por traserĉi la arbarojn kaj trovi plurajn el via popolo. Kaj ne gravas, ĉu vi promesas instrui al mi la sekretojn de la arbaro aŭ ne, mi faros tion ĉiuokaze.”

Por la unua fojo la voĉo en la azaleoj montris emon moliĝi: ”Bone dirite. Sed ĉu la homoj iam vere opinias, kion ili diras?”

”Se mi volus al vi malbonon,” deklaris la juna viro, ”ni jam havas Bobon en niajn manojn. Kaj koncerne vin — kiam oni vivis dum mil jaroj, oni ne plu havas multon por riski.”

”Estas vero.”

Kaj subite la arbustoj ellasis figuron de sama formato kiel Bobo, kun same mallonga pantalono kaj simila bruna ŝirmil-ĉapeto.

Sed la vizaĝo de la estaĵeto estis pli longa kaj plena de sulkoj kaj ekipita per griza tufa barbo, kiu atingis ĝis la talio.

”Jen mi,” diris Glogo, ”mi volas provi fariĝi amiko kun vi.”

”Dankon, mia sinjoro,” diris Rodney kun solena riverenco, kiun la maljuna gnomo solene respondis. ”Mi nomiĝas Rodney, kaj ĉi tiu estas mia nevineto Elizabeto.”

La maljuna viro denove riverencis.

”Kaj nun mi proponas, ke ni eksidu taŭge kaj havu malgrandan interbabilon.”

Li sternis la plejdon sur la tero, kaj Elizabeto sidigis Bobon.

”Ĉu vi estas difektita?” demandis la maljuna gnomo. Bobo respondis, ke li estas vigla kaj sana kaj pruvis tion per salto.

Elizabeto kaj Rodney prenis lokon. Glogo sidiĝis laŭ ilia admono sur la eksteran flankon de la plejdo — tiu, kiu estis plej proksima al la arbustoj. Iam kaj tiam li nerveze rigardis ĉirkaŭ si, kaj estis videble, ke li estas preta ekkuri kaj fuĝi ĉe la plej eta signo de danĝero.

”Lasu min unue rakonti, ke mi studis ĉe io nomata universitato,” diris Rodney. ”Ĉu mi rajtas demandi, ĉu ekzistas universitatoj ankaŭ ĉe vi gnomoj?”

”Ni gnomoj ricevas la pleparton de nia scio dum nia taga vivo,” diris Glogo. ”Ni lernas ne nur de tiuj, kiuj estas pli aĝaj ol ni, sed ankaŭ de ĉio en la naturo kaj de la animoj de arboj kaj floroj. Ĉiuj arboj kaj floroj havas animon, ĉiuj vivantaj estaĵoj havas animon. Kiel ili alie povus funkcii? Kiel ili povus kreski?”

”Ĉu vi povas interŝanĝi pensojn kaj ideojn kun ĉiuj tiuj animoj?”

”Ĉiuj vivantaj estaĵoj interŝanĝas pensojn, eĉ se ili ne ĉiam mem scias tion.”

”Rakontu al mi pri la animo de ĉi tiu filiko, ekzemple.” Rodney tuŝis leĝere la proksiman filikon.

”La animo de filiko similas la animon de virino,” diris Glogo. ”Ĝi estas milda, senpretenda kaj humila, sed ankaŭ tre forta — nenio povas venki ĝin. Oni povas senpripense piedpremi ĝin kaj vundi ĝin, kaj ĝi turmentiĝas silente, sed kiam oni pasis, ĝi brave daŭrigas kun sia tasko krei belon. La knabineto certe komprenas la filikon, kiu pendigas kurtenojn ĉie en la arbaro kaj ne permesas al si ripozon, antaŭ ol ĉio estas belaspekta kaj hejmeca.”

”Vi priskribis ĝin en tre delikata maniero,” Elizabeto diris. ”Mi certe komprenos la animojn kaj de filikoj kaj floroj, mi kredas.”

”Mi supozas, ke oni devas esti tre, tre maljuna por kompreni la animon de la sekvojoj,” diris Rodney.

”Tia arbo atestas pri granda venko. Senfina kvanto da zorgeme elektita materio estas havigata el la tero. Solvita en akvo ĝi estis levita al tiuj imponaj altoj kaj konstruitaj al turo, kiu prizorgas sin mem kaj estas sekura kontraŭ senprudentaj atakoj de uraganoj kaj fajro. La animo, kiu konstruis tiun arbon estas forta kaj kvieta, — ĝi konas sian propran forton. Estas verdire tuta sistemo da animoj, kiuj kunlaboras en plena harmonio. Estas Muziko, kiun nia Patrino Naturo ludis dum cent miljonoj da jaroj. Kaj en tiu muziko estas nur unu falsa sono.”

”Mi komprenas, kion vi celas,” diris Rodney. ”Estis maljuna

saĝa viro inter ni, kiu diris, ke Dio estis gardinta la sekvojn arbojn kontraŭ ĉio krom frenezuloj.”

”Estas agrable aŭdi pri tiu viro, diris Glogo. ”Tio faciligas al mi paroli kun vi.”

”Nia saĝa maljunulo diris ankaŭ, ke nur la ŝtato povas gardi la arbojn kontraŭ la frenezuloj. Kaj iagrade tio fakte estas farita.”

”Bedaŭrinde kredeble estas tro malfrue por mia popolo,” diris Glogo kaj ŝajnis denove refali en tiu malgajecon, kiu igis Elizabeton suspekti, ke li turmentiĝas de neŭrastenio.

”Tion ni devos esplori,” diris Rodney kun tiu vervo, kiun ĉiuj devas montri, kiuj laboras kun deprimitaj homoj. ”Sed lasu min unue diri, ke nun estas la tempo de la tago, kiam granduloj manĝas lunĉon. Kiel estas kun vi?”

”Ni gnomoj ne havas regulajn manĝotempojn. Ni manĝas niajn filiko-sembon kiam kaj kie ni trovas ilin.”

”Eble plaĉus al vi iomete gustumi nian kunportitan manĝaĵon?”

Elizabeto komencis elpaki la lunĉan korbon. Ŝi sternis paperon tukon kaj lokigis kvar falditajn buŝtukojn. Poste ŝi prenis la pakaĵon kun sendviĉoj, ĉiu ĉirkaŭvolvita per buterpapero. En la korbo troviĝis krom tio plenigitaj ovoj, unu poteto da olivoj, unu kesteto kun nuksoj, iom da verda laktuko kaj tomatoj, kelkaj bananoj, unu botelo kun lakto kaj ambaŭ termosoj.

Tio estis sendube pli da manĝaĵo ol la du gnomoj iam en sia longa vivo vidis samtempe kolektita. La viglaj klaraj okuloj de Bobo glitis de unu aĵo al la alia.

Unue ili devis ”malseketigi la gorgon”, diris Rodney. Tuj

aperis problemo, ĉar la kunportitaj paperglasoj ne havis formaton taŭga por gnomoj.

”Mi aranĝos la aferon,” diris Bobo, fervore deziranta gustumi ĉiujn strangajn nutraĵojn, per kiuj la granduloj sin nutras. Forgesante siajn turmentojn li kuris en la arbaron kaj revenis kun du buntaj tigrolilioj. Li forturnis la stamenojn kaj pistilojn, kaj forigis la oran polenon el la kalkoj. Poste Elizabeto verŝis iom da suko en ilin el la termosoj kaj rigardis la mienojn de la gnomoj, kiam ili gustumis ĝin.

”Estas malvarma kiel la monta neĝo!” elkriis Bobo.

Eĉ ne la neŭrasteno povis kontraŭstari tian surprizon.

”Ĉu estas animo?” demandis Glogo.

”Eble jes,” respondis Rodney. ”Vi ja antaŭ momento rakontis, ke ekzistas ĉiuj eblaj specoj de animoj. Jen estas alia speco,” li aldonis, kiam li servis la kafon. ”Estu nun singardaj, ĉar ĉi tiu estas malobeema animo, kaj povas okazi, ke ĝi mordos vian langon, se ĝi havos eblecon.”

Kompreneble la ĉefkelnero en la hejmo de la lignoreĝo estis kontrolinta, ke la termosoj enhavas bonan kafon kun taŭgaj kvantoj da sukero kaj kremo. Bobo laŭdis laŭtvoĉe la varman trinkaĵon, kaj Rodney klarigis, ke estas la animo de la suno, kiun homoj lernis enfermi en butelojn kaj trinki.

Li rakontis al ili, ke la citronoj venas el suda Kalifornio kaj la sukero el Louisiana kaj la kafo de Brazilo kaj la kremo el Wisconsin. Ne estis facile ĉion kompreni, ĉar tiuj etaj estaĵoj ne havis imagon, ke la tero estas tiel granda, kaj malgraŭ tio, ke ili aŭdis pri maroj, ili ne komprenis, kiel ŝipoj povas veli sur ili. Krome estas erare paroli pri ŝipoj, kiam oni provas gajigi maljunan gnomon, ĉar oni devas konfesi, ke pluraj el ili estas faritaj el murditaj arboj.

Elizabeto donis al ĉiu parteton de sendviĉo. Rodney devis klarigi, kiel tritiko estas kulturita kaj muelita kaj kiel butero kaj fromaĝo estas faritaj el lakto de bovinoj. Glogo akceptis ĉiujn tiujn informojn kun kvietaj dignoplena teniĝo, sed Bobo bolis de fervoro kaj maĉetis de la pano, la butero kaj la fromaĝo, ĉiu aparte.

La banano devis esti tranĉita en maldikajn tranĉaĵojn, por ke Glogo ricevu taŭgajn pecetojn. Poste Rodney devis rakonti pri la stranga arbaro, en kiu ili kreskas, kaj kiu estas tute ali-aspekta ol la sekvojaj arbaroj. Sed banano estas tre maljuna kreskaĵo. Ĝiaj praplantoj ekzistis antaŭ miljonoj da jaroj, kaj ili donis manĝaĵon al ĉiuspecaj homoj. Kelkaj homoj estis malgrandaj, tiel nomataj pigmeoj, kiuj tamen estis multe pli grandaj ol gnomoj. Sed Rodney ne kredis, ke Bobo emus edziĝi al pigmeino. Krome ŝi parolus portugalan lingvon aŭ indianan aŭ alian lingvon, kiun li ne komprenus.

”Parolante pri tio,” diris Rodney al Glogo, ”mi pensis demandi al vi, kiel povas esti, ke via popolo parolas esperanton¹?”

”Esperanto,” diris la maljuna gnomo. ”Kio estas tio?”

”Tiel oni nomas la lingvon, kiun ni parolas.”

”Kia stranga ideo,” rimarkigis Glogo. ”Mi ĝuste pensis demandi vin, kiel povas esti, ke vi parolas la gnomon.”

Tiel estis pri tiu afero.

1 En la angla versio Elizabeto kaj Rodney parolas la anglan lingvon.

Kvara ĉapitro

En kiu la gnomaŭto startas

Kaj nun estas tempo por ni komenci niajn esplorojn,” diris Rodney.

Ili parolis pri gnomoj kaj iliaj kutimoj. Ne estis senco serĉi en ĉi tiu arbaro aŭ la najbaraj arbaroj, ĉar Glogo kaj Bobo jam trakombis ilin ĉiujn. Ili devos viziti iom forajn arbarojn.

”Rodney havas tian domon, kiu kutimas preterruli en granda rapideco,” Bobo sciigis al la avo. ”Li intencas montri al ni, kiel ĝi funkcias.”

”Ĉu estas animo, kiu pelas ĝin?” demandis la maljuna gnomo.

”Tion oni povas diri,” respondis Rodney. ”Estas denove la animo de la suno, kiun ni uzas. La homoj lernis katenigi la sunon kaj la fulmon.”

”Nenio devus esti katenita,” diris Glogo.

”Ĝi ne vere estas katenita,” diris Rodney rapide. ”Ĝi havas la kapablon transformi sin al io alia. Tio estas, kion faras la arboj — transformas unu vivoformon en alian.”

”Kiel nomiĝas tiu objekto?” demandis Glogo.

”Aŭtomobilo. Tio signifas io, kio movas sin mem. Kiam ĝi transportas gnomojn, ĝi eble devas esti nomata gnomaŭto.

”Mirinde,” kriis Elizabeto kaj frapis la manojn. ”Kiel amuze — veturi en gnomaŭto.”

”Sed ĉu vi estas certa, ke ĝi ŝatos nin?” demandis la singarda avo.

”Tuj kiam ni sciigos al ĝi, ke ĝi estas gnomaŭto,” diris Rodney, ”ĝi ankaŭ komprenos, ke ĝi estas celita por transporti gnomojn.”

Elizabeto estis kutimigita al speciala flanko de sia onklo. En plej neatenditaj okazoj li ricevis ideon por versaĵo. Tiam li ĉiam petis ĉiujn silenti por momento, kaj poste li deklamis ion. Verŝajne ekzistas poetoj ankaŭ inter la gnomoj, ĉar Glogo kaj Bobo tenis sin silentaj kiel musoj. Post momento Rodney komencis:

*Jen vigla gnomaŭto
Rapide pasas sur la strato
Movigas min kun gaja sento
Se trafas min ne akcidento
Se la ŝraŭbingo malfiksiĝas
Tuj tio bone ripariĝas
Se urĝas mi tro multe
Tio estus stulte
Se kviete vi veturas
Mi gratulas kaj tamburas.*

Elizabeto opiniis, ke estas tre ĉarma poemo, kiam ŝi aŭdis ĝin deklamita. Sed kiam ŝi vidis ĝin skribita ŝi miris, kiel la gnomoj povos lerni kompreni la malfacilajn vortojn.

Ekestis la problemo kiel atingi la gnomaŭton sen montri la gnomojn al la homoj. Rodney klarigis, ke la granduloj estas tre scivolemaj, kaj se ili ekvidus ion, kion ili neniam pli frue vidis, ili alvenos amase por nur stari kaj gapi, kaj plej malagrade estas, se la novaĵo aperas en la gazetoj, ĉar poste ili ne plu havos senĝenan minuton por si mem. Aliaj homoj venus

amase por provi interrilati kun la nekonatoj. Glogo kaj Bobo estus submetitaj al tiel nomataj "sociaj devoj".

"Kiam ni venigos vin al la gnomaŭto," diris Rodney, "mi envolvos vin en la plejdon kaj portos vin. Poste mi metos la plejdon sur la sidlokon, tiel ke vi povos kaŝi vin sub ĝi, se iu grandulo proksimiĝos al la gnomaŭto."

"Ni kutimas kaŝi nin. Nia vivo dependas de tio."

Ili kolektis la lunĉajn restaĵojn kaj metis ilin en la korbon, kiu nun estis konsiderinde pli malpeza. Rodney faris sakon el la plejdo, en kiun la gnomoj enrampis, tiel ke nur iliaj kapoj estis videblaj. Tie estis filikaĵo, kiun ili rapide povos uzi por kaŝi sin. Poste li portis ilin al la gnomaŭto, malŝlosis la pordon kaj metis ilin sur la malantaŭan sidlokon. Ankaŭ aliaj aŭtoj estis parkitaj en la sama loko kaj homoj ĉirkaŭpromenis, sed neniuj atentis, kion Rodney faras.

Nun aperis tamen nova problemo. Glogo ĉirkaŭrigardis en la gnomaŭto kaj ekvidis la fenestran kadron. Tuj li kuŝiĝis en la sidloko kaj kaŝis la vizaĝon per la manoj. Malforta ĝemo venis tra la lipoj.

"Kio okazis?" vokis Bobo.

"Estas murdita arbo."

Jen estis problemo, pri kiu ili ne kalkulis. Kiel nun okazos kun ilia espero kuraci maljunan gnomon de neŭrastenio, se li ĉiufoje, kiam li vidos ion farita el ligno, ekploros pro murdita arbo.

Rodney klarigis al li, ke ne estis la gnomaŭto, kiu faris la murdon. La kompatinda senŝulda gnomaŭto ne povas respondecigi pri tio. Estas ĉiuj malnoblaj lignaĵvendistoj, kiuj kulpas pri tiu senhonoriga faraĵo. Glogo sidis kun la vizaĝo kaŝita en la manoj kaj rifuzis aŭskulti lin. Elizabeto sidis silenta en

la antaŭa sidloko apud Rodney kaj ne sciis, kion ŝi povus fari por konsoli la bedaŭrindan Glogon.

Rodney startis la motoron kaj lasis la parkejon dorsveture. Baldaŭ ili rapidegis sur la ŝoseo. Tiu serio de novaj travivaĵoj igis Bobon laŭte krii pro ekscito kaj kuracis almenaŭ momente la rompitan koron de Glogo. Kiu stranga animo estas, kiu ŝpinas kaj zumas al ili, kaj kiel ĝi faras por peli la gnomaŭton antaŭen? Estis tre obeema animo, ĝuste kiel Rodney diris. Ĝi veturigis ilin precize tien kien ili volas, kaj kun la rapideco, kiun ili mem decidis. Estis vere stranga animo.

Sed kio okazis tie ekstere? La arbaro flugis preter ili, kaj Glogo kaj Bobo kuris de la fenestro sur unu flanko al la fenestro sur alia flanko. Kio okazis al la arboj? La arboj kuris. Ili neniam pli frue vidis arbojn agi tiel. Glogo tenis sin fikse ĉe la fenestra lignokadro kaj tute forgesis la mortintajn arbojn en sia miro pri la konduto de la vivantaj.

Post kelkaj momentoj ili venis al arbaro kun sekvojoj, kiun neniŭ el ili pli frue vidis. Ili haltis. Rodney envolvis denove siajn du protektatojn en la plejdon kaj portis ilin en la arbaron.

Kiam ili venis al soleca loko, li sidigis ilin sur la teron, kaj ili komencis tuj, kvazaŭ sangohundoj, serĉi gnomojn. Ili baldaŭ povos scii, ĉu trovigas gnomoj en ĉi tiu arbaro, ili klarigis al la granduloj, ĉar gnomoj havas delikatan sentemon pri odoroj, kaj ili lasas post si restaĵojn sur la filikoj, kiam ili manĝis la semojn. Ili devas paŝi longajn distancojn en sia serĉado de manĝo, ĉar filikaj semoj estas tre malgrandaj. Rodney diris, ke li legis pri tibetaj ŝafoj, kiuj devas manĝi dumkure, ĉar estas tiel longaj distancoj inter la herbotufoj, kaj Bobo diris, ke estas preskaŭ same por la gnomoj.

Ili venis al la rezulto, ke ne troviĝas gnomoj en tiu arbaro, kaj Rodney portis ilin reen al la gnomaŭto. La animo de la suno veturis rapide al nova arbaro. Tie ripetiĝis la serĉado, kaj tiel daŭris dum la tuta tago. Ili vizitis pli da arbaroj ol la aĝa gnomo iam prisonĝis. Ili vidis belajn naturscenejojn, ili vidis sciurojn kaj kuniklojn, kaj unufoje ili vidis vulpon kaj unufoje kapreolon, sed da gnomoj ili vidis tute neniom.

Estis interese vidi, kiel la sciuroj venis de la arboj kaj sidiĝis sur arbustoj kaj interŝanĝis salutojn kun Glogo. Ĉiuj bestoj de la arbaro estas ĝentilaj al la gnomoj, li klarigis, kaj serĉas ilin kiam ili estis vunditaj, ĉar la gnomoj scias, kiujn kreskaĵojn oni bezonas por kuracado. Glogo kaj la sciuroj povis interkomunikiĝi, kaj la sciuroj certigis, ke ne estis iu alia de lia gento proksime.

Kiam la krepusko komencis kunigi siajn ombrojn kun la konstanta malhelo de la arbaro, ili jam estis en tiu arbaro, kiun Rodney aĉetis kaj donacis al la ŝtato, kaj kiu havis lian nomon sur bronza ŝildo ĉe la vojrandoj. Sed tie ne estis gnomoj, kaj tial ili sternis plejdon sur la grundo ankoraŭ foje kaj formanĝis la restaĵojn de la manĝaĵo kaj havis solenan diskuton.

”Estas tute klare,” diris Rodney, ”ke ne estas pli da gnomoj inter la sekvojoj ĉi tie en la marbordaj regionoj. Sed estas eble, ke ni trovos unu aŭ alian inter la sekvojadendroj aŭ mamutarboj, kiuj kreskas pli supre en la montaro. Ĉu vi scias, Glogo, ke ekzistas arboj, kiuj fariĝas duoble pli altaj ol tiuj, inter kiuj vi vivas?”

Tion Glogo ne sciis, kaj li estis profunde imponita, ke grandulo povis informi lin pri tia afero.

”Kie ekzistas tiuj altaj arboj?” li demandis. Kaj Rodney rakontis, ke ili kreskas en la altaj montaroj en Kalifornio.

”Vi povos morgaŭ veturi tien kaj rigardi ilin, se vi volas,” li diris.

Glogo preferis tion antaŭ ĉio en la mondo. Li klarigis, ke li restos eterne dankema al sia nova amiko kaj la animo de la gnomaŭto, se li povos veturi tien.

”Sed aperos certe kelkaj problemoj dumvoje,” diris la juna viro. ”Vi veturos tra regionoj, kie loĝas homoj, kaj ili forhakis ĉiun arbon kaj kulturamas la kampojn tie. Tio certe igos vin malgaja vidante tion. Vi ankaŭ vidos multajn objektojn, kiuj estas faritaj el murditaj arboj. La homoj estas konstruintaj grandajn lignoskatolojn, en kiuj ili loĝas. Vi estos devigata eniri kelkajn el ili — ĉar Elizabeto kaj mi devas havi lokon, kie ni povos dormi, ĉar ni ja ne estas al kutimiĝintaj dormi en arbaro. Tion vi devas klare scii, antaŭ ol ni veturos.”

Bobo estis gajega, juna kiel li estis, kaj sopiregis vidi tiujn novajn kuriozaĵojn. Nenio povus esti pli malbona, li asertis, ol vivi kiel ili ĝis nun faris, sen estonteco. Kaj krome Glogo ja sciis, ke la arboj estis murditaj, — li estis imaginta al si, kaj tio ne povas esti pli malagraba ol vidi tion en realo. La ĉefa afero ja estas trovi aliajn gnomojn. Se ekzistas pli grandaj arbaroj kun pli grandaj arboj, povas ja ankaŭ ekzisti kiom ajn da gnomoj en ili.

La maljuna gnomo klinis sian kapon kaj klarigis, ke li pacience eltenos ĉiujn turmentojn, kiujn la strangaj kutimoj de la homoj kaŭzos al li. Sed li esperis, ke li ne devos montri sin antaŭ tiuj homoj. Rodney diris, ke li aĉetos du grandajn salikokorbojn. Kun kusenoj sur la fundo ili estos taŭgaj litoj por la gnomoj. Per tiuj korboj ili facile estos transportataj kien ajn,

kaj ili ne devos vidi pli multe ol ili deziros. Rodney diris, ke la butikoj ankoraŭ estas malfermitaj kaj se ili iomete rapidos ili povos aĉeti la korbojn.

Ili reiris al la gnomaŭto, kiu per dezirinda rapideco transportis ilin el la arbaro en urbon. Tie okazis ekzakte kiel Rodney antaŭdiris, sen turmentiga travivaĵo por Glogo. En la malfortiĝanta lumo ili vidis montdeklivojn, de kiuj ĉiu arbo estis forhakita. Ili estis tute nudaj kaj dezertaj, tiel ke Glogo ĝemante pro malĝojego kuŝiĝis sur la sidloko kaj profundiĝis en melankolio. Sed Bobo, tiu vigla, apenaŭ centjara knabo, estis tre ravita pro ĉio nova. Tiuj mirindaj granduloj eĉ prenis la stelojn de la ĉielo kaj pendigis ilin en siajn hejmojn kaj laŭ la ŝoseoj. Kiam ili venis en urbon li vidis pli multajn lumantajn stelojn ol li iam estis vidinta sur la ĉielo, kaj eĉ Glogo devis eksidi kaj demandi pri la animoj de la radiantaj lumoj.

Ili parkis la gnomaŭton sur la strato. Glogo kaj Bobo rampis sub la plejdon, kaj Rodney ŝlosis la pordojn, tiel ke neniu ĝenu ilin. Poste Rodney kaj Elizabeto iris al hemslojda butiko kaj aĉetis du ĉarmajn korbojn kun fortikaj teniloj. En unu '5-kaj 10-centa bazaro' ili aĉetis du molajn kusenojn kaj kelkajn grandajn naztukojn, kiuj devos servi kiel — litotukoj.

Ili aĉetis ankaŭ fingringojn el aluminio, el kiuj la gnomoj povos trinki, kaj agrablan molan silkopaperon, el kiu Elizabeto povos tondi gnomnaztukojn kaj buŝtukojn. Ŝi trovis por siaj amiketoj eĉ du pupajn robojn, kiuj ŝajnis esti faritaj kiel noktoĉemizoj. En iu kafejo oni plenigis iliajn termosojn per varmaj kaj malvarmaj trinkaĵoj.

Kun ĉiuj tiuj trezoroj ili reiris al la gnomaŭto. Dum Elizabeto rakontis por la etaj estaĵoj pri la uzo de la objektoj, Rodney reiris al la kafejo kaj enfermis sin en telefona kajuto kaj

mendis interurban parolon kun la patrino de Elizabeto. Li metis kelkajn monerojn en la moneran fendon kaj diris:

”Petunia, mi telefonas por rakonti, ke ni havis mirindan tagon, kaj ni havis la maloftan bonŝancon konatiĝi kun klera maljuna sinjoro. Li estas unu el niaj plej grandaj sciencistoj — doktoro Glogo, profesoro pri psikologio de la arboj ĉe la Sekvoja universitato. Li ĉirkaŭveturas kun sia nepo kaj studas la historion de la grandaj arboj, tial estas tre agrable por Elizabeto kaj kultura travivaĵo por ni ambaŭ. Mi promesis al ili veturigi ilin al la internaj partoj de la lando por rigardi la mamutarbojn, kaj mi esperas, ke vi permesas, ke Elizabeto sekvu. Mi prizogos ŝin plej bone laŭ mia povo.”

Nun estis tiel, ke la patrino ricevis sian edukon en monduma knabina lernejo, kaj ŝi estis lerninta pli multe kiel oni eniras salonon, ol pri natursciencaj temoj. Ŝi neniam aŭdis pri Sekvoja universitato, kaj ŝi ne havis eĉ la plej palan ideon pri kio estas psikologio de la arboj — sed neniu igus ŝin konfesi sian nescion. Ĉio, kion ŝi diris estis: ”Ho, Rodney, vi estas tro sentima ŝoforo.”

”Mi promesas, ke mi veturos tre tre singarde, Petunia. Ni pasigos la nokton en bona hotelo, unu kun ŝtalkingstruaĵo, tiel ke ne estas risko, ke ĝi frakasiĝos dum eventuala tertremo. Mi ankaŭ kontrolos, ke Elizabeto trinkos sian kutiman glason da lakto ĉe ĉiu manĝo.”

”Kiom longe vi restos for, Rodney?”

”Tion mi ne povas diri. Tio dependas de la profesoro. Sed mi opinias absolute, ke ni devas uzi la okazon lerni kiel eble plej multe pri la plej maljunaj arboj de la mondo — pensu nur, Petunia, ili estas la plej maljunaj el ĉio vivanta, kio ekzis-

tas, kaj Elizabeto estas tre interesita pri ĉio, kion la profesoro rakontas.”

”Tion mi komprenas. Ŝi estis ja tute ravita pri tiuj arboj. Mi supozas, ke ŝi bombadas la maljunan sinjoron per demandoj. Kontrolu, ke ŝi ne malsekiĝos je siaj piedoj, Rodney.”

”Tion mi faros.”

”Sed ŝi kunhavis nek piĝamojn nek dentobroson.”

”Ni aĉetos ĉion, kion ŝi bezonas en ĉi tiu urbo, de kie mi telefonas. Mi aŭdigos min denove post du tagoj kaj informos vin, kiel ni fartas.”

Kiam panjo estis doninta sian benon al la vojaĝo, Elizabeto reiris al la butikoj kaj aĉetis por si mem tion, kion ŝi tute estis forgesinta en sia fervoro por siaj amiketoj kaj iliaj bezonoj. Rodney ankaŭ aĉetis, kion li bezonis, kaj poste ili direktis sin suden.

La mirinda gnomaŭto povis movi sin same facile dum la nokto kiel dum la taglumo. Ĝi ĵetis sunlumon antaŭ sin tiel ke la ŝoseo aspektis kvazaŭ larĝa bendo da lumo. Estis agrable, kiam oni veturis en montaro kaj svingis jen tien jen alien kaj la suno ludis inter la arbojn. Bobo cerbumis multe pri la animo de la suno en la gnomaŭto kaj petis al Elizabeto, ke ŝi prenu lin sur la brakon, kie ŝi sidis en la antaŭa sidloko, tiel ke li pli bone povu rigardi la spektaklon.

Glogo klarigis, sentema maljunulo kia li estis, ke li vidis sufiĉe por la momento kaj englitis en sian agrablan korboliton. Certe li kuŝis kaj cerbumis pri la malbono de la homoj kaj la zorgoj de la gnomoj, aŭ li ekzercis sin paroli kun la animo de la motoro. Ĉiuokaze la aliaj nenion aŭdis de li, kaj ili ne eksciis, kian influon ŝanĝo de medio havis por la neŭrasteno de la gnomo la unuan tagon.

Je la naŭa ili venis al urbo, kaj Rodney klarigis, ke estas tempo ekdormi kaj por knabinoj kaj por gnomoj. Li haltis antaŭ hotelo, kiu laŭ li estis garantiite tertremosekura. La gnomoj estis sekuraj en siaj korboj kun siaj fingroĉapetoj kaj noktaj vestoj. Servoknabo alvenis el la hotelo, sed Rodney rifuzis al li preni la valorajn korbojn kaj anstataŭe petis lin veturigi la gnomaŭton en garaĝon.

Rodney eniris la hotelvestiblon, sufiĉe kurioza figuro kun du grandaj salikokorboj, sekvata de knabineto, kiu portis multajn pakajetojn. Li diris al la pordisto, ke li deziras du ĉambrojn kun bano. La pordisto rigardis la korbojn kaj diris: "Mi bedaŭras, sed ni ne permesas hundojn en la ĉambroj."

"Mi ne havas hundojn," diris Rodney.

"Pardonu, sed kio estas en la korboj?"

Tio estis demando, kiun la gasto ne antaŭvidis, kaj nun estis necese pensi rapide.

"Reĝaj abisenaj anseroj," li klarigis.

Elizabeto malfermis la buŝon kaj glutis, kaj ankaŭ la pordisto aspektis mirigita, Rodney aldonis, ke estis edukitaj bestoj, kiuj havas la kutimon loĝi en speciale eleganta hejmo kaj ne faras ian ajn difekton.

Elizabeto malkviete turniĝadis. Imagu, se la pordisto rigardos en la korbojn kaj ekvidos Glogon kaj Bobon! Kiel terure, se Rodney estos devigata konfesi, ke li mensogis! La pordisto supozeble telefonos al la polico kaj prizorgos, ke ĉiuj estos malliberigitaj!

Kion li faris estis nur peti al Rodney afable atendi. Li alvokis la direktoron, kiu tuj venis por diskuti la problemon. Li esprimis la deziron vidi la anserojn, sed Rodney klarigis, ke ili estis "konfidencaj." Fine la afero ordiĝis tiel, ke Rodney

subskribis paperon, laŭ kiu li promesis pagi al la direktoro por ĉiuj eventualaj difektoj, kiujn la reĝaj abisenaj anseroj povus fari sur tapiŝoj aŭ mebloj. Evidentiĝis, ke la direktoro rekonas la nomon Sinsabow, kaj deklaris sin kontenta.

Ili eniris la lifton kaj ricevis siajn ĉambrojn. Rodney tre serioze ĉirkaŭrigardis kaj petis la serviston atendi. Li sidiĝis ĉe la skribtablo kaj skribis bileton al la direktoro, en kiu li atentigis pri granda makulo sur la tapiŝo, naŭdek centimetrojn de la nordorienta angulo de la ĉambro, kaj alia makulo sur unu el la litkovriiloj, malsupre sur la dekstra flanko. Li transdonis la bileton al la servoknabo kaj diris: "Jen vi havas laton."

La knabo aspektis mirigita, sed evidente li sentis, kio venis en lian manon.

"Koran dankon," li diris kaj malaperis.

Rodney ŝlosis la pordojn de ambaŭ ĉambroj kaj zorgeme riglis, kaj Elizabeto malfermis la korbojn. La du gnomoj elsaltis kvazaŭ saltopupoj, tute vekaj kaj plenaj de scivolemo.

"Kio estas lato?" demandis Bobo, kiu kompreneble aŭskultis ĉiun vorton.

"Estas esprimo por 'ŝanĝmono'," respondis Rodney.

"Ho, Rodney, kial vi ŝercas kun li?" Elizabeto diris. "Estas nur liaj kutimaj stultaĵoj, Bobo. 'Lato' estas parto de ligno, kaj Rodney ĉiam ŝercas pri tio, ke lia mono venas de lignovaroj, kaj li diras, ke li ne povas diferencii inter mono kaj ligno. Vi devas pardoni al li, Bobo."

Estis amaso da lignaĵoj en la hotelĉambro, la litoj kaj la ŝrankoj kaj skribtabloj kaj seĝoj, ĉio estis farita el ligno. Glogo estis avertita pri tio, sed tamen ne povis helpi, ke li fariĝis malgaja, malagrabla turmentita vidi tion, kaj li sidis en sia korbo, viktimo de malgajaj pensoj. Sed Bobo elsaltis el sia

korbo, promenis en la ĉambro kaj esploris ĉion. Ne daŭris longe antaŭ ol li aperis en la banĉambro, kie Elizabeto preparis banon. Ŝi levis lin tiel ke li povis rigardi en la banujon. Li baraktis kaj bruegis kaj vokis, ke la avo venu por rigardi ĉi tiun montorivereton en unu el la lignokestoj de la granduloj.

Montriĝis, ke la gnomoj estas tre facilmovaj — ili povis meti la manojn sur la seĝo kaj salti sur la sidlokon. Ili povis ankaŭ veni en la liton per grimrado sur la litofosto. Kaj ne daŭris longe antaŭ ol la du etaj estaĵoj sidis meze de unu duper-sona lito kaj demandis al Elizabeto kaj Rodney:

”Kial vi diris, ke ni estas anseroj?” demandis Bobo.

”Mi esperas, ke vi ne kontraŭas tion,” respondis Rodney.
”Oni povas ja diri, ke ni ĉiuj estas anseroj.”

”Ansero estas tre honorinda besto,” diris Glogo, ”serioza kaj vigla, se oni ne incitas ĝin.”

”Kion vi plue diris pri ni?” insistis Bobo.

”Ke vi venis el Abisenio.

”Kio estas tio?”

”Estas lando, kiu situas preskaŭ sur la alia flanko de la terglobo. Tie loĝas popolo tre maljuna.”

Elizabeto faris alian demandon:

”Rodney,” ŝi diris, ”ĉu vi estas tute certa, ke ili havas anserojn en Abisenio?”

”Mi fakte neniam pensis pri tio.”

Elizabeto fariĝis tre maltrankvila, sed Rodney, kiu ĉiam estis preta daŭrigi siajn ŝercojn, diris:

”Kion ni povas fari al tio?”

”Ĉu vi ne kredas, ke oni povas ekscii pri tio en iu enciklopedio?”

”Eble, sed la biblioteko certe ne estas malfermita je ĉi tiu horo.”

Ili ne sciis, kion fari, sed fine Rodney ekhavis ideon:

”Ni devas telefoni al Abisenio.”

”Ho, ĉu ne estos tre multekosta?”

”Eble unu dekduo da tegmenta ŝindo — aŭ io simila, mi kredas.”

”Rodney, vi estas netolerebla.” Elizabeto diris. Ŝi devis klarigi al la gnomoj, ke ŝindo estas io, kion oni vendas en la lignaĵvendejoj, kaj ke Rodney kiel ordinare ŝercis pri sia mono.

”Sed,” diris Rodney, ”se ne ekzistus la lignaĵa industrio, la kompatinda Glogo neniam estus malsana je neŭrastenio, kaj vi kaj mi ne troviĝus en hotelo sub falsaj premisoj. Mi devas absolute ekscii, ĉu ekzistas anseroj en Abisenio.”

Li iris al la telefono kaj telefonis al la telegrafa oficejo kaj petis al ili sendi knabon. Poste li sidiĝis ĉe la skribtablo kaj komencis skribi. Elizabeto devis klarigi al Bobo, kion signifas telegrafi — estis tre mistika animo, tiel rapida, ke ĝi povas veturi plurfoje ĉirkaŭ la tero en momento, kaj la homoj estis konstruintaj vojeton sur la oceana fundo, laŭ kiu la animo povas sin movi.

Kontraŭ iom da mono — aŭ ’konstruligno’, kiel li mem nomis ilin — la animo prenis sur sin la taskon konduki demandon al tiu lando kaj reveni kun respondo.

”Ĝi laboras, dum oni dormas,” aldonis Rodney kaj klarigis, ke nun estis mateno en Abisenio, kaj ke la respondo revenos, kiam estos mateno en Kalifornio.

Li laŭtlegis la telegramon: ”La konsulo de Usono, Addis Abeba, Abisenio: Ĉu vi havas anserojn en via lando? Rodney Sinsabow.”

La telegramknabo venis kaj Elizabeto enŝlosis la gnomojn en la banĉambron, antaŭ ol ŝi malfermis la pordon. La knabo neniam aŭdis pri Addis Abeba, kaj li devis telefoni al la telefonstacio kaj atendi dum oni serĉis la fremdan nomon. Fine li ricevis la prezon, kun enkalkulita respondo. Dudek vortojn — estis ja eble, ke ili havis gravajn sciigojn pri abisenaj anseroj, diris Rodney. Li donis al la knabo monbileton kaj diris: "Retenu la ŝanĝmonon."

La gnomoj en la banĉambro surmetis la pupvestojn, kiuj al ili taŭgis tre bone. Ili kuŝiĝis en la korboj, kiuj estis metitaj proksime al malfermita fenestro, ĉar ili klarigis, ke ili tre ŝatas freŝan aeron. Elizabeto verŝis iom da citronosuko el la termosoj en glason kaj metis la botelon apude, tiel ke ili povos plenigi ilin je bezono. Gnomoj devas nome trinki sufiĉe ofte, pro tio, ke ili havas tiel malgrandajn stomakojn. Ili diris, ke la citronosuko sufiĉe similas al nektaro.

Poste ĉiuj enlitiĝis — almenaŭ fariĝis silente en la ĉambro. Glogo eble kuŝis kaj pensis pri la praa ĉagreno, sed pri tio la aliaj ne sciis. Kaj vespera venteto igis la fenestrajn kurtenojn malrapide flirtadi, kaj sube sur la strato la trafiklumoj lumis intermite flave, ruĝe kaj verde dum la tuta nokto. Bobo sonĝis, ke li svatas viglan junan gnominon ĉe la piedo de giganta mamutarbo. Elizabeto sonĝis, ke ŝi vizitas parlamentan kunvenon ĉe la anseroj, kiuj provas kompreni, ĉu ili estas blankaj aŭ nigraj kaj promesis al ŝi dekduon da tegmentaj latoj, se ŝi promesas voĉdoni por ili.

Kiam komencis heliĝi, la gnomoj vekiĝis kaj gustsuĉis sian nektaron kaj singarde flustris unu kun la alia ĝis la granduloj finis sian teruran ronkadon. Rodney iris al la telefono kaj demandis pri telegramo, kaj tute prave, la rapidega animo de

la elektro jam estis reveninta kun la respondo de Addis Abeba. Rodney laŭtlegis la sciigon: "Jes, ni havas anserojn de ĉiuj specoj en Abisenio, same kiel en Kalifornio. Al kiu speco apartenas vi? Jones, konsulo."

"Tion mi devus esti kompreninta," diris Rodney. "Anseroj ekzistas en la tuta mondo."

Kvina ĉapitro

En kiu la anseroj ekveturas

Rodney telefonis denove kaj ordonis, ke la gnomaŭto estu metita antaŭ la hotelenirejon.

La reĝajn abisenajn anserojn oni zorgeme enpakis, ĉiun en propra korbo. Rodney portis la korbojn al la hotelvestiblo kaj atendis, dum la direktoro kontroligis la ĉambrojn por esti certa, ke nek la tapiŝoj nek la mebloj ekhavis difektojn. Elizabeto staris apude, iom malbonsenta. Kiam ŝi pli frue aperis aŭ forlasis hotelon, ŝi ĉiam havis la havaĵojn pakitaj en belaspektaj ledaj valizoj kaj la servistoj portis ilin por ŝi, sed nun ŝi havis ĉion en la manoj, pakita en papersakoj.

Ŝi esperis, ke neniŭ atentis ilin. Sed estis vana espero en Kalifornio, kie homoj havas viglan intereson por ĉio nova kaj fremda. Vervfreŝa juna viro sidis en seĝo en la vestiblo, kaj tuj, kiam li ekvidis Rodneyon, li ekstaris kaj aliris lin.

”Ĉu sinjoro Sinsabow?” li demandis.

”Hm — jes,” respondis Rodney, kiu tuj komprenis, kiu danĝero minacas lin.

”Oni diris al mi, ke vi havas anserparon en tiuj korboj.”

”Hm — jes,” respondis Rodney denove.

”Mi estas ĵurnalisto de *La Vespera Trumpeto*, nia loka urba gazeto. Ĉu mi eble povas vidi ilin?”

”Mi bedaŭras,” respondis Rodney, ”sed ili estas strikte konfidencaj.”

”Ĉu mi rajtas demandi kial?”

”Nu, jes, ili estas tre maloftaj kaj altvaloraj.”

”Sed ne povas difekti ilin, se mi ĵetas rigardon al ili?”

”Jes, bedaŭrinde. Vi komprenas, ili estas el Abisenio, ne el Hollywood. Ili ne ŝatas publikecon.”

”Tiaokaze neniuj iam ajn povos rigardi ilin.”

”Neniuj krom mia nevino kaj mi.”

”Ĉu vi mem prizorgas ilin?”

”Kompreneble.”

”Vi ja diris, ke ili estas abisenaj anseroj? En kiu rilato ili estas aliaj ol amerikaj anseroj?”

”Ili estas abisenaj. Estas grandega diferenco inter abisenaj kaj amerikaj anseroj.”

”Tion mi komprenas. Sed en kiu maniero?”

”Unue ili estas ja reĝaj. Kaj en nia lando ni ja ne havas reĝojn.”

”Ho jes. Ĉu vere? Kiel interese. Ĉu mi rajtas demandi, ĉu ili estas speciale inteligentaj?”

”Tion oni povas diri. Ili povas mem eniri siajn korbojn kaj ree elsalti, kaj ili anoncas, kiam ili malsatas.”

”Kiel ili faras tion, sinjoro Sinsabow?”

”Ili faras sonojn. Sonas kiel se ili parolus. Jes, fakte ili vere parolas. Ili parolas gnome.”

Elizabeto komencis subridi kaj la juna viro rigardis riproĉe al ŝi, kiel se li kredus, ke ŝi mokas lin. Ŝi reprenis rapide normalajn trajtojn, kaj diris ĝentile:

”Ili estas la sola paro en tuta Usono. Almenaŭ ili timas, ke ne ekzistas aliaj.”

”Ĉu vere,” diris la ĵurnalisto. ”Ili certe rakontis al vi per gnomo, mi komprenas. Mi komprenas, ke vi kaj via onklo mokas min, sed se vi estus afablaj kaj permesus al la reĝaj

moŝtoj paroli kun mi, ili certe donus al mi bonan historion per konsiderinde malpli da vortoj.”

Al tio Rodney solene respondis:

”Ili estas tre imponitaj de la Kalifornia pejzaĝo, kaj ili opinias, ke vi havas la plej ĉarman klimaton en la mondo. Tion vi povas diri, per kiom da vortoj vi deziras.”

”Ili preferas do Kalifornion al Abisenio?” la ĵurnalisto skribis rapidege.

”Jes absolute. Ili ne povas imagi, ke iu emus reiri. Ili estas ankaŭ tre imponitaj de la ŝoseoj. En ilia hejmlando tiaj nome estas tre maloftaj.”

”Nun la aferoj komencis moviĝi. Ĉu mi rajtas demandi, kiel reĝaj abisenaj anseroj vere aspektas.”

”Tion vi povas rakonti, Elizabeto,” diris Rodney, kaj nun Elizabeto devis pensi rapide.

”Mi preskaŭ kredas, ke ili estas iom pli malgrandaj ol niaj amerikaj anseroj.”

”Kian koloron ili havas?”

”Ili estas tute blankaj, sed krome ili havas oran kronon sur la kapo kaj helruĝajn vangojn. Ili portas etajn brunajn ĉapojn.”

”Tre strange. Ĉu ili havas la ĉapojn sur la krono aŭ inverse?”

”Mi ne konas la signifon de tiu lasta vorto,” Elizabeto diris, kaj Rodney respondis anstataŭ ŝi:

”Estas kutimo en ilia hejmlando.”

”Ili do estis ekipitaj tiamaniere, kiam vi ricevis ilin. Mi esperas, ke vi povas rakonti iom, kiel vi ...”

”Ne, tion mi fakte ne povas.”

En la sama momento revenis la hotela gvidantaro post la

inspektado de la ĉambroj, kaj ĉar ili estis trovitaj en la plej bona ordo, Rodney pagis la kalkulon kaj ekiris. La juna viro de *La Vespera Trumpeto* sekvis lin tra la vestiblo kaj al la gnomaŭto kaj demandis, ĉu li ne povus ricevi la plej etan aludon, kial la filo de la lignaĵomagnato kaj lia juna nevino estas tiel nevolaj montri la solan paron de reĝaj abisenaj anseroj en Usono.

”Ĉu vi iam estis en Abisenio, sinjoro Sinsabow?”

”Ĉu mi estis, Elizabeto?” demandis Rodney kaj malŝlosis la pordon de la gnomaŭto.

”Ne,” respondis Elizabeto tute decide.

”Vi estas ja filo de sinjoro Sinsabow, la granda lignaĵisto sur la nordokcidenta bordo, ĉu ne?”

”Ĉu mi estas, Elizabeto?”

”Li estas unu el liaj filoj.”

”Ĉu via patro estas interesata pri la anseroj?”

”Mia patro scias absolute nenion pri ili.” Tio venis de Rodney mem.

”Estas do via propra privata aventuro. Ĉu mi rajtas demandi, ĉu tio estas negoca afero?”

”Ne, ni faras ĉion tute en la intereso de la scienco. Jen eniru, Elizabeto.”

”Ho, vi faras do sciencajn eksperimentojn kun tiuj anseroj? Ĉu mi rajtas dem...?” —

”Mi estas vere malĝoja, sed mi vere ne havas tempon resti ĉi tie pli longe.”

”Ĉu vi ne povas permesi al mi plej etan videton de ili, sinjoro Sinsabow?”

”Vi devas pardoni al mi.”

Kaj Rodney tirfermis la pordon de la gnomaŭto, ordigis sin

sur la sidloko, startis la motoron kaj kun fina ĝentila rideto al la ĵurnalisto li glitis malantaŭen al la strato kaj rapide malaperis.

Elizabeto klinis sin antaŭen kaj malfermis la kovrilojn de la korboj kaj la pli juna gnomo elsaltis krevplena de demandoj:

“Kio estas *La Vespera Trumpeto*? Kio estas gazeto?”

Elizabeto volis scii, ĉu Rodney kredas, ke panjo vidos la artikolon. Rodney respondis, ke se estas iu idiota afero en la gazeto, trovigas ĉiam bona amiko, kiu sendos eltondaĵon.

Ili veturis laŭ la marborda vojo — ĉefvojo 101, estis skribite sur la ŝildo. Unue la montaj deklivoj estis kovritaj per arbaroj kaj en la valoj fluis ĉarmaj verdaj riveretoj. Poste fariĝis pli varme kaj la arbaroj en la deklivoj fariĝis pli maldensaj, kaj en la valoj kreskis fruktarboj. La gnomoj neniam aŭdis pri la ekzisto de tiaj arboj, malsovaĝaj arboj, kiujn la granduloj kulturas por propra bezono. Glogo estis pesimisma pri tiu manipulado. Li estis konvinkita, ke tio neniam povos konduki al feliĉa fino por tiuj arboj. Ne mirigis lin, kiam li aŭdis, ke la fruktarboj ofte estas atakataj de diversaj malsanoj, kaj ke ili tial jen kaj jen devas esti ŝprucataj per malbonodoraj kemiĉoj.

Baldaŭ ili venis al lokoj, kiuj fariĝis tre famaj pere de la libro “Luna valo” de Jack London. Rodney, kiu estis almenaŭ same bona kiel manlibro por vojaĝantoj, rakontis, ke Jack London estis fama aŭtoro, kiu ŝatis liberan vivon kaj ĉiujn sovaĝajn estaĵojn. Kiel ĉarme estus, se li estus renkontinta la gnomoj, kaj kiel fervore li estus stariĝinta je ilia flanko kontraŭ la “lignobonzoj”. Sed, ho ve! Jack London ricevis malfeliĉan finon. La ĉarma bienego, kie li revis pri feliĉo, estis divi-

dita en malgrandajn partojn, kaj la publiko estis invitita aĉeti romantikon laŭ kvadrataj metroj.

Ili remetis la gnomojn en la korbojn kaj restis en la urbo por aĉeti manĝaĵon. Rodney demandis pri filikaj semoj, sed montriĝis, ke tio estis varo, kiu ne troviĝas en la merkato. Li ricevis semojn por kanariaj birdoj, kaj li ricevis karvion, kiu estas uzata ĉe bakado, sed la gnomoj ne ŝatis tion. Ili kontentiĝis per la manĝaĵo de la granduloj, kaj ili klarigis, ke ili jam havis sian favoritmanĝaĵon. Viandon ili ne volis tuŝi en iu ajn formo — la penso pri murditaj bestoj estis por ili eĉ pli terura ol pri murditaj arboj, sed, male, ili tre ŝatis mordeti maturajn olivojn.

”Tute la ĝusta formato,” diris Bobo.

Ili tamen volonte ŝatus ion, kio similas al freŝaj ŝosoj, kiujn ili kutimis manĝi, tial Rodney aĉetis palan celerion, pri kiu ili estis tre dankemaj. Ĝi estis tiel bele konstruita, ke ili ĝojis preskaŭ same multe pri tio, kiel pri la delikata gusto. Ili ŝatis okupiĝi pri ĝi kaj fortiri unu trunketon po fojo, kaj kiam ili fine sukcesis, ili havis ion por mordeti dum pluraj horoj.

Ili venis al arbareto, kiu troviĝis ne tro proksime al la vojo, kaj tie ili sternis la plejdon kaj havis sian lunĉon, kaŝitaj por scivolemaj rigardoj. Tie d-ro Glogo, profesoro en psikologio de la arboj ĉe la Sekvoja universitato, prezentis tre interesan prelegon pri la arboj en tiu arbareto.

Li parolis kun ili kaj trovis, ke ili tute ne estis admirindaj. Li malaltigis la voĉon, kiam li rakontis pri ili; ne decidis ofendi iliajn sentojn, li klarigis. Ili estis tedaj kaj memkontentaj arboj, tute aprobantaj la etan mondon, kiu estas por ili la sola konata. Ili havas neniun senton por la sublimo — vivi dum kvindek jaroj, eble iom pli, estis ĉio, kion ili esperis, kaj la

penso, ke ili povas fali pro forta ŝtormo kaj esti hakitaj por brulligno, tute ne turmentis ilin. Ankaŭ ne la perspektivo faliĝi per hakiloj ne tuŝis ilin konsiderinde. Ili neniam aŭdis pri gnomoj, kaj plej multaj sovaĝaj estaĵoj en la arbaro estis al ili nekonataj. "Ili perdis siajn animojn," klarigis la profesoro de psikologio de la arboj.

Elizabeto opiniis, ke tamen tiuj arboj estas sufiĉe belaj, sed ŝi komprenis, ke ne taŭgas diri tion kaj limigis sin nur aŭskulti ĝentile, kiam la pli maljunaj parolis pri sciencaj aferoj. Glogo klarigis, kial murdo de arbaro estas tia katastrofo, ne nur por ĉiuj naturfenomenoj, sed ankaŭ por la granduloj. La arbaro estis kreita de Patrino Naturo por kunteni la teron kaj prizorgi, ke la akvo restu en ĝi, tiel ke la kreskaĵoj abundu.

La radikoj de la arboj formas komplikitan reton, kiu kuntenas la surfacajn tavolojn en kontentiga maniero. Sed kiam oni faligas la arbojn kaj la radikoj mortas, la tero forlaviĝas, kaj la montaj deklivoj iom post iom kalviĝas. Kaj poste ne estas eble restarigi la kreskaĵojn.

Nun Rodney ja disponis pri multajn sciojn, kiujn li akiris ĉe la universitatoj de la granduloj, kaj kiam la gnomoj rakontis ion, kio agordis kun liaj scioj, li tre miris.

"Kiel strange, ke vi ankaŭ scias tion," li diris.

Nun Glogo estis mirigita.

"Ni havis multajn jarojn por rigardi la naturon," li diris. "Vi ja ne kredas, ke ni ne vidas, ke la akvo forlavas ĉion dum sia vojo. Tion oni povas lerni rigardante la unuan plej bonan flukveton, kiu elfluas en montdeklivo kaj vidi la teron, kiun ĝi kunportas. Akvo movas sin ĉiam malsupren, neniam supren. Se oni eltiras arbon kun la radikoj oni vidas kvanton da tero forlaviĝi — la akvo fariĝas tute nigra de tio. Kaj oni vidas la te-

ron plusekvi la akvon ĝis novaj radikoj retenas kaj restigas ĝin. Tio estas afero, kiu daŭre okazas la tutan tempon. Ĉio forlaviĝas de la montoj, kaj nenio povas remeti ĝin.”

La spertoj de Glogo estas tute pravaj, ankaŭ laŭ la homaj spertoj, diris Rodney. Sed la problemo estas, ke ĉiuj homoj havas sian propran etan parton de la tersurfaco, ili faras, kion ili mem volas, sen pripensi la difekton, kiun ili kaŭzas por aliaj homoj aŭ siaj posteuloj.

Tio estis io, kion Glogo neniam pli frue aŭdis pri la granduloj kaj iliaj faroj, kaj li starigis multajn demandojn, kion la homoj faras kun la tero. Ju pli li aŭdis, des pli terure ŝajnis al li, ke unuopaj homoj povas posedi teron kaj fari kun ĝi kiel plaĉas al ili. Tia penso neniam naskiĝis ĉe gnomoj. La arbaro apartenas al ni ĉiuj kaj ĉiu, kiu faras ion por difekti ĝin, estas rigardata kiel frenezulo. Kian utilon vi havas de ĉiuj viaj scioj, se vi ne scias, kiel gardi mem la kondiĉojn por la vivo?

Rodney ofte kritikis la mondon, en kiu li vivis, kaj trovis malĝustaĵojn en ĝi, sed iamaniere li ne ŝatis, ke la gnomoj faras tion. Li provis trovi pravigojn por la homaj sensencaĵoj. Ili estis edukitaj tiamaniere — ili havis diversajn perceptojn, kaj ili ne scias, kiel ŝanĝi ilin. Ju pli Rodney klarigis, des pli ŝajnis, ke Glogo suferas, kaj Elizabeto pensis, ke tio ĉi ape-naŭ estas la plej bona maniero por kuraci malfacilan atakon de neŭrastenio. Sed la sola, kion ŝi mem sukcesis elpensi, estis regali al li konfititan cepon.

La gnomaŭto moviĝis denove. Nun ili venis al distrikto de golfoj, kaj tie estis multaj urboj kun nesovaĝaj arboj plantitaj laŭ la stratoj, sed arbaroj ne estis. Aspektis kvazaŭ la memoro pri arbaroj estis forviŝita de tiu mondo, kaj la maljuna gnomo fariĝis pli kaj pli malgaja.

Ili venis al la longa ponto super la markolo de Carquinez. La gnomoj devis sin kaŝi en la korbojn, ĉar ĉi tie estis ponto, kie oni postulas pagon por pasi, kaj se ili ekvidos la gnomojn ekestus problemo konstati, kiom da gnomoj samvaloras unu personon. Kiam la danĝero estis for, ili ree elsaltis kaj miriĝis pri ĉio, kion la granduloj povis eltrovi kaj kiel kuraĝa la gnomaŭto estis, kiu povas veturi alte en la aero super profunda rivero.

Ili venis al urbo, kaj poste al ankoraŭ alia. Ŝajnis esti unu sola senfina urbo, kiu daŭriĝis laŭ pluraj kilometroj de la vojo, kaj tie estis multaj strangaj aferoj, kiujn la gnomoj neniam pli frue vidis. Estis gigantaj domkonstruaĵoj el kiuj kelkaj estis faritaj el murditaj arboj, aliaj el ŝtonoj rompitaĵoj el la koro de la tero. La kvietita paco de la arbaro estis anstataŭigita per blekantaj aŭtosignaloj, tintantaj biciklosonoriloj kaj akraj voĉoj, kiuj elkriis siajn varojn. Estis evidente, ke la streĉo de la granduloj kaŭzis puran frenezaĵon, diris Glogo, kaj poste li kuŝiĝis en la korbon kaj fermis siajn lacajn okulojn.

Bobo rapidis de unu flanko de la aŭto al la alia — dum gajaj elvokoj pri unu aŭ alia interesa afero, kiel infano — li havis ja nur cent jarojn. Preterpasantaj homoj vidis lian vizaĝon tra la vitro. Sed la gnomaŭto rapidis daŭre, kaj tie ili staris gapan-te kaj mirante — ĉu estis pupo, simio aŭ nano el cirko?

El la urbo denove, la ŝoseo serpentumis super montetoj, kiuj estis nudaj kaj glataj kvazaŭ homaj korpoj. Ili jam komencis bruniĝi pro la varmega suno, kaj Glogo voke kriis, ke la kaŭzo estas, ke oni faligis la arbojn, kaj la montetoj laviĝis per akvo, tiel ke ili aspektas kiel kriplaj homaj korpoj, averto al ĉiuj arbomurdantoj.

”Mi dubas, ke iam kreskis arboj sur ĉi tiuj deklivoj,” diris Rodney. ”Ĉi tie certe ne estas sufiĉe da akvo.”

Sed Gogo demandis, ĉu la homoj ne povus konduki akvon al la montetoj? Kial ili uzas ĉiun sian scion por detrui la naturon anstataŭ por savi ĝin?

Ili nun atingis la valon San Joaquin, kiun ili sekvis preskaŭ rekte dum pli ol cent kvindek kilometroj. Tie estis seninterrompa sinsekvo de fruktĝardenoj kaj vinberejoj kaj kampoj por utilaj manĝokreskaĵoj. Ĉi tie oni ne povis esperi trovi gnomojn.

Komencis fariĝi varmege, ĝuste tia seka bakforna varmege, kiu taŭgas por vinberoj kaj prunoj. Glogo tamen ne estis kutimiĝinta al tio, la brulanta varmega suno ekscitis liajn okulojn, kaj li sopiris al la malvarmeta krepusko en la sekvojaj arbaroj.

Iom poste la gnomaŭto haltis ĉe kiosko ĉe la vojrandoj, kaj Elizabeto, kiu ekhavis brilan ideon, eliris. Kiam ŝi revenis, ŝi kunportis kvar etajn montojn da malvarmo, ĉiu envolvita en buŝtuko el papero, kaj la plej maljuna vivanta usonano estis invitita konatiĝi kun unu el la plej novaj usonaj eltrovaĵoj, la glaciaĵa konuso.

”Ĉi tio estas vere bonega eltrovaĵo,” konfesis Glogo, kiu sidiĝis en sia korbolito kaj lekis sian glaciaĵon per sia lango. El kio ĝi estas farita? Kaj kiu sorĉarto transformis ĝin en neĝon meze de monato majo? Ĝia gusto iom similis al la dolĉa sekrecio de afisoj, sed kiel ĝi fariĝis tiel bele helruĝa? Kaj el kio estas farita la eta bruna ujo? Kaj kial ĝi fluis laŭ la randoj?

”Tio dependas de tio, ke vi ne manĝas sufiĉe rapide,” klarigis Elizabeto. Glogo respondis, ke ne estas tre facile, se oni

estas malgranda gnomo kaj krome ne estas al kutimiĝinta frostiĝi interne. Bobo forlekis la glaciaĵon tuj kiam ĝi komencis flui kaj li reĝe amuziĝis. Ĉiun novan eltrovaĵon kun kiu li konatiĝis, kiun la granduloj faris, li trovis pli bona ol la antaŭa.

La nelacigebla gnomaŭto rulis en la urbon Fresno, kaj tie oni haltis por havigi kion oni bezonas por vespera manĝo. Rodney aĉetis vesperan gazeton por kontroli ĉu eble estis skribita io, ekzemple ke oni trovis gnomojn en Kalifornia arbaro. Ion similan li ne trovis, sed post hazarda rigardo sur la unua paĝo, li reiris ridetante al la gnomoj. Li apenaŭ povis atendi ĝis oni venis ekster la urbon por laŭtleĝi la historion por siaj pasaĝeroj.

HEREDONTO DE LIGNAĴA REĜO HAVAS ANSEROJN KIEL DOMBESTOJN

*La sola paro de reĝaj abisenaj anseroj en Usono
faras aŭtoveturon.*

La entreprenema juna ĵurnalisto estis kaptinta la okazon de sia vivo en tiu intervjuo. Li estis reirinta al la redaktejo, kie li skribis bonhumoran fantaziprodukton pri la juna milionulo, kiu en mistika maniero sukcesis havigi al si paron da reĝaj abisenaj anseroj kaj kunprenis ilin al saniga kaj eduka aŭtoveturo.

La ĵurnalisto verdire ne tro multe troigis. Li komunikis, ke la anseroj, krom esti reĝaj ankaŭ estas sanktaj, ke ili en rekta linio devenas de tiuj anseroj, kiuj iam per sia blekado savis Romon de la gaŭloj. Laŭ li Rodney ne nur diris, ke ili povas diri, kiam ili malsatas sed ankaŭ, ke ili povas partopreni en interparoloj. Krome Rodney ne nur diris, ke la anseroj en

Abisenio portas ĉapojn kun sunŝirmilo, li ankaŭ sugestis, ke ili estis elkovitaj kun tiuj ĉapoj.

Mallonge dirite, la ĵurnalisto estis liverinta ĉion, kion vigla fantazio povis "kunkui" el la mallonga intervjuo, kaj lia sukceso estis pruvita per tio, ke unu el la grandaj novaĵperantoj akceptis la historion kaj distribuis ĝin pluen. Tio signifas, ke ĝi nun aperis en centoj da aliaj gazetoj en la tuta lando, kaj ke milionoj da homoj ĝuste nun ĝuis ĝin.

Unue Rodney devis klarigi al Glogo kaj Bobo, kiaj magiaj aranĝoj ekzistas por helpi al la novaĵperantoj kaj ebligi, ke historio, kiu naskiĝas en norda Kalifornio en la mateno povas esti legata en meza Kalifornio en la posttagmezo kaj eble en la alia flanko de la tero venontan posttagmezon. Kiam li estis finklariginta, la heredonto de la lignaĵreĝo havis iom da tempo por cerbumi, kaj en la venonta urbo li haltis kaj petis helpon de magia animo nomata "telefono". Komence li metis monerojn en fendon, kaj sonorilo tintis. Momenton poste li diris:

"Petunia, ĉu vi jam legis la posttagmezan gazeton?"

"Ne, Rodney. Kio okazis?"

"Estas historio pri ni en ĝi."

"Ho, kara dio! Nenio malagraba, mi esperas?"

"Ne, nur amuza historio. Vi komprenas, la profesoro kolektis amason da altvaloraj provaĵoj. Li konservas ilin en du korboj kaj li nepre volas eviti ĉiun publikecon pri sia laboro. Kiam ĵurnalisto provas elflari, pri kio temas, mi respondas, ke ni havas paron da anseroj en la korboj."

"Anseroj?"

"Mi elĵetis la unuan vorton, kiu flugis en min, kaj la ĵurnalisto havis multan ĝojon de tio. Estas nenio danĝera, sed mi

pensis, ke paĉjo eble ne komprenos, kaj tial mi demandas, ĉu vi povus klarigi la aferon al li, Petunia?”

”Tion mi faros. Kiel fartas Elizabeto?”

”Ŝi staras apude.”

Elizabeto prenis la telefonon kaj diris: ”Ho, panjo, ni faras agrablege. Ni veturis tra vere mirindaj lokoj, kaj mi lernis ĉion pri arboj kaj arbarflegado kaj kiel oni konservas la naturon — vi ne povas imagi, kiel bonege ni fartas.”

”Mi ĝojas aŭdi tion, sed panjo malhavas vin terure.”

Kaj poste ŝi aldonis:

”Nu, mia kara, amuziĝu kiel eble, sed pripensu, ke vi devas manĝi sufiĉe, kaj estu singarda, ke vi ne venu en fulmotondron, vi scias, ke mi malŝatas fulmotondron.”

Elizabeto emis diri: ”Ja ne estos vi, kiu venos en la fulmotondron, panjo,” sed ĉar ŝi estis saĝa knabino dekdujara, ŝi diris:

”Ne timu, panjo. ni estos tre-e-e singardaj. Ĉaŭ, panjo!”

Sesa ĉapitro

En kiu la serĉado daŭras en la altaj montoj

La gnomaŭto rapidis suden laŭ la enlanda vojo. Ĉi tie ne estis arbaroj, tial ili atendis ĝis mallumiĝo kaj svingis poste sur apudvojon kaj elektis konvenan lokon, kie ili povis pretiĝi por vespermanĝo. Kiam alia aŭto proksimiĝis, ili vidis de longa distanco la lumon de la lanternoj, kaj tiam la gnomoj malaperis sub la plejdo kaj frandis en la mallumo siajn celeritrunketojn ĝis la danĝero pasis.

Ili veturis pluen ĝis estis tempo por enlitiĝi kaj haltis poste en urbo, same kiel en la pasinta vespero. Rodney eniris la hotelvestiblon kun du korboj, sekvata de Elizabeto kun la resto de iliaj posedaĵoj en eleganta valizo, kiun ŝi estis aĉetinta. Rodney diris, kiajn ĉambrojn ili deziras kaj skribis iliajn nomojn en la gastlibron. La hotelpordisto turnis la libron, legis la nomojn kaj montris poste la rideton, kiun li ordinare rezervis por gvidaj ŝtatestroj kaj filmsteloj.

”Sinjoro Rodney Sinsabow! Estu kore bonvena! Kaj tie ni havas la reĝajn abisenajn anserojn?”

”Jes,” diris Rodney rezignite.

”Tre interese,” diris la pordisto. ”Mi ĵus legis la historion en posttagmeza gazeto.”

Esti laŭdata povas kaŭzi malfacilaĵojn, sed tio ankaŭ povas porti favoron. La gazetartikolo komunikis, ke la anseroj estas bonedukitaj kaj neniam misuzas la gastamon de la hoteloj. La

pordisto ne bezonis voki la direktoron, kaj Rodney ne devis subskribi paperojn.

”Tute male, estos por ni ĝojo disponigi la geedziĝfestan salonaron al vi, sinjoro Sinsabow, kaj ekstraj kotizoj ne estos. Estas honoro por ni havi vin kiel gasto.”

Oni gvidis ilin unu ŝtuparon supren al vico kun grandaj bone aerumitaj ĉambroj kun skulptitaj cignoj.

”Mi bedaŭras, ke ni ne havas litojn kun anseroj,” diris la pordisto, kiu kuniris kun la servoknabo por eskorti ilin. Ambaŭ restis en la ĉambro kaj ne povis kaŝi sian scivolemon, ĝis Rodney asertis al ili, ke li kun sia nevino sen malfacilaĵoj povos malfermi la korbojn, dum li samtempe donis kelkajn monerojn al la servoknabo, por ke li foriru.

Ili subentiris la persienojn, fermis la pordon kaj eligis la gnomojn el iliaj kaŝejoj, kiam la telefono sonoris kaj Rodney respondis:

”Ne, mi bedaŭras. Klarigu al la juna viro, ke mi veturigas aŭton la tutan tagon kaj ne povas konsenti pri intervjuo ĉi vespere.”

Sed tio ne sufiĉis. La telefono denove sonoris, kaj ĉifoje estis la juna viro mem.

”Lasu min klarigi, sinjoro Sinsabow. Ni ricevis precizajn ordonojn el Novjorko sekvi la evoluon de ĉi tiu historio kie ajn ni povas trovi vin. Ĝi fariĝis granda sensacio — la tuta lando deziras scii pli multe pri viaj anseroj. Ĉu mi ne povas vidi ilin, sinjoro Sinsabow, aŭ almenaŭ vi rakontu pri ili? Estos por mi malfeliĉo, se mi lasas ĉi tiun historion pasi el miaj manoj. Se mi ricevas nenion de vi, mi devos tute simple mem krei historion.”

”Skribu kio ajn vi volas,” diris Rodney kun la grandioza senzorgeco de riĉa viro.

Poste li petis al la telefona centralo, ke ili ne tralasu plurajn telefonvokojn, kaj li pendigis sur la porda anso ŝildon kun la teksto: ”Ne ĝenu!”

La gnomoj enlitiĝis freŝigataj de elektraj aerumiloj, kaj Elizabeto, kiu dormis sola en sia ĉambro sub alia aerumilo, sonĝis, ke la reĝaj abisenaj anseroj flugis reen al la hejmlando.

Mateniĝis. Estis varmega mateno, kio estas tute ordinara en interna Kalifornio, kaj kiu antaŭsignas pli varman tagon kaj vinberrikolton, kiu signifos katastrofan falon de la prezoj. Rodney rigardis tra la pordo kaj vidis, ke la atentema hotel-servistaro metis gazeton antaŭ ĉiu pordo. Li prenis sian ekzempleron, kaj tie estis artikolo, kronita de giganta titolo, kiu okupis la tutan unuan paĝon:

***LA REĜAJ ABISENAJ ANSEROJ GASTAS
NIAN URBON. LA HEREDONTO DE GRANDA
LIGNAĴENTREPRENO PERMESAS AL NIA
ĴURNALISTO VIDI SIAJN TREZOROJN***

Montriĝis, ke la juna ĵurnalisto prenis Rodneyon laŭvorte kaj skribis tute kion li volis — kaj ne estis malmulto, kion li volis. Li diboĉe priskribis, kiel li ricevis permeson viziti la edziĝoĉambraron de la hotelo kaj kiel li vidis la abisenajn anserojn en la banujo — laŭ li ili pasigis la tutan tempon naĝante en la banujo, kaj tie ili ankaŭ dormis kun la kapo sub la flugilo.

Poste sekvis multvorta priskribo de la belaj orflavaj kvasoj, kiujn ili havas sur la kapoj kaj la helruĝaj plumoj sur la

vangoj. La ĵurnalisto rakontis, kiel ĉarme ili balancetas la vo-
tojn — unu balanceto signifis ”mi ŝatas vin”, du balancetoj ”mi
ne ŝatas vin”, tri rapidaj balancetoj ”iru arbaren.”

La eleganta kaj simpatia heredonto en la lignaĵa familio
daŭre rifuzis malkaŝi la sekreton, kiel li sukcesis ricevi tiujn
valorajn bestojn. Li kolektis la ovojn, de kiuj la anserino ĉiun
matenon metis unu sub la liton. La nevino konservas la ovojn
en saketo, kaj kiam ili estos dek tri, kio estas sankta reĝa nom-
bro en Abisenio, la anserino komencos kovi ilin. Sed ankoraŭ
ŝi ĉirkaŭveturas por vidi Kalifornion kaj esprimis en gnoma
lingvo sian grandan ĉarmiĝon pri tiu vinber- kaj prunlando.
Rodney klarigis, ke nur en suna vetero ŝi sukcesas eligi kom-
preneblajn vortojn kaj ke ŝi konstante babilis dum la veturo
tra la Joaquina valo.

La telefono sonoris, kaj estis la juna ĵurnalisto, kiu volis scii,
ĉu la historio kontentigis la heredonton. Rodney diris, ke ĝi
estas la plej bona scienca resumo, kiun li legis en usona ga-
zeto. La ĵurnalisto demandis, kien li survojas kun siaj trezo-
roj, kaj Rodney diris, ke tion la ĵurnalisto povas mem eltro-
vi. Fine la ĵurnalisto volis scii, ĉu li povus ricevi foton de Rod-
ney, kaj li diris: ”Vi povas uzi la bildon de la guberniestro,” kaj
remetis la telefonilon.

Ili mendis matenmanĝon kun kafo kaj rostita pano kaj
marmelado por Rodney, lakto kaj oranĝa suko kaj maizaj flo-
koj por Elizabeto — tute kiel ŝia panjo volas, ke ŝi manĝu.
Dum la gnomoj prenis etajn partojn de rostita pano kaj trem-
pis ilin en marmelado, la telefono denove sonoris, kaj estis
ĵurnalisto de novaĵagentejo, kiu komunikis, ke la ĉefagente-
jo en San Francisko per telegramo petis plurajn detalojn.

Rodney diris, ke li profunde bedaŭras, sed li bedaŭrinde ne

kunhavas detalojn, post kio li remetis la telefonilon kaj ordonis al la hotelservistaro, ke ili ne plu tralasu telefonvokojn al li.

Kelkajn minutojn poste aŭdiĝis frapoj sur la pordo — estis bileto de la ĵurnalisto, kiu insiste petis, ke li almenaŭ informu, kion la reĝaj abisenaj anseroj manĝas. Rodney skribis sur la sama paperslipo: "Por matenmanĝo marmelado kaj rostita pano, por lunĉo kaj vespermanĝo celerio kaj glaciaĵo."

Ili pakis siajn valizojn kaj korbojn kaj kuraĝis iri malsupren en la vestiblon, kie amaso da homoj atendis por vidi ilin, inter ili tri fervoraj junaj viroj kun grandaj nigraj skatoloj. Ili petis permeson fari foton de la anseroj, kaj Rodney lasis al Elizabeto pagi la fakturon, dum li mem gardis la korbojn, por ke la trofervoraj fotistoj ne havu okazon ŝteli ilin. Ili petis Rodneyon kaj Elizabeton stariĝi por fotado, kvazaŭ ili estus filmmagnatoj aŭ diplomatoj ĵus aperintaj el Eŭropo. Rodney tamen ne volis pozi, tial ili fariĝis fotitaj, kiam ili pasis la vestiblon kaj iris pluen al la gnomaŭto, kiu atendis sur la strato.

Tio kaŭzis eĉ pli grandan popolamasiĝon — estis kvazaŭ cirko estus veninta en la urbon. Tuj kiam la gnomaŭto ekmoviĝis kaj rulis laŭ la strato, Bobo volis veni el la korbo por demandi pri fotiloj kaj fotistoj, sed Rodney diris, ke li devas atendi.

Li veturis laŭ la ĉefstrato, kaj Elizabeto demandis, ĉu tio ne estas malĝusta vojo? Li respondis, ke li kredas, ke ili estas observataj, kaj poste li veturis per granda rapideco tien kaj reen en la urbo kaj turnis en la stratanguloj tiel abrupte, ke la gnomoj fariĝis sufiĉe priskuitaj. La tutan tempon li kontrolis en la malantaŭa spegulo. Elizabeto turnis sin kaj rigardis tra la malantaŭa fenestro, kaj jes, tie ŝi vidis aŭton kun du viroj, kiuj

sekvis ilin. Ĉiam, kiam ili turnis ĉe stratangulo, la sekvantoj faris la samon.

Rodney veturis fojon post fojo sur la ĉefstrato en lokoj kun trafiklumoj. Subite li havis ŝancon preterveturi straton, tuj antaŭ ol la ruĝa lumo venis, kaj ĉiuj aŭtoj malantaŭ li devis halti. La aŭto kun la ĵurnalistoj ankaŭ devis atendi. Rodney daŭrigis per granda rapideco kaj turnis ĉe pluraj stratanguloj ĝis li estis certa, ke li liberiĝis de la ĵurnalistoj. Poste la gnomoj estis ellasitaj kaj Rodney klarigis al ili la misteron de gazetaj fotoj kaj gazetartikoloj kaj ankaŭ la signifon de trafiklumoj.

Baldaŭ ili venis en la montaron kaj veturis laŭ la vojo al nacia parko Sierra. Jen denove estis arboj, veraj arboj, kiuj meritis la atenton de miljara gnomo. La intereso de Glogo vekigis kaj li ekstaris. La vojo serpentumis supren, konstante supren al montpasejoj. Glogo montris jen unu arbon jen alian, herooj de pasintaj jarcentoj. Li povis legi la historion pri ilia centjara batalo kontraŭ la elementoj kaj deĉifri iliajn animojn. Tiuj arboj estis streĉitaj kaj minacataj. Ili ne eĉ por momento forlasis sian penon serĉi materialon kaj konstrui defendon kontraŭ venontaj ŝtormoj. Troviĝis nek ripozo, nek sekureco en la montaro. Malsupre en la valoj fluis murmuretantaj riveretoj kun klara kaj malvarma akvo, kiuj ekzistis, kiam oni lasis la arbarojn resti kiel la naturo kreis ilin. Kiom la gnomo povis rakonti pri kio okazis en tiuj krutvaloj kaj sur la belaj, arbarornamitaj herbejoj — kion la herboj sentis kaj kion la floroj kaj herboj diris unu al la aliaj en sia propra lingvo. Jen Glogo fakte fariĝis profesoro pri psikologio de arboj, kiel Rodney nomis lin.

La gnoma aŭto rulis en la unuan mamutarban arbaron. Tie

ili staris, maljunaj monstroj, de tempoj longe antaŭ la tempo de la praavo de Glogo, pluraj el ili kun pli ol dekmetra diametro — kaj ne ĉe la bazo sed pli supre. Ili ne estis same altaj kiel la sekvojoj, sed pli fortaj — veraj montoj el ligno. En la tempo de pterodaktiloj kaj dinosaŭroj la tuta nordokcidenta parto de la amerika kontinento havis tiajn arbojn. Nun restis nur kelkaj miloj, kaj ili kreskis en protektitaj naciaj parkoj. Ilia arbosuko estis venena por insektoj kaj aliaj malutilaj bestoj.

Ili estis sekuraj por ŝtormoj, ĉar iliaj branĉoj estis rompigemaj kaj povis forblovi kaj esti anstataŭitaj per novaj dum la paso de la jarcentoj.

La sola danĝero por ili estis fajro. Sur la trunkoj de multaj el tiuj gigantoj oni povis legi la historion pri ilia batalo kontraŭ la plej timiga malamiko. Ilia ŝelo estis fermalmola, kaj la fajro ne facile fiksiĝis en ĝi, sed la subkreskaĵoj ĉirkaŭ ili ekflamis kaj faris truojn en iliaj bazoj.

La arbosuko komencis boli kaj difektis la korojn de la arboj. Sed la potenca trunko daŭre restis staranta kvankam malsolida, kaj la suko trovis la vojon supren sub la ŝelo kaj donis nutraĵon al la branĉoj plej supre. Oni povis vidi detruitan arbon, sur kiu restis nur mallarĝa strio da ŝelo, ne pli ol tridek centimetroj larĝa, sed ĝi atingis ĝis la pinto kaj nutriĝis unu solan velkantan branĉon, lasta signo de arbovivo.

Oni estis indulgema al la arboj, kiam oni konstruis la vojon. Ĝi serpentumis inter la arbojn, kelkfoje tiel proksime, ke ĝi tuŝis la plej ekstreman finon de la radikoj. Oni povis etendi la brakon kaj per la mano tuŝi la trunkon, kiam oni preterpasis. Foje la vojo pasis tra fajrovundita arbo. Estis travivaĵo, pri kiu turistoj kutimis rakonti, kiam ili venis hejmen. Estis

sufiĉe da spaco por la gnomaŭto, kaj krome por tuta kompanio de gnomoj, — sed gnomojn oni ne povis vidi. Estis ankaŭ malfacile kompreni, kie ili povus sin kaŝi, la subkreskaĵoj nome estis forigitaj por limigi fajrominacon. La mamutarboj ne kreskis el mortintaj trunkoj kiel la sekvojoj. Ĉiu eta arbo venas el semo, kaj la semo ne povas evoluigi inter la ŝtonsplitoj, kiuj kovras la teron de post la komenco de la mamutarba tempo.

Estis rava veturo, estis senĉese io nova kaj interesa por rigardi, sed bedaŭrinde neniu gnomoj. Ili pasis arbaron post arbaro, ĉe la ĉefvojo same kiel ĉe malpli trafikataj vojoj. Ili eliris kaj Rodney portis la korbojn en la arbarojn kaj liberigis siajn amikojn. La etaj gnomoj serĉis kaj serĉis, sed sen rezulto.

Rodney parolis kun arbargardisto kaj demandis pri arbaroj kaj herbejoj troveblaj iom for de grandaj vojoj. Ili pasigis tutan tagon vizitante tiujn lokojn, kaj Glogo fariĝis pli kaj pli malgaja. Kiam krepuskiĝis kaj ili sidis en kvieta loketo kaj manĝis sian vespermanĝon, li diris, ke estas vane plu serĉi — verŝajne ne ekzistas gnomoj en la mamutarbaro. Li perdis ĉiun intereson pri citronsuko kaj pala celerio, por pano kaj fromaĝo, por maturaj olivoj kaj konfititaj cepoj kaj estis atakita de tiel malfacila atako de neŭrastenio, ke ili ne sciis, kiel al li redoni pli bonan humoron.

”Estas tre simplanime de vi perdi la esperon, Glogo,” diris Rodney. ”Ameriko estas grandega kontinento, kaj granda parto de ĝi estas kovrita de arbaroj. Rigardu ekzemple ĉi tiujn montetojn — ili etendiĝas tra centoj da kilometroj kaj sur ambaŭ flankoj kreskas arbaroj. Ni povus trovi gnomojn preskaŭ kie ajn en ĉi tiuj regionoj.”

Sed la patriarko de la gnomoj ne lasis sin konsoli. Ĉiuj liaj

parencoj ĉiam loĝis inter la grandaj arboj. Se ili trovas gnomojn en aliaj arbaroj, ili estos alispecaj — eble ili eĉ ne parolas la saman lingvon.

”Bobo kaj mi povos instrui ilin,” ekkriis Elizabeto. ”Estus ja interese.”

Bobo tuj konsentis. Li volonte edziĝus kun ĉarma gnomknabino, eĉ se ŝi parolus la sivaŝan lingvon, kiun liaj praŭloj estis aŭdintaj inter la indianoj.

”Sed eĉ se ni trovas ilin,” protestis Glogo, ”ili estus perditaj al la granduloj, kiuj regas la tutan teron kaj ŝanĝis ĉion. Ĉu entute troviĝas loko por gnomoj en viaj urboj — krom ke ili taŭgas kiel materialo por historioj en viaj gazetoj?”

”Mi estas certa, ke oni povus trovi por ili utilajn laborojn,” diris la optimista lignaĵheredonto. ”Mi petus de mia patro, ke li starigu rezervejon por gnomoj. Tie vi povus havi vizittagojn unu aŭ dufoje semajne, kaj krome vi povus vivi tute laŭ via propra deziro.”

”Mi ne volas dependi de bonfaro de iu homo. Sed nun vi vidas, kiel ni devas uzi vian afablecon, kiel vi devas lasi nin veturi kun vi en via gnomaŭto.”

”Ne, sed bona Glogo,” ekkriis Rodney. ”Tiel vi ne rajtas pensi. Ĉi tio estas la plej amuza ekskurso, kiun mi iam travivis.”

”Estas vere mirinda libertempo,” intervenis Elizabeto. ”Rodney sidis nur hejme legante librojn kaj ne sciis, kion fari.”

”Ĝuste tiel, Glogo. Mi tiel enuiĝis, ke malmulto mankis, ke ankaŭ mi estus trafita de neŭrastenio.”

Subite Rodney sciis, ke plej bona metodo igi la aĝan knabon forgesi siajn ĉagrenojn, estas rakonti pri la ĉagrenoj de iu

alia. Tial li faris longan priskribon pri ĉagrenoj de lignaĵheredonto, juna viro, kiu iun tagon devos heredi grandegan kapitalon, kaj kiu ne povas forigi tion el siaj pensoj.

”Mi volas rakonti al vi, mia amiko. Hejme troviĝas absolute nenio, kion mi povas fari. Troviĝas servistoj, kiuj havas ordonon ĉion fari, kaj se mi provus fari ion mem, mi nur malhelpus al ili, kaj tion ili ne ŝatus.”

”Kia stranga situacio,” diris la maljunulo, kiu komencis interesiĝi.

”Tiel estis tiel longe, kiel mi povas memori — ĉiam estas iu, kiu faras ĉion, kaj mi neniam povas fari ion mem.”

”Estas malfacile por gnomo kompreni ion similan,” diris la miljara gnomo. ”Ni ĉiam devis stari sur propraj piedoj, kaj ĉion mem fari.”

”Estas eble,” diris Rodney, ”sed se mi rajtas preni vin kun mi en ĉi tiu veturo, mi havas senton, ke mi povos doni ion al la scienco, kaj tio donas al mi multe pli da ĝojo ol ludi golfon kaj skribi poemojn, kiujn neniu legas.”

”Vi estas tre afabla,” diris Glogo. ”Neniu vivanta estaĵo, granda aŭ malgranda, povas probable fari pli multe por ĝojigi alian homon.”

Sen tro granda espero pri feliĉa rezulto, sed por renkonti sian amikon duonvoje, Glogo akceptis la inviton. Li volis ankaŭ fari sian plejblon por regi siajn atakojn de deprimiĝo kaj esti tiel agrabla kunvojaĝanto kiel eblas.

Tie ili do staris ambaŭ kaj riverencis unu al alia kvazaŭ du japanoj. Momenton poste ili sidis studante mapon kaj faris planojn por vizito en Yosemite por vidi, ĉu eventuale kelkaj gnomoj povas troviĝi en la arbaroj tie.

Sepa ĉapitro

En kiu la anseroj vizitas kosmetikan salonon

Ili reveturis al la ŝoseo. Kiam ili venis al nova urbo, Rodney haltis kaj aĉetis gazeton. Sur la unua paĝo estis raporto pri la aventuroj de la mateno kaj unu referaĵo pri la strangaj manĝkutimoj de la reĝaj abisenaj anseroj. Estis bildo de Rodney kun klinita kapo kaj unu de Elizabeto, kiu faris malbelan grimacon kaj unu de la guberniestro. Tie estis eĉ priskribo de la ĉasado de la gnomaŭto kun ekzaktaj sciigoj pri la rapideco, kiun Rodney atingis en la urbo — vere terure, se panjo ekscios tion. Estis priskribo de la aŭto kaj ĝia numero.

”Baldaŭ ili promesos rekompencon al tiu, kiu kaptos nin,” diris Rodney.

”Kion ni faru?” demandis Elizabeto, kiu ne povis helpi, ke ŝi opiniis, ke la furioza ĉasado estis streĉa kaj ankaŭ ŝatis vidi sian bildon en la gazeto. Rodney respondis, ke ili estonte devos veturi inkognite. Li klarigis, ke vizitantaj reĝuloj, kiuj volas malhavi societajn devojn, ofte veturas sub falsa nomo. Se tio konvenas al princoj kaj reĝoj, tiam ne povas esti maltaŭga por heredonto de lignaĵa reĝo.

Rodney klarigis, ke li de nun estas Jeremiah Titherton Jenkins el Kalamazoo, Michigan. Elizabeto opiniis, ke estas stranga nomo kaj miris, kiel Rodney trovis ĝin. Rodney respondis, ke oni devas elekti strangan nomon, alie povas okazi, ke vere ekzistanta persono havas ĝuste tiun nomon, kaj tiu persono povus esti ĉekfalsigisto aŭ serĉata pro bankrabo.

Elizabeto subridis pro ekscito.

”Kiu do estas mi?” ŝi demandis. ”Ĉu ankaŭ knabinoj rabas bankojn?”

Rodney diris, ke certe ekzistas rabistinoj, sed ke eble estas pli bone, ke ŝi prezentiĝu kiel lia filino aŭ eble lia guvernistino, kiel plaĉas al ŝi. Elizabeto diris, ke ŝi preferus esti Jacqueline Kennedy, sed Rodney ne kredis, ke tio estus granda helpo en iliaj provoj eviti gazetraportistojn.

Fine ili interkonsentis, ke Luzita Louice Jenkins estas bela kaj bonsona nomo, kiu ne sonas kvazaŭ ĝi apartenus al ĉek-falsigistino aŭ bankrabistino. Bobo decidis, ke ankaŭ li veturos inkognite. Inter la gigantaj mamutaroj estis unu, kiu nomiĝis Generalo Sherman, kaj Bobo do estos Generalo Sherman, ĝis kiam oni trovos ion pli bonan.

Sed estis tute maleble interesigi Glogon akcepti nomon de grandulo. Li ankaŭ ne aprobis, ke Bobo portu nomon de grandulo, eĉ ne nomon de generalo. Estis evidente, ke Glogo malvolonte vidis, ke Bobo ekhavis tioman intereson pri la privataj aferoj de la granduloj.

Estis tempo enlitiĝi, kaj ili haltis en urbo. Ili ne veturis per la gnomaŭto al hotelo, sed parkis ĝin en parkejo.

La aŭtopriversisto ŝajne ne legis la posttagmezajn gazetojn, kaj li donis la kvitancon sen komentariojn aŭ demandojn. Rodney prenis la du korbojn, Elizabeto portis la valizon, kaj ili paŝis preter la venonta angulo al hotelo. Rodney iris al la akceptejo kaj skribis ”Jeremia Titherton Jenkins, Kalamazoo, Mich., kaj Lucita Louice Jenkins, same, same” en la registrolibro. Poste li mendis, kiel kutime, du ĉambrojn kun komuna banĉambro.

La pordisto rigardis al la du korboj kaj diris: ”Mi petas par-

donon, sinjoro, sed ni ne permesas dorlotbestojn en la ĉambroj.”

”Mi ne havas dorlotbestojn,” respondis Rodney. ”La korboj enhavas antropologiajn provaĵojn.”

”Mi komprenas,” respondis la pordisto, sed ne aspektis, ke li vere estis kompreninta. Estu kiel ajn, li tamen petis la servoknabon montri al ili la ĉambrojn 317 kaj 319.

Rodney kondukis tre serioze kaj inde, kaj ne diris vorton pri fordonado de latoj. Ili ŝlisis la pordojn kaj aranĝis sin hejmece, kaj ĉifoje ne ĝenis sonantaj telefonoj, nek frapoj sur la pordo. Ĉiuj dormis bone kaj pace. Elizabeto songis, ke ŝi estas Jacqueline Kennedy, kiu faras triumfe ĝojan ŝtatviziton en Addis Abeba, la ĉefurbo en Abisenio.

”Bonan matenon, sinjoro Jenkins,” diris la ĝentila pordisto. ”Mi esperas, ke vi dormis bone.” Rodney asertis, ke tiel estis kaj pagis la kalkulon kaj repuŝis ĉiujn provojn de la servoknabo preni la korbojn kaj iri al la parkejo por havigi la aŭton. Ili iris sen akompanantoj kune en la straton. Rodney el-lasis elspiron de malstreĉiĝo kaj diris: ”Mi kredas, ke mi eble restos sinjoro Jenkins por la resto de mia vivo.”

Ili eniris la aŭton kaj Rodney veturis al aŭtoriparejo, ĉar li estis elpensinta planon por pli bona aranĝo por liaj du protektatoj. Unue la malantaŭa sidloko en la aŭto ne estis tiel alta, ke ili povis rigardi tra la fenestro sen stari sur ia pakaĵo. Due ili ofte puŝiĝis kontraŭ la plafonon, se la vojo estis kavoplena, kaj ĉe subita bremsiĝo ili estis ĵetataj de la sidloko sur la plankon. Rodney do deziris unu kroman sidkusenon por la sidloko, kaj li deziris ankaŭ kelkajn ringetojn fiksataj en la

aŭtovandoj kaj ŝnurojn, kiujn oni povas fiksi en tiuj ringoj, tiel ke la gnomoj havu apogon antaŭ la sidloko.

Rodney haltis antaŭ riparejo kaj viro alvenis. Rodney klarigis, kion li volas, sed kompreneble ne kial. La viro diris, ke li certe povos liveri taŭgan kusenon, sed eble ĝia koloro ne harmonios kun la remburajo en la aŭto. Rodney respondis, ke tio ne gravas, ĉar oni tamen kovros ĝin per vojaĝa plejdo.

Mekanikisto venis por ŝraŭbfiksi la ringojn, kaj Rodney prenis la korbojn kaj starigis ilin en la antaŭan sidlokon. Eble li traktis ilin tro singarde. Estu kiel ajn, la rigardo de la mekanikisto ŝanĝiĝis — liaj okuloj lumis per tiu speciala brilo, kiu igas la kompatindajn reĝulojn, kiuj veturas inkognite, senti la malagrablan veron, ke ili estas rekonataj. La mekanikisto iris por havigi iun ilon, kaj kompreneble li rakontis al la aliaj, kion li rimarkis. Baldaŭ staris tajpistino ĉe fenestro, kaj kelkaj aliaj el la dungitoj ŝajnis ne havi alian okupon ol prigapi la lignaĵheredonton kaj lian nevinon kaj la aŭton, kie la du reĝaj abisenaj anseroj sidis en siaj korboj sur la antaŭa sidloko, dum la malantaŭa sidloko altiĝis, tiel ke la anseroj povos ĝui la rigardon, kaj ŝnuro estis tirita antaŭ la sidloko, por ke ili ne falu. Ĉu oni povus imagi ion pli frenezan?

Kompreneble unu stratvaganto haltis por vidi, kio okazas, kaj poste ankoraŭ unu. La magiaj vortoj disvastiĝis fulmrapi-
de.

”La anseroj estas ĉi tie! La reĝaj abisenaj anseroj!”

Kaj homoj venis kuregante el butikoj kaj trans la strato, kaj fariĝis homamaso, kvazaŭ estus fajroakcidento aŭ revolvera prirabo.

Rodney kaj Elizabeto estis kaptitaj. Ili ne havis elirejon kun siaj korboj. Ili devis resti, kie ili estis, kaj kontroli la munta-

don de la kroma kuseno kaj la ĝustan lokigon de la ringoj — kaj provi aspekti kvazaŭ ili estus tute sensciaj, ke duondekduo da knabetoj rigardaĉas ilin tra la aŭtaj fenestroj.

Kaj fine la katastrofo estis kompleta — senhonta juna viro penetris tra la homamaso.

”Bonan matenon, sinjoro Sinsabow, mi estas ĵurnalisto de *La Vespera Fajrero*, nia loka gazeto. Vi ne povas imagi, kiel ĝojaj ni estas, ke vi vizitas nian urbon.”

”Kaj vi ne povas imagi kiel ĝoja mi estas, ke mi povos forlasi vian urbon,” respondis Rodney akre.

”Vi mendis diversajn ŝanĝojn en via aŭto? Kun penso pri la komforto de la anseroj, mi komprenas.”

La juna viro estis tiel ekscitita, kiel se li ĵus estus trovinta oron en Kalifornio:

”Ĉu mi rajtas demandi, kiujn ŝanĝojn oni faras? Unu kroma kuseno? Por ke la anseroj atingu pli alte, mi supozas. Ĉu ili ne havas sufiĉe longajn kolojn?”

”Jes, sed ili ne havas tiel longajn kolojn kiel certaj personoj, kiuj provas kapti ekvideton de ili.”

”Sinjoro Sinsabow, mi fakte petas pardonon pro tio, ke mi trudas min. Estas io, kion ni ĵurnalistoj ne povas helpi. Ni ricevas certajn taskojn — kaj ankaŭ mi devas vivi.”

”Fama viro iam diris: ’Mia sinjoro, mi ne povas kompreni, ke tio estas necesa’.”

Sed la ĵurnalisto ne estis retenebla. ”Vi metigas ŝnurojn antaŭ la malantaŭa sidloko? Certe po ke la anseroj ne difektigu. Ĉu ili estas difektitaj? Vi povus diri, ĉu ili jam estas difektitaj?”

”Ili fartis bonege, kiam mi laste vidis ilin.”

”Vi havas ilin en tiuj korboj, ĉu ne? Vi povus ja permesi al

mi rapidan rigardon, tiel ke mi tamen povus diri, ke mi vidis ilin?”

”Vi ĉiuokaze diros, ke vi vidis ilin. Do, kiel diferencas?”

”Mi komprenas, ke vi ne ŝatas ĵurnalistojn, sinjoro Sinsabow.”

”Ekzistas anekdoto pri viro, kiu trifoje estis elĵetita el restoracio. La lastan fojon li leviĝis kaj diris: ’Mi scias, kio estas la kaŭzo. Ili ne volas, ke mi estu tie endome.’ ”

”Sinjoro Sinsabow, estas unu afero, kiu ne estas priparolita en pli fruaj reportaĵoj pri viaj anseroj, kaj tio estas iliaj nomoj. Ĉar kompreneble ili ja havas nomojn?”

”Jes, kompreneble.”

”Ĉu mi rajtas demandi kiel ili nomiĝas?”

”La viransero nomiĝas Jeremia Titherton Jenkins kaj la anserino Lucita Louise Jenkins.”

Elizabeto subridis kaj mordis la lipojn por sufoki la ridon. La ĵurnalisto havis notlibron en la mano kaj skribis ardanta pro fervoro. Li ripetis la nomojn ”Jeremia Titherton Jenkins” kaj ”Lucita Louise Jenkins” dum li skribis.

Poste li diris:

”Tio ja ne estas abisenaj nomoj?”

”Ho, ne,” diris Rodney, ”ili estas tradukitaj.”

”Kaj kiel sonas iliaj originaj abisenaj nomoj?”

”Jacqueline Kennedy kaj Generalo Sherman.”

”Vi mokŝercas kun mi,” diris la ĵurnalisto.

”Absolute ne,” asertis Rodney.

La diskuto estis subite interrompita de alia viro, kiu penetris tra la homamaso portante unu el la timigaj nigraj skatoloj.

”Disiĝu, se mi rajtas peti,” li diris al la homoj. ”Mi devas havi bildon.”

”Karaj homoj, mi petas, absolute ne disiĝu,” diris Rodney.

La fotisto denove malaperis en la homamaso, li petegis kaj kriis, kaj fine li ricevis la deziritan lokon kaj suprenigis la fotilon.

En sia malespero Rodney kaptis dikan viron apude kaj metis lin antaŭ si. ”Prenu mian lokon,” li petis.

”Mi ne volas lin, mi volas vin,” kriis la fotisto.

”Sed mi volas lin,” Rodney klarigis decide.

La fotisto petis kaj petegis, ke la dika viro foriru, sed Rodney flustris en la orelon de la dikulo: ”Mi donos al vi dudek kvin dolarojn, se vi daŭre baros la vojon al la fotisto.” Kaj la dika viro restis.

Elizabeto jam iom timis pro tiu kriado kaj interpuŝado. Sed kiam ŝi vidis, ke Rodney skuiĝas pro rido, ankaŭ ŝi komencis ridi. La mekanikisto finis sian laboron kaj ŝajne ne emis daŭrigi. La kroma kuseno jam estis muntita, kaj Rodney decidis, ke nun sufiĉas.

Ankoraŭ kun la dika viro antaŭ si kvazaŭ ŝirmilo li petis la mekanikiston lasi la ringojn kaj ŝraŭbojn en la aŭto, pagis la interkonsentitan prezon kaj la dudek kvin dolarojn al la dikulo kaj petis Elizabeton enaŭtiĝi. Li levis la korbon de la sidloko, donis ĝin al Elizabeto kaj signalis por disigi la homojn.

La gnomaŭto ekmoviĝis kaj malrapide rulis laŭ la strato kun vosto da duondekduo da aŭtoj post si. Daŭris sufiĉe da tempo antaŭ ol ili liberiĝis de la persekutantoj kaj trovis kvietan lokon, kie ili povis ellasi la gnomojn.

”Kio estas? Kio okazis?” Bobo eligis amason da demandoj.

Estis ja terure sidi enŝlosita en mallumo tiel longe. Eliza-

beto rakontis pri la dika sinjoro kaj la kolera fotisto. Bobo iom post iom komprenis, ke liaj amikoj okupas notindan staton en la societo, kaj li estis same interesita pri tio, kiel kiu ajn leganto de skandalaj kronikoj en la gazetoj. Finfine, ĉion konsiderante, eble Bobo volonte estus veninta el sia korbo por esti fotita kun siaj amikoj kaj poste havi tiun bildon publikigita en ĉiuj gazetoj de la mondo.

Kun Glogo estis tute alia afero. La miljara gnomo aŭskultis kun malaproba silento. Okazaĵo tia, kiun li ĵus ĉeestis, firmigis lian komprenon, ke la homa mondo estas freneza. Je tiu tempo li eltrovis, ke la granduloj havas grandan potencon kaj ke ili povas decidi pri la sorto de gnomoj. Kiel kuraco kontraŭ neŭrastenio la gnomaŭta ekskurso ne ŝajnis efiki.

Ekzakte tion Rodney supozis.

”Mi komencas kredi, ke ni devas ĉesigi la historion kun la abisenaj anseroj,” li diris. ”Ni devos forlasi niajn anserojn.”

”Sed kiel?” demandis Elizabeto.

”Ni povas, ekzemple, buĉi ilin kaj formanĝi ilin.”

”Oh, Rodney!”

”Aŭ ni povas fordoni ilin aŭ vendi ilin kaj doni la monon al iu bonfara celo.”

”Sed ni ja ne havas anserojn, Rodney!”

”Ni devos havigi al ni paron. Oni ne lasos nin en paco, antaŭ ol ni faris tion.”

”Ni veturu al Abisenio,” ĉirpis Bobo.

Sed Rodney diris, ke li ne kredas, ke tio estas ebla. Kontraŭe, ili devos aĉeti paron da abisenaj anseroj en Kalifornio. Ili devos prokrasti la serĉadon de gnomoj kaj anstataŭe komenci ĉasadon de domanseroj. Tion Glogo certe aprobus — li certe ŝatus anserojn pli ol homojn.

Rodney haltis en la plej proksima urbo, eniris fervendejon kaj aĉetis du korbojn kun kovriloj, pli grandajn ol tiuj, kiujn ili ĝis nun uzis. En la bazaro li aĉetis skatolon kun akvarelaj farboj kaj pecon da bruna ŝtofo kaj kudrilojn kaj fadenon.

”Nun ni estas pretaj por anserĉasado,” li diris. Li petis al Elizabeto, ke ŝi kudru du etajn ĉapojn, proksimume same grandaj kiel tiuj de Bobo kaj Glogo, kaj kun mentonrimenoj, por ke ili sidu fikse sur la anseraj kapoj.

Ne estus tre facile trovi anserojn en San Joaquinvalo, ĉar tie troviĝas nek lagoj nek riveretoj, kaj akvon oni pumpis el subteraj putoj. Rodney elektis vojon, kiu gvidis tra pasejo kaj poste al la marbordo. Estis bela vojo kaj baldaŭ ili estis en arbaroj, en kiuj oni laŭ la aspekto preskaŭ povus trovi gnomojn. Poste ili venis en valon, kaj en la valo estis kamparanaj domoj, kaj malantaŭ unu domo vidiĝis bazeno, kaj en la bazeno naĝis — hip hurao! — neĝe blankaj anseroj.

Rodney parkis la gnomaŭton iom for de la domo por ne riski esti rekonata. Portante la novajn korbojn li eniris kaj parolis kun kamparano kaj eksciis, ke li povas aĉeti paron da junaj viglaj anseroj por kvar dolaroj. Li pagis la postulitan prezon kaj la kamparano havigis iom da greno kaj vokis la birdojn al festa manĝaĵo.

Li elektis viranseron kaj Rodney elektis anserinon. Ili ĵetis sin super ilin — kaj ekestis batalo, por kiu Bobo kaj Elizabeto estus multon pagintaj, se ili povus ĝin rigardi. Oni malfacile imagas al si la forton, kiu kaŝas sin en juna kalifornia ansero kaj kiaj klopodoj estas necesaj por enigi ĝin en korbon kaj surmeti la kovrilon. Antaŭ ol la batalo estis finita Rodney estis ruĝa en la vizaĝo, lia bone tajlorita kostumo bezonis brospurigon, kaj li havis vundeteton sur unu mano.

Li portis siajn viktimojn al la gnomaŭto, kaj vi povas imagi, ke ĝi nun estis plena de korboj kaj valizoj kaj anseroj kaj gnomoj kaj knabino. Kiam ili atingis kvietan kaj kaŝitan lokon, kie ili povis manĝi lunĉon, Rodney metis la korbojn kun la anseroj sur la teron kaj petis Elizabeton prepari la akvofarbojn kaj malsekigi la oranĝruĝan farbokuketon kaj la rozkoloran. Ĉiuj infanoj scias, ke oni ne povas solvi novan farbokon en unu momento. Elizabeto laboris, kaj Bobo faris multajn demandojn pri farbo — el kiuj floroj ĝi venas kaj ĉu ĝi estas manĝebla. Fine Elizabeto informis, ke ŝi estas preta, kaj Rodney eksidis sur unu el la korboj kaj levis la kovrilon nur tiom, ke la ansero povis trameti kapon kaj kolon.

Juna vigla ansero tenas sin kvieta kiom ajn longe en malumo, sed kiam ĝi ekvidas etan esperon pri libereco, tiam ĝi ŝanĝas konduton. Rodney devis teni ĝin tre forte ĉirkaŭ la kolo, dum li per la alia mano tenis la bekon.

”Ansereto,” Elizabeto diris, ”ĉu vi komprenas, ke ĉi tio estas kosmetika salono? Parolu kun ŝi, Bobo, kaj klarigu.”

Sed Bobo malfeliĉe ne sciis, kio estas kosmetika salono, kaj pro tio li ne povis traduki al ansera lingvo. Li komprenis kelkajn vortojn de ilia lingvo, sed ĉi tiuj malantaŭkortaj birdoj estis tute fremdaj al li.

Elizabeto prenis la penikon, kaj kun amema zorgo de naskita artisto ŝi pentris belaspektajn rozruĝajn makulojn sur la vangoj de la anseroj.

”Tiel ja faras ĉiuj damoj,” diris Rodney. ”Do, kial la anseroj ne faru same?”

Elizabeto daŭrigis pentri ornamigajn orflavajn ringojn sur iliajn vertojn, tiel grandajn, ke ili estis videblaj ankaŭ se ili surhavis la ĉapojn. Ŝi provis la ĉapojn sur ili, kaj ili sidis per-

fekte. Ŝi volis lasi ilin tie, sed Rodney diris, ke la anseroj eble povus frotfalogi ilin en la korboj kaj formanĝi ilin aŭ sidiĝi sur ilin. La ĉapoj estis por solenaj okazoj.

La kapoj kaj koloj de la anseroj estis do repremitaj en la korbojn kaj Rodney diris:

”Estus amuze havi etan poemon pri niaj anseroj, aŭ kion vi opinias?”

”Ho, jes,” samopiniis Elizabeto kaj Bobo. Ili sidis plenaj de respekto kaj rigardis dum Rodney pensadis kelkajn minutojn. Fine li kraĉotusis kaj legis:

*Jen anser' de fremda aro
Sensaci' por gazetaro
Kun oraj kronoj elkovitaj
Lumantaj klare, ne fuŝitaj
La vangoj ruĝe bele ardas
Sen ŝminko tamen logas,
Kiam ni per vosto signas,
La gazetistoj tuj ariĝas.*

Poste ili lunĉis. Rodney prenis kraĵonon kaj notlibron kaj skribis kelkajn telegramojn, kiujn li laŭtlejis por la gnoj, la anseroj kaj la knabino.

”La Direktoro de Imperia Hotelo, San Francisko: Rezervu ĉambraron por gazetara konferenco kun reĝaj abisenaj anseroj je la kvina vespere. Rodney Sinsabow.”

Tio estis la unua. La dua estis adresita al ĉiuj gazetoj kaj novaĵagentejoj en la granda urbo.

”La reĝaj abisenaj anseroj, konataj sub la nomojn Jacqueline Kennedy kaj Generalo Sherman, invitas vin al akcepto en

sia ĉambraro en Imperia Hotelo hodiaŭ je la kvina posttagmeze.”

Li sendis ankaŭ telegramon al la sekretario de Verda Kruco, organizo, deklaris Rodney, kiu laboras por protekti la arbarojn. Tion Glogo aprobas, li aldonis, kaj la maljuna gnomo ankaŭ pardonos ĉiujn stultaĵojn, kiujn li diris pri la donacoj, kiujn la organizo ricevis por savi la arbarojn. Glogo ekstaris en sia korbo kaj dankis al Rodney tre ĝentile, kaj Rodney laŭlegis la telegramon.

”Mi deziras donaci la abisenajn reĝajn anserojn al via organizo. Ili estu vendotaj per aŭkcio je favoro de via agado. Vi estas petataj afable sendi reprezentanton al gazetara konferenco en Imperia Hotelo hodiaŭ je la kvina posttagmeze.”

Poste sekvis kroma telegramo, adresita al aŭkciisto, kies nomon Rodney trovis en San Franciska gazeto. Tiu estis ankaŭ invitita ĉeesti la gazetaran konferencon, kaj Rodney diris, ke li certe venos, ĉar aŭkciistoj vivas per publika renomo. Ĉe la granduloj famo signifas monon, li klarigis. Kaj mono estas io, da kio la granduloj neniam povas ricevi sufiĉe.

Glogo ekĝemis kaj retiris sin al sia korbo, kie li estis forte atakita de sia neŭrastenio.

Oka ĉapitro

En kiu la anseroj estas vendataj

La gnomaŭto plene ŝarĝiĝis denove kaj ili veturis rapidege al la marbordo. Kiam ili atingis la unuan urbon, Rodney sendis la telegramojn. La animo de la fulmo tuj ekspedis ilin al la granda urbo, kaj ĉiuj invititaj personoj devus aperi je la menciita horo. Pli poste Rodney aĉetis la posttagmezajn gazetojn en alia urbo, kaj en ili troviĝis priskribo de iliaj aventuroj en la sama mateno, kiel ili enskribis sin en hotelo sub la nomo Jenkins, kiel ili aranĝis la aŭton, ke ĝi estu taŭga por la anseroj, kaj kiel la ekscentra juna heredonto pagis al dika sinjoro, por ke tiu stariĝu inter li kaj la fotisto. Kiam li estis traleginta ĉion tion, li estis pli konvinkita ol iam, ke venos pli ol sufiĉe da partoprenantoj al lia gazetara konferenco.

Rodney adaptis la rapidecon tiel, ke ili alvenis antaŭ la Imperian Hotelon kelkajn minutojn antaŭ la decidita tempo. Li pardonpetis al la gnomoj pro tio, ke ili bedaŭrinde devos perdi tiun interesan spektaklon. Pardonon li ankaŭ petis de Elizabeto, ĉar li opiniis, ke estas plej sekure, se ŝi restas kun la gnomoj por protekti ilin. Rodney devos sola ĉion aranĝi kaj reveni kiel eble plej baldaŭ. Poste ili estos liberaj kaj povos foriri el ĉi tiu peliga, bruanta urbo kaj ree al la arbaroj.

Li veturis al parkejo kaj mendis parkadon por unu horo, aŭ iom pli. Poste li prenis la du korbojn kun la anseroj. Lia alveno rapidigis la servistaron. Ĉifoje li permesis al ili porti la korbojn. Li volis nome mem konduki kiel eble plej digne. Li iris

al la akcepteja tablo kaj enskribis sian nomon kaj eksciis, ke la "konferenco" atendas lin. Li volis pagi por la ĉambraro, sed estis ĝojo por la hotelo senkoste doni ĝin por lia dispono.

La hotela gvidantaro komprenigis al li, ke li estos denove bonvena, se li venos kun same interesa historio. Rodney surpriris la ŝtuparon sekvata de la du servistoj kun la korboj, kaj estis kondukita en grandan ĉambron, kie dudeko da viroj atendis: ĵurnalistoj, fotistoj, la sekretario en Verda Kruco kaj la aŭkciisto. Kaj tiu, kiun ĉiuj atendis, estis ĝuste Rodney, kiu en tiu momento altiris al si la intereson de la mondo.

Rodney uzis la plej rafinitan ĝentilecon. Ne plu temis pri malzorgemo aŭ malrespekto, ne pri kaŝiĝo malantaŭ dika viro.

Li faris mallongan inaŭguran paroladon, dirante:

"Miaj sinjoroj, dum kelka tempo mi okupis min pri scienca eksperimento, kiu, laŭ tio kion mi kredis, povus esti utila. Estis absolute necese, ke tiu eksperimento okazu sekrete, sed bedaŭrinde la novaĵo pri miaj klopodoj disflustriĝis. Tio okazis pro tio, ke la gvidantoj de iu hotelo obstine volis scii, kion mi havas en miaj korboj. Kiam mi diris, ke temas pri anseroj, oni konkludis, ke certe valoras atentigi la gazetojn pri la afero. Post tio mi konstante estis persekutata kaj ĝenata de nealkulebla aro da homoj kaj mian planitan programon mi ne sukcesis plenumi.

Tiu publikeco kompreneble estis tre ĝena por mia familio. Vi scias, kio okazis al mi kaj mia nevino ĉi matene, kaj nun mi devas trovi manieron por ĉesigi tiun pelĉasadon."

La ĵurnalistoj kapsignis penseme. Ili, la viroj kiuj kaŭzis tiun publikecon, sciis, ke multaj homoj ŝajnas malŝati ĝin kaj

ke eta malmulto de tre riĉaj personoj fakte malŝatas ĝin. Kaj kiam iu rakontas tion, tio kompreneble faras fortan impreson.

”De post kelka tempo,” daŭrigis Rodney, ”mi estis interesita de la laboro, kiun faras la Verda Kruco, societo, kiu laboras por protekti niajn arbarojn kaj kontraŭlaboras la danĝeran detruon de la grundo. Konsiderante la grandan intereseon, kiun montris la publiko por miaj anseroj, mi opinias, ke ili estas sufiĉe valoraj.

Tial mi decidis donaci ilin al Verda Kruco, kiu vendu ilin en publika aŭkcio kaj uzu la akiritan nomon por siaj celoj. Mi petas la sekretario de la societo veni ĉi tien, kaj mi esperas, ke li volos akcepti la donacon.”

La sekretario estis prezentita kaj la ĵurnalistoj, kiuj neniam aŭdis pri Verda Kruco, faris multajn demandojn kaj notis la respondojn.

Ĉio sukcesis kaj estis radianta reklamo por la asocio. La sekretario komunikis al la mondo, ke Verda Kruco kun ĝojo akceptas la anserojn kaj varme dankis al sinjoro Sinsabow.

Poste estis la vico de la aŭkciisto. Rodney diris, ke li venigis tiun sinjoron al la gazetara konferenco, ĉar li havas grandan sperton en sia metio, kaj li esperis, ke li volos gvidi la aŭkciadon de la anseroj.

La aŭkciisto komunikis, ke ankaŭ li estas tre interesita pri la laboro de Verda Kruco kaj ke li volonte faros tiun servon senkoste. ”Kaj mi imagas al mi, ke la reklamkostoj estas sen signifaj,” li diris, kaj la ĵurnalistoj ridis.

Restis ankoraŭ unu afero: la anseroj devus esti montritaj kaj fotitaj.

”La sinjoroj de la gazetoj eble miras, kial mi estis tiel sekreta tema pri la anseroj,” diris Rodney. ”La afero estas, ke ili estas

duonsovaĝaj kaj tre facile timiĝas. Ili ne estas kutimigitaj al fremduloj, kaj tio faras ilin nervozaj kaj influas al ilia eduko. Nun mi kompreneble ĉesas miajn provojn malsovaĝigi ilin. Ili apartenas al Verda Kruco, kiu de nun transprenas la respondecon pri ili. Vi povas vidi kaj foti ilin, sed vi ne atendu, ke mi montros, kion mi instruis al ili. Povas okazi, ke iu alia povos persvadi ilin konversacii kaj montri siajn artaĵojn antaŭ pli granda societo. Mi neniam sukcesis en tio, kaj mi ankaŭ neniam diris tion, ĉu ne? Mi portos ilin en la apudan ĉambron, kaj tie mi ellasos ilin la korboj. — Ili estas ĉiam relative sovaĝaj, kiam ili elvenas. Mi faros, kion mi povos por kvietigi ilin, sed mi ne povas doni iujn garantiojn pri ilia konduto.”

Rodney akcentis tion tiel forte, ke oni povus pensi, ke li estis preta ellasi paron da bengalaj reĝaj tigroj en la ĉambro de Imperia Hotelo. Li ordonis al la servistoj porti la korbojn en la apudan ĉambron. Kiam la knaboj retiriĝis, li ŝlisis la pordon kaj sidiĝis sur unu korbon, lasis la anserinon elmeti la kapon, surmetis la brunan ĉapeton, retiriĝis kaj lasis la anserinon ekpromeni.

Rodney ne havis eĉ etan imagon, ĉu la ansero provos forigi la ĉapon aŭ ĉu ĝi atakos lin, aŭ ĉu ĝi eskapos sub la liton aŭ kio ajn. Li havis kelkajn grenerojn en la surtuta poŝo, kaj tiujn li sternis sur la plankon kun la espero, ke la ansero ne montros sin 'tro ansera' — kaj tiu espero veriĝis, ĉar la birdo tuj komencis manĝi. La viransero estis ellasita en simila maniero. Kiam ili formanĝis ĉion ĝis la lasta ero, ili retiriĝis en angulon, kaj Rodney iris rapide al la pordo, malfermis ĝin kaj vokis:

”Eniru miaj sinjoroj!”

La tuta societo eniris la ĉambron. Tie ili vidis antaŭ si pa-

ron da plene vivantaj anseroj, kaj ili havis tute ĝuste rozruĝajn vangojn kaj orflavajn ringojn ĉirkaŭ la verto, kaj brunajn pintĉapojn sur la kapoj. Ili staris tie kaj aspektis timiĝintaj kaj sufiĉe sovaĝaj. Ne estis tute impona vidaĵo, sed kiel ajn — la tuta mondo atendis ilin, kaj la fotistoj tuj komencis labori. La fulmoj flamis. Unue ili faris bildojn de la anseroj, kaj poste de Rodney kun la anseroj, kaj poste de la sekretario de Verda Kruco, kaj fine ankaŭ de la aŭkciisto. La unuaj bildoj de reĝaj abisenaj anseroj, kiuj iam estis faritaj en Ameriko. La ĵurnalistoj kompreneble volis daŭrigi siajn demandojn, sed Rodney abrupte interrompis ilin: "Miaj sinjoroj, mi rakontis la tutan historion. Mi ne estas artisto de distrado, kaj mi ne intencas, ke tiuj bedaŭrindaj timigitaj bestoj montru siajn artojn en hotelĉambro. Mi faris ĉion, kion mi povas por vi, kaj la venonta numero estos aŭkcio."

"Kiam ĝi okazos?"

"Tio dependas de la novaj posedantoj de la anseroj. Se mi rajtas fari proponon, mi kredas, ke estas saĝe atendi tri-kvar tagojn, tiel ke ĉiuj interesuloj pri la aŭkcio povas ricevi inviton. Aŭ kion vi opinias?" demandis Rodney al la aŭkciisto. Tiu samopiniis.

"Ankoraŭ unu demandon, sinjoro Sinsabow," intervenis unu el la ĵurnalistoj. "Mi komprenis, ke vi ankaŭ havas kelkajn ovojn?"

"Jes, mi havas dektri ovojn."

"Kion vi intencas fari kun ili?"

Bedaŭrinda Rodney! Li estis rapidpensa, sed ne sufiĉe en tiu ĉi kriza situacio.

"Mi intencas meti ilin en kovaparaton," li diris.

Li rimarkis sian eraron en sama momento, kiam la ĵurnalistoj ekparolis.

”Ho, do vi baldaŭ havos reĝajn abisenajn anseridojn?”

”Jes, ŝajnas tiel.”

”Kiel longe daŭras la kovado?”

”Ĉirkaŭ tri semajnojn, mi kredas.”

”Kie vi troviĝos tiam?”

”Mi ne scias.”

”Ĉu vi intencas havi la kovapparaton en via aŭto?”

”Ho ne, ne, ne!” Rodney ekkriis, kaptita de paniko. ”Mi interkonsentis kun bonkonata anserbredejo, ke ili akceptos la ovojn.”

”Ĉu vi sciigos nin pri la evoluo?”

”Kompreneble. Ni aranĝos novan gazetaran konferencon. Kaj dum la tempo tiuj sinjoroj — li montris al la sekretario kaj la aŭkciisto — preparos ĉion por la aŭkcio.”

Per tio la lignaĵheredonto post pluraj ĝentilaj riverencoj forlasis la ĉambron kaj fuĝis tra la rezerva elirejo. Post kiam li iomete promenis por esti certa, ke neniu sekvis lin, li rapidis al la parkejo, kie Elizabeto pacience atendis kun siaj gnomoj.

”Ellasu min! Ellasu min!” pepadis Bobo, kaj Glogo ordonis: ”Estu silenta knabo, estu silenta!”

Tumulto estis proksima en la gnoma familio, tiel fervora Bobo estis por ekscii ĉion pri la konferenco. Li povis preskaŭ ne atendi ĝis la gnomaŭto rulis el la parkejo kaj Elizabeto povis levi la kovrilojn de la korboj.

”Nu, ĉu la ĵurnalistoj venis?” li demandis.

”Kiel kondukis la anseroj?”

”Ĉu la pentritaj plumoj aspektis naturaj?”

”Nun mi kredas, ke oni lasos nin en trankvilo dum la proksimaj tri semajnoj,” diris Rodney. ”Neniu havas intereson pri ovoj antaŭ ol ili estas pretaj por elkoviĝi.”

Sed poste, kiam li pripensis la aferon ĝisfunde, li diris, ke tamen estas pli bone, ke ili restu inkognitaj. Tiaokaze ili ja devas elekti novajn nomojn.

Elizabeto ĝojis — estas kvazaŭ interesa ludo. Rodney diris, ke li estos sinjoro Timotheus T. Pettigrew el Oshkosh en Wisconsin. Elizabeto pripensis longe kaj profunde, sed fine ŝi decidis, ke ŝi estas Pamela Pettigrew. Bobo ĵus eksciis, ke la mamutarboj estis nomitaj laŭ indiano, kaj tial li volis esti indiano kun tiu nomo. Glogo ne interesiĝis pri tiaj stultaĵoj, sed Elizabeto kaj Bobo decidis nomi lin laŭ la granda mamutarbo en la nacia parko, kiu havas la nomon Generalo Grant.

Ili devis ankaŭ decidi, kiel oni nomu sian novan okupon. Rodney proponis, ke ili diru, ke ili veturas por kolekti provaĵojn de novaj specoj de filikoj. Ili povas ja preni kelkajn specojn kaj lasi ilin videblaj en la korboj, tiel ke ili ne bezonas diri malveron.

Do ili fariĝis botanikistoj, kaj ili tuj komencis praktiki siajn rolojn. Elizabeto volis scii, kiom da specoj de filikoj ekzistas kaj petis al Glogo, ke li rakontu pri siaj interparoloj kun tiuj pratempaj kreskaĵoj en la sekvojaj arbaroj.

Ili forlasis la brueman urbon kaj pasis longan ponton, kiu iris super la interna parto de la golfo. Baldaŭ ili estis denove sur la ŝoseo, kaj estis tre varme ankaŭ post la sunsubiro. Ili daŭrigis ĝis estis tempo por enlitiĝo.

Lerninte de siaj fruaj spertoj, ili ne elektis la rektan vojon al hotelo sed al parkejo, kie ili lasis la aŭton. Poste ili piediris al

hotelo, portante la korbojn, el kiuj filikoj elstaris, kaj etan vojaĝvalizo kun dentobrosoj kaj piĝamoj. Ili iris al la akcepteja tablo, kaj Rodney skribis "Timotheus T. Pettigrew, Oshkosh, Wis." kaj "Pamela Pettigrew, same, same." Ili sciigis al la servisto, ke ili estas botanikistoj kaj havas filikojn en la korboj. Ĉar la filikoj estis tute videblaj, ili estis sen demandoj montritaj al siaj ĉambroj. Ili ŝlosis la pordojn, startis la aerumilon kaj kuŝis kviete kaj pace en siaj litoj. Fotistoj kaj ĵurnalistoj ne ĝenis iliajn songojn tiun nokton.

La sekvantan matenon ili ricevis gazetojn kun resumoj pri la gazetara konferenco kaj la digna kaj efika parolado, kiun Rodney faris. Estis ankaŭ bildo de li kaj la reĝaj abisenaj anseroj. Entreprenema teatrulo estis proponinta sian teatron kiel aŭkcio, kaj anoncis, ke la reĝaj abisenaj anseroj foraŭkciigos al la plej alta propono vendrede je la tria posttagmeze kaj ke la tuta vendosumo estos transdonata al Verda Kruco.

"Kaj nun la veturo iras al Yosemite," diris Rodney, kaj baldaŭ ili denove survojis al montaro. La bela vojo serpentumis tien kaj reen tra pasejoj, en kiuj la naturo malŝpareme plantis pompajn arbojn. Ili vidis plurajn laŭditajn scenejojn: — grandegaj ravinoj kaj akvofaloj, naturbelaj montoj kaj lagoj kaj riveretoj.

Ili vidis arbarojn de multaj diversaj specoj kaj grandecoj, ili veturis tien kaj reen kaj serĉis la tutan tagon. Ili pasigis la nokton sur kampadejo en la montaro kaj daŭrigis la serĉadon. Ili vidis ursojn kaj cervojn kaj multajn turistojn, sed gnomojn oni ne vidis, eĉ ne spurojn post ili. Glogo fariĝis pli kaj pli malĝoja, kaj kiom ajn li klopodis, li tamen estis sufiĉe senkuraĝiga kunulo.

La situacio estis vere iom stranga. Glogo estis maltrankvila pri la estonteco de sia nevo, kaj li, kiu estis bona kaj fidela, provis ankaŭ aspekti same maltrankvila, sed sen sukceso. Bobo, kiu iam estis bona kaj patriota gnomo, iom post iom lasis sin ensorĉi de la granduloj. Li provis kaŝi tion antaŭ sia avo, sed ne estis malfacile vidi, ke Bobo tre ŝatas maturajn olivojn kaj celerion kaj glaciaĵon. Li ŝatis rigardi tra la fenestro kaj vidi la aŭtojn preterpasi kiel vento, malgraŭ tio, ke li riskis esti malkovrita.

Kiam ili en sabata mateno aŭdis la priskribon de la aŭkcio, kaj ke tiu sola paro de reĝaj abisenaj anseroj vendiĝis por 2 240 dolaroj, li estis pli multe interesita pri tiu mono kaj kion oni povus aĉeti per tio, ol serĉi gnomojn. Rodney komencis demandi sin, kiel tio finiĝos. Ĉu Bobo, kondiĉe ke oni trovos la etajn ulojn, volos aparteni al ili?

Ili sidis en eta maldensejo manĝante sian vespermanĝon, kaj subite Glogo diris: "Ne valoras pli longe serĉi. Ne plu troviĝas gnomoj en Yosemite."

"Ekzistas multege da naciaj parkoj," atentigis Rodney. Fariĝis denove unu el tiuj diskutoj, en kiu ĉiu provis superi la aliajn per ĝentileco. Glogo diris, ke ili devas reiri al la sekvoja arbaro, kaj ke ili ne plu rajtas ĝeni siajn amikojn. Rodney diris, ke li neniam travivis pli gajan aventuron. Kaj krome, kio okazos kun la reĝaj abisenaj anseroj? Ili ŝercis kun la miljara gnomo, ĝis ili sukcesis ridigi lin.

Tio finiĝis per decido, ke ili forlasu Yosemite kaj daŭrigu orienten al la naciaj parkoj en Zion kaj Bruce Canyon. Ili reiris al la hotelo, kaj Rodney funkciigis la "interurbparolilan animon".

Elizabeto parolis kun panjo kaj rakontis, kiel mirindan

tempon ŝi havas, kaj ke ŝi eĉ ne unu fojon malsekigis siajn piedojn. Kaj ke preskaŭ ne estis fulmotondro kaj eĉ ne iomete da tertremo.

La sekvan matenon ili veturis orienten kaj forlasis Kalifornion, tiun varmegan fornegon, malantaŭ si. Sed estis pli multaj fornegoj en Nevado. La montoj estis senarbaj, malserenaj rokoj, kiuj alprenis plej strangajn formojn, kelkaj lumis rozruĝe, grize, brune, blanke kaj per multaj miksaĵoj de tiuj koloroj. Ili pasis grandajn terenojn de malfekunda tero, kie nur kreskis salvio kaj spicherboj, grizbrune pendante en la brulanta suno. La gnomoj neniam vidis tiajn pejzaĝojn, kaj Glogo, kiu ne povis elteni la vidon de tiuj soifaj, suferantaj kreskaĵoj, kaŝis sian vizaĝon per la manoj. Li ne eliris la aŭton por paroli kun ili. Ili aspektis tro mizeraj kaj li komprenis iliajn sentojn.

Sed la strangaj granduloj prizorgis, ke estis pli ol sufiĉe da akvo laŭlonge de la vojo, same ankaŭ da benzino kaj oleo, kion bezonis la nelaciĝebla animo de la aŭto. Ili povis ankaŭ ricevi ĉion, kion ili mem bezonis — sendviĉojn, varmajn kolbasojn, trinkaĵojn kaj glaciaĵojn en paperkonusoj. Kiel ajn malgaja Glogo estis, li ne povis kontraŭstari la ĉarmon de glaciaĵo en la brulanta varmego de Nevado.

La glacikonuso estas unu el la kontribuoj, kiujn Ameriko donis al la civilizo. Ĝi troviĝas en tri koloroj, blanka, bruna kaj roza. De Portlando en Oregono sur la okcidenta bordo ĝis Portlando en Maine sur la orienta bordo ĝi estas ĉiam de sama formo, grandeco, gusto kaj prezo. Se ĝi ne estus tiel facile pereigiĝanta, ĝi certe estus uzebla kiel pagilo.

La vojo ne plu estis asfaltita, ĝi estis makadama vojo. Tio kaŭzis, ke ili rapidis antaŭen en grandegaj kirliĝantaj polvo-

nuboj. Sed tiujn ili konstante havis malantaŭ si — la bone edukita gnomaŭto ĵetis la polvon en la vizaĝon de la renkontiĝantoj. La trafiko tamen estis maldensa en tiuj regionoj, kaj estis la salvioj kaj la spicherboj, kiuj ricevis la plejparton. Estis ankaŭ kavaĵoj en la vojo, kaj Glogo kaj Bobo devis uzi la streĉitajn ŝnurojn. Bobo opiniis, ke estas gajege fariĝi ĵetita tien kaj reen, kaj Rodney nomis lin 'la juna gnomo en la fluganta trapezo'.

Bobo kaj Elizabeto eltrovis ĉiuspecajn ludojn por rompi la enuon dum longaj veturoj. Ili vetis pri la numeroj de la renkontotaj aŭtoj. Ili havis nenion por priveti, sed ili tamen vetis kaj zorgeme kontrolis gajnojn kaj perdojn.

Ili ricevis mapojn ĉe la benzinaŭtomatoj, kaj Bobo ne laĉiĝis studi ilin. Li kompreneble ne povis legi, sed Elizabeto iom post iom instruis al li. Li povis sekvi la liniojn, kiuj signis la vojon, kaj Elizabeto legis la nomojn de la urboj kaj klarigis la distancojn inter ili. Li lernis rapide distingi la diversajn benzinentreprenojn laŭ iliajn benzinaŭtomatojn kaj la diversajn aŭtomarkojn — mallonge dirite, Bobo rapide transformiĝis al juna usonano kaj laŭ konduto, pensmaniero kaj lingvo, kaj se ili vere sukcesos trovi aliajn gnomojn, li kaŝe rigardos ilin kiel needukitajn kamparanojn.

Ili kredis, ke ili estis aŭdintaj pri la reĝaj abisenaj anseroj por lasta fojo, sed ne estis tiel feliĉe. En la mineja urbo Tonopah Rodney aĉetis gazeton, kaj en ĝi li legis, ke la anseroj estis aĉetitaj de varietea direktoro, kiu rapide gajnis monon per montrado de ili antaŭ publiko. Li maskis knabinon al 'abisenana anservartistino', kaj ŝi gvidis la anserojn per plurkoloraj silkorubandoj sur la scenejon kaj dancis kaj kantis bonhumoran kanzonon pri sia hejmlando. Li lasis ankaŭ eksplodigis

knalpizojn kaj je ilia krevado la anseroj eksaltis kaj balance-tis la vostojn. Tiu numero estis granda sukceso.

Elizabeto demandis, kiel estas eble por viro en tiel mal-longa tempo instrui la anserojn, kaj Rodney diris, ke li eble havas kaŝitan fadenon malantaŭ la kurtenon kaj donas al la bedaŭrindaj bestoj elektran baton. Ĉiuokaze estis agrable scii, ke la granda publiko nun havas ion alian por rigardi ol la gno-maŭton kaj ĝiajn pasaĝerojn.

Naŭa ĉapitro

En kiu la gnomaŭto rulas orienten

Ili venis al Utah, nova ŝtato, plena de montoj, kie la naturaj fortoj provis multajn strangajn eksperimentojn — kiel renversi la montojn aŭ flankenmeti ilin. Estis ankaŭ montoj, kiuj estis dishakitaj por konstruŝtonoj kaj amasigitaj en kuriozaj formacioj. Aŭ ili estis meze fenditaj aŭ eksplodigitaj kun naturaj volbigitaj tuneloj.

Oni povis subite veni al io, kio aspektis kvazaŭ ĉina muro aŭ pra-hindujaj fortikaĵoj aŭ egipta sfinkso. Kaj poste sekvis tuta kvartalo da novjorkaj nubskrapiloj, kiuj estis ruiniĝontaj. Oni vidis ege densan elefantgregon, poste aŭtoparkejeron, kiu solviĝis ĉe la horizonto, kaj tuj poste oni venis al la 'Pendantaj ĝardenoj de Semiramido'. Estis loko, al kiu verŝajne venis giganto, kiu per sia akra glavo forhakis la pintojn de ĉiuj montoj kaj postlasis planajn ebenajn supraĵojn. Oni povis imagi al si, ke estis bele kaj verde tie supre, ideala loko por pikniko, sed bedaŭrinde estis tro fore.

Poste alia giganto estis veninta kun skatolo kaj akvofarboj, simila al la malkara skatolo de Elizabeto, sed pli granda. Li estis metinta la penikon en la helruĝan farbon kaj pentris la flankojn de la rokoj, same kiel Elizabeto pentris la reĝajn abisenajn anserojn.

En iu alia loko ŝajnis, ke la gigantoj havis batalon. Ĉi tie la montflankoj estis tute helruĝaj, kvazaŭ sango estus fluinta el la vejnoj de la giganto. Arboj provis kaŝi la vundojn kaj ma-

kulojn verde kaj ruĝe. Kaj pli fore oni vidis pli altan montĉenon kun blankaj makuloj — eble estis neĝo, eble marmoro, estis neeble konstati. Estis ankaŭ nigraj montoj kaj brunaj montoj kaj grizaj montoj kaj ĉiuj tiuj koloroj en diversaj nuancoj kaj miksaĵoj.

La vojo serpentumis tien kaj reen tra tiu stranga pejzaĝo. Kelkfoje la aŭto grimpis supren kaj atingis pinton, kaj tiam oni havis vastan elrigardon super centoj da kilometroj de montoj. Denove malsupren kaj gigantaj rokoj aperis kaj provis bloki la vojon al la gnomaŭto. Kaj tiam ĝi devis flankeniri aŭ preterpasi laŭ la plej ekstera flanko de la roko. Glogo kaj Bobo estis sufiĉe maltrankvilaj, ili ne estis alkutimiĝintaj kuregi kapaltere kontraŭ gigantaj montoj kun rapideco de okdek kilometroj po horo.

Rimarkinde estis, ke la vojo ĉiam atingis antaŭ ili kaj ordigis ĉion. Ne gravis, ĉu estis tage aŭ nokte, ĉiam ripetigis la sama sorĉo.

Unue ili venis al Bryce Canyon, kie estis amasoj da vidindaĵoj kiel la ĵus priskribitaj, kaj poste ili venis al Zion Park. Ili fidele eliris kaj iris en la arbaron por serĉi gnomojn, sed ĉiam vane. Denove Glogo kaŝis la vizaĝon per la manoj, kaj Rodney devis apliki sian patentmedicinon kontraŭ neŭrastenio:

”Ne perdu la esperon, vi ankoraŭ ne vidis Coloradon.”

Li komencis laŭdi la misteriojn de la montoj kaj arbaroj de Colorado — estis kvazaŭ la komerca ĉambro de Colorado ekparolus aŭ la Denver-Rio Grande-fervojo. Kaj tiel ankaŭ estis. Rodney nome haltis ĉe fervoja stacio, kaj tie li ricevis broŝuron. El ĝi li eksciis, ke la vorto Colorado signifas ’ruĝa’ kaj ke unu el la ŝtupoj en ŝtata parlamentejo troviĝas ekzakte unu anglan mejlon super la maro. Bobo, la perfekta turisto,

estis tre imponita. Kiam Glogo rimarkis tion, li regis sin kaj diris: "Nu bone, ni daŭrigos."

Ili veturis orienten, kaj baldaŭ ili estis en Colorado. Ili venis en la grandan nacian parkon en la roka montaro, kaj tie ili daŭrigis la serĉadon. Rodney rakontis, ke la arbaroj ĉi tie konsistas el multaj diversaj laŭroj kaj ke oni povas trovi rokojn plenaj de ŝtoniĝintaj folioj kaj ŝelo de gigantaj mamutaroj, kiuj vivis kaj prosperis antaŭ kvardek milionoj da jaroj. Eble ankaŭ troviĝas ostoj de gnomoj en ili. Sed Glogo ne fariĝis pli gaja pro tio — ne ŝtoniĝitajn gnomojn li serĉas, sed unu junan vivantan gnomknabinon, kiu povus edziniĝi kun lia nevo.

Kion ili nun trovu? Ili venis la tutan longan vojon tra la montegoj en orienta Ameriko, sed en neniuj loko ili havis sukceson. Se ili reirus, tio signifus kompletan kapitulacion antaŭ la nigraj fortoj de neŭrasteno. Glogo kuŝiĝis en sia korbo kaj restis tie, kaj estis neeble ellogi lin eĉ per glacikonuso.

Rodney kaj Elizabeto estis diskutintaj la aferon kaj faris decidon. Dum unu el siaj longaj konsiliĝoj kun la gnomoj ili komencis rakonti pri ĉiuj mirindaĵoj, kiuj troviĝas en Minesoto kaj Wisconsin — tie ne estis montoj, sed belaj lagoj, kaj en la norda parto netuŝitaj arbaroj, en kiuj oni povis imagi, ke amasoj da gnomoj vivas. Por veni tien oni devis veturi tra grandaj ebenaĵoj, diris Rodney. Estas longa veturo, povas esti varmege sur la vojo, kaj ili ne vidos arbojn krom poploj en la fluejoj. Se ili veturos rapide, ili estos tie post du tagoj. Glogo povis resti en sia korbo kaj konsiliĝi kun la animo de la gnom-aŭto.

"Mi aŭskultis la animon," diris Glogo, "kaj ĝi diras, ke ĝi ne

estas tute kontenta kun la ekzisto. Povas esti komenco de neŭrastenio.”

”Ho, terure, mi ne sciis, ke ĝi estas infekta,” diris Rodney. En proksima urbo li igis meĥanikiston esplori la aŭton. Tiu trovis, ke la viro, kiu faris la ŝmiron, forgesis kontroli unu ŝraŭbon en la transmiila skatolo kaj ke preskaŭ ĉiu oleo elfluis. Rodney decidis, ke la inkognita nomo de Glogo estu ŝanĝita de Generalo Grant al ’Plej bona difektesploristo’. Li diris, ke unu gnomo en la malantaŭa sidloko baldaŭ apartenu al la norma ekipaĵo por ĉiuj aŭtomobilistoj.

Ili komencis la novan veturon. ”Minesoto aŭ bankroto” estos ilia devizo, diris Rodney. ”Orienten montaras la Stelo de la Gnomoj.”

Li ĉiam estis plena de tiaj stultaĵoj. Li ankaŭ faris multajn demandojn al Glogo, kelkaj el ili seriozaj, aliaj amuzaj, kaj igis lin paroli la tutan tempon. Kiam ili atingis la hotelon vespere, Rodney faris notojn pri ĉio, kion Glogo rakontis. Li skribos libron, li deklaris, kun la titolo: ”La saĝo de la gnomo”.

Rodney parolis interurbe kun patrino kaj rakontis, kie ili troviĝas kaj kien ili celas vojaĝi. Nature patrino teruriĝis — kia ideo estas veturi okcidenten kun Elizabeto, se nun Rodney revojaĝos orienten kun ŝi? Rodney diris, ke estas tre simple — ŝi ja ne povos vojaĝi hejmen orienten, se ŝi ne unue estis okcidente, ĉu? Ankoraŭ unu el liaj kutimaj stultaĵoj!

Elizabeto petis kaj petegis — patrino ne povas imagi kiel bone ŝi fartas, kaj estis la unua fojo, ke ŝi vere pensas, ke estas amuze lerni ion. Patrino estis tre suspektema pri lernaĵojn, kiu ne estas malamuzaj — tion ŝi mem neniam spertis dum sia juneco. Sed, feliĉe, patrino ĝuste nun mem fartis tre bone, kaj tial ŝi diris, ke Elizabeto povas kunvojaĝi, sed postulis, ke ŝi

lasu la teruran esprimon ”okej”, kiu sonis tiel vulgara — tiel ja parolas la gangstroj en filmoj. Elizabeto diris, ke ŝi eĉ ne unufoje vizitis kinejon, ŝin pli amuzas paroli kun profesoro Glogo. Do, fine patrino komprenis, ke la kultura bredado de la filino bone progresas.

Ili startis la sekvan matenon kun bonega humoro kaj tre scivolemaj pri Minesoto. Rodney elektis tiun okazon por sciigi al ili, ke li skribis poemon pri Bobo kaj lia problemoj.

Rodney skribis konstante poemojn, sed li neniam sukcesis publikigi ilin. Ili estas tro facile kompreneblaj, li diris, kaj nuntempe nenio estas aprobita kiel poezio, se oni povas kompreni ĝin. Tion Elizabeto ne povis kompreni, kaj Rodney klarigis, ke la poetoj volas disigi sin de mondo, kiun ili ne aprobas, kaj fine ili tiom aliiĝis, ke ili ne eĉ komprenas sin mem. Sed kiel ajn, ĉi tiel tekstas la poemo pri Bobo:

*Arbaron ĉarman konas mi
Solenan templon similas ĝi
Eta gnomo tie ĝuas.
Malĝojas tamen pri l'havaĵ' perdita.
Hakilo homa l'arbaron detruis
La gnomo timas lian agon farita.
Ankoraŭ juna, nur cent jaroj,
Edzinon li bezonas, se ne venos baroj.
Bedaŭrinde li ne scii povas
Kie gnomoj nun sin movas
Eble poeto tion povas:
Amiko de arbar', aŭskultu!
Se vi por gnomoj havas koron
Ekiru tuj, montru la honoron!*

*En valon kaj sur montan pinton
Provu por la gnomo trovi finon:
Alian gnomon, amindan gnomedzinon.*

Elizabeto kunfrapis la manojn pro ĝojo. Ŝi diris, ke ŝi ne povas imagi al si pli belan poemon ol ĉi tiun. Rodney atentigis, ke ĝi krome estas praktika. Li klarigis al Glogo, ke ĝi ne malkaŝis ilian sekreton, ordinara homo devas nome percepti la poemon kiel ordinaran esprimon de la kuriozeco de la poetoj, dum kontraŭe la veraj amikoj de la arbaro komprenos kaj komencos serĉi. Estus ja eble, ke jam estas iu, kiu havas aron da gnomoj, sed kaŝas ilin pro la sama kaŭzo, kial Rodney kaj Elizabeto kaŝas siajn.

Glogo diris, ke li ne kontraŭas, ke Rodney publikigu la poemon, sed ke li ne atendas rezulton, ĉar li ne povas kredi, ke troviĝas tiom da veraj amikoj de la arbaroj inter la granduloj — kial ili en tiu okazo lasis la arbojn faliĝi kaj transformiĝi al malbelaj lignoskatoloj. Se ili necese devas havi skatolojn kiel loĝejojn, ili ja tamen povas planti novajn arbojn anstataŭ la faligitajn?

Rodney kaj Glogo poste havis longan interparolon pri io, kio nomiĝas 'konservigo'. Rodney diris, ke la homoj iom post iom lernis prizorgi siajn arbarojn, ke ili permesas faligi nur tiujn arbojn, kiuj atingis certan grandecon, kaj ke ili ĉiam plantas novajn anstataŭe. Li diris, ke ne eblas esti tro avida en la lignaĵa fako, ĉar tio gvidus al pereco por la tuta fako kaj la mondo mem.

Glogo kredis, ke jam estas tro malfrue, ke la tero estas eroziita de la akvo de tiom da montoj kaj montetoj, kaj ĝin oni ne povas rehavi, same maleble kiel estas rehavi la gnomojn.

La maljuna avo kuŝiĝis en sia korbo kaj estis atakita de neordinara atako de senespero.

Ili forlasis la montojn kaj iliajn branĉojn kaj rulis tra ondantaj ebenaĵoj, kie brutaroj paŝtis sin. Sed la malsupreniĝo okazis iom post iom, oni apenaŭ rimarkis, ke oni estas survoje malsupren, tiamaniere oni evitis susuron en la oreloj kaj aliajn malagrablajojn. Ili sekvis akvofluan, kiu unue estis rivereto kaj poste evoluiĝis al rivero kun sablaj bordoj. Ĝia nomo estas Platte-rivero, klarigis Rodney, kaj Glogo elrampis el sia korbo por rigardi la riveron.

”Ho, rigardu,” li ekkriis. ”Ĝi estas flava! Ĝi estas flava!”

Tion li ripetis plurfoje. Li opiniis, ke estas terure, ke oni permesas al rivero havi koloron, kaj ke neniu atentis tion. Devas signifi, ke la pereado de la mondo proksimiĝas. Ĉi tiu valoro ŝlimsabla estas ja tio, kio ebligas la vivon, kaj nun ĝi fluas en la oceanon, kie ĝi ne plu povos fari utilon.

Ili rulis pluen. Kaj estis varmege. Ju pli malsupren ili venis des pli varmege estis. Tio estis denove rezulto de la sensenca murdado de la arbaro, diris Glogo. Rodney diris, ke li ne kredas, ke iam kreskis arbaro sur tiuj ebenaĵoj, sed la maljunulo asertis, ke tute certe povus kreski tie, se la granduloj uzus sian scion por utiligi la teron.

La kampoj estis plugitaj kaj semitaj per maizo, kaj la greno aspektis juna kaj verda kaj bela. Rodney klarigis, kio estas maizo, kiel ĝi kreskas kaj kiel ĝi gustas. Glogo diris, ke tiel oni ne rajtas manipuli la teron, se ĝi ne estas tute ebena. Se ĝi estas dekliva, la humo eroziigigas, kaj devus esti malpermesite semi ion sur deklivoj, krom grenon kaj similajn kreskaĵojn, kiuj ligas la teron. Rodney esprimis sian miron, ke Glogo mem sen eduko komprenis la principojn por protekti la te-

ron, sed la aĝa gnomo diris, ke tion lia popolo ĉiam sciis. La gnomoj kelkfoje kuraĝis iri ĝis la arbarrando por rigardi, kion faras la granduloj. Oni vidis ilin plugi kaj semi, kaj oni ankaŭ vidis, kiel ili influis al la tero. Oni vidis klarajn rojojn ŝanĝiĝi en argilajn riverojn. Nur homo freneza pro monavido povas permesi tion.

”Ĉefvojo 30” estis skribite sur la ŝildoj. Rodney rakontis, ke ĝi estas nomita ”La vojo de Lincoln”, kaj poste li rakontis pri Lincoln kaj kion li faris por liberigi la sklavojn. Glogo kaj Bobo nenion pli frue aŭdis pri ”homoj kun nigra haŭto”, kaj kiam oni pasis negron sur la vojo, ili scivoleme rigardis lin. La nigrohaŭta viro siavice fiksrigardis la etajn vizaĝojn kaj li certe kredis, ke estis optika iluzio.

Ili pasis multajn strangajn kaj interesajn scenaĵojn, kiuj devis esti klarigataj al la gnomoj. Ili vidis karavanojn de novaj aŭtoj, ĉiuj kun grandaj numeroj pentritaj sur la flankoj, survoje al Kalifornio por esti vendataj. Kelkaj staris sur grandegaj ŝarĝaŭtoj, ses sur ĉiu plataĵo. Ili vidis ankaŭ malnovajn aŭtojn plenŝargitaj per mebloj, etaj infanoj kaj kokoj, kies posedantoj veturis por serĉi feliĉon. Ili vidis junulojn en plezura veturo, virinojn, kiuj sunbanis sin kun la kruroj pendantaj tra la aŭtofenestro, maljunan kamparanon, kiu sidis rektorse en la antaŭa sidloko, survoje al la urbo, dum lia edzino sidis en la malantaŭa sidloko kaj tondis liajn harojn. Tiuj rimarkeblaj scenaĵoj donis al ili elirpunktojn por horoj da interparoloj.

Kiam ili forlasis urbon, ili ofte vidis junajn virojn, kiuj levis la dikfingron al ili. Por gajigi Glogon Rodney kreis historion, ke tio estas signo de amikeco kaj deziro pri feliĉo dum la veturo. Bobo opiniis, ke tio estas agrabla kutimo, kaj li vo-

lonte respondus la salutojn, se li ne estus petita resti ekster videblo.

Ili venis en la ŝtaton Nebrasko, kaj ankaŭ tie la plugado plene okazis. Ĉi tie estas la "maizo-zono" klarigis Rodney.

Fariĝis pli kaj pli varme. Tie estis ankaŭ kampoj kun vintra tritiko, kiu ĝuste estis maturiĝonta. La provinco estis ŝanĝita al senfina vico de kamparaj domoj, ĉiuj kun eta loĝdomo kaj granda brutejo kaj silo kaj ĉirkaŭ ĉio kelkaj arboj. La ondantaj kampoj etendiĝis tiel longe kiel la okulo povis vidi, kaj kiam oni venis sur la pinton de iu montodorso, oni vidis novajn montodorsojn antaŭ si.

Ili haltis en urbo por aĉeti manĝaĵon por la vespera manĝo, kaj poste ili haltis sub kelkaj arboj ĉe la vojrando por manĝi. Kiam ili estis pretaj Elizabeto hazarde sin turnis kaj ekvidis grandegan nigran nubon, kiu ŝajnis kovri la tutan horizonton. Ne estis fulmotondro, ĉar ĝi atingis ĝis la tero, kaj ĝi estis regula kaj homogena. Ili haltis ĉe proksima benzinaŭtomato por demandi, kio estas, kaj la viro diris:

"Estas unu el tiuj polvonuboj, ĝi proksimiĝas sufiĉe rapide."

Rodney diris, ke li ne intencas resti en polvonubo. La gnom-aŭto povas rapidi pli ol la vento, krom se estas uragano. Li plenigis benzinon kaj akvon kaj petis al la animo de la aŭto atingi la plej altan rapidecon, kaj ili rapidis per rapideco de pli ol unu kaj duona kilometro en unu minuto tra Nevado. La nigra nubo ŝajnis resti pendanta ĉe la horizonto malantaŭ ili, ĝi ne proksimiĝis kaj ne estis multe da polvo en la aero.

Iom post iom malheliĝis. Oni ne plu povis vidi la kampojn de maizo kaj tritiko aŭ la kamparanajn domojn kun ĝarde-

nojn. Ĉio estis envolvita en misteran mallumon krom la vojo antaŭ ili, kien la gnomaŭto direktis sian lumstrion. Fenestro estis duonfermita, kaj freŝa venteto trablovis la aŭton.

La gnomoj estis lacaj kaj kuŝiĝis en siaj korboj. Baldaŭ ankaŭ Elizabeto laciĝis kaj grimpis en la malantaŭan sidlokon kaj metis kusenon sub la kapon kaj ekdormis. Sed Rodney sidis en la stirsidloko kaj rigardis rekte antaŭen kaj pensis siajn proprajn pensojn. Li estis sperta ŝoforo, kiu ne laciĝis. Kaj li gajnis la vetkuradon kun la nuboj. Kiam Elizabeto malfermis la okulojn ili estis en parkejo, kaj de tie ili iris al motelo.

Deka ĉapitro

En kiu la anseridoj alpaŝas

La venontan tagon ili venis al Iowa. Ili estis denove viglaj kaj gajaj. Almenaŭ Glogo ŝajnis tion, por ke neniu kul-pigu lin pri malbonaj kutimoj.

Ĉi tie estas "la pankorbo de Ameriko" diris Rodney — kaj grandparto de tiu pano estas uzata por ŝinkaj sendviĉoj. Ĉe plej multaj kamparaj bienoj oni vidis grandajn nigrajn kaj brunajn porkojn sur la kampoj. Rodney diris, ke ĉiuj kamparanoj en Iowa estas devigataj produkti kvindek mil porkojn, kaj post tio ili havas la rajton translokiĝi al Kalifornio. Bobo volis scii kio okazas kun la porkoj, kaj Rodney diris, ke aliaj homoj formanĝas ilin. Bobo demandis, kiom la kamparanoj ricevas por la laboro, kaj Rodney diris, ke ili ricevas hipotekon. Estis unu el liaj stultaj ŝercoj denove. Estis io pri mono, kaj Glogo diris, ke mono estas la plej stulta afero, kiun la granduloj inventis.

Ili turnis norden, kaj iom post iom la pejzaĝo ŝanĝis aspekton. Ili vidis pli kaj pli multajn montetojn kun arbarhavaj deklivoj. Ĉi tie la domoj estis pli malgrandaj kaj ĉirkaŭataj de fruktĝardenoj, kaj sur la kampoj paŝtis sin bovinoj. Ili nun forlasis la maizdistrikton kaj venis al regiono, kie la ĉefmetio estis brutbredado. La laĝetoj fariĝis pli multaj, kaj ĉiuj estis ĉirkaŭataj de arbaroj. Fariĝis ankaŭ malpli varme, kaj tio faciligis la vivon por la gnomoj.

Bobo saltis de unu flanko al alia por ne perdi ion de ĉio

nova. Li neniam laciĝis rigardi la vojon, kiu serpentumis tien kaj reen inter la montetoj. Por ĉiu tago lia mondo kreskis, por ĉiu tago la granduloj fariĝis pli mirindaj. Bedaŭrinde aĝa Glogo sentis sin tute superflua. Li reeniris en sian korbon kaj cerbumis pri sia situacio silente, dum Bobo kaj Elizabeto babilis pri nova ludo, kiun ili eltrovis — nombri bovinojn. Bobo kontrolis unu flankon de la vojo kaj Elizabeto la alian, kaj kiam ili vidis grandan brutaron, la gnomaŭto devis malrapidiĝi, por ke ili ne perdu la nombradon kaj eraru.

Ĝis nun ili la tutan tempon havis radiantan sunlumon, eble eĉ iom tro. Sed nun amasiĝis pezaj nuboj, kaj komencis plui. La gnomaŭto rulis iom pli malrapide sur la malseka asfalto, kaj la akvo fluis sur la ŝirmvitro. Bobo ne laciĝis rigardi tiun spektaklon. Pensu, esti tiel proksima al la pluvo kaj tamen resti seka kaj sekura! Tio estis unu el la plej grandaj malfacilaĵoj en la vivo de la gnomoj. Kiam oni fariĝis malseka, oni restis malseka. Eĉ maljuna Glogo devis konsenti, ke estas pli agrable esti seka.

Troviĝis ankaŭ eta kurioza objekto nomata ŝirmvitra viŝilo, kiu senhalte pendolis antaŭ la nazo de Rodney. Ĉu estis la animo de la aŭto, aŭ ĉu estis speciala animo? Kaj kiel ĝi povas scii, kiam komencas plui? Ĉu ĝi sentis la malsekon? Aŭ ĉu Rodney ordonis al ĝi? La akvo torentis sur la vitro, sed la bonega viŝilo neniam perdis la kuraĝon. Ĝi pendolis pli kaj pli rapide, kaj ĵetis la akvon unue al unu flanko kaj poste al alia.

Ili venis al rivereto, kiu altiĝis preskaŭ super la bordoj kaj ĵetis sin antaŭen sub ponton. La akvo estis malhele bruna kaj aspektis kiel bolanta argilo.

”Jen!” vokis Glogo. ”Tie vi vidas, kio okazas, kiam oni murdas arbojn!”

Li montris al riveretoj diversloke, kiuj fluis de la montetoj kaj transportis kun si teron. Tio vundis lian koron kvazaŭ li estus avarulo kaj ĉio tio estus altvalora oro, kiu apartenas al li. Kaj tio okazas ĉie en la tuta lando, kiam plukas kaj neniu atentis tion.

La pluvo daŭre torentis, kaj baldaŭ la akvo altiĝis super la vojo, kaj Rodney devis malrapidiĝi pli kaj veturi pli singarde. Antaŭ si li havis grandajn platajn kampojn, kaj la flava akvo altiĝis kaj kreis lagojn. Ili vidis amason da aŭtoj antaŭ si kaj homojn, kiuj vadis en la pluvakvo, kaj kiam ili atingis ilin, ili eksciis, ke la akvo detruis ponton en la proksimeco. La akvo altiĝis seninterrompe, tial Rodney devis turni la aŭton kaj singarde reveturi laŭ la sama vojo, laŭ kiu ili venis.

Dum ĉio tio okazis, la miljara Glogo kolektis ĉagrenon preskaŭ ĝis furiozo. Li estis preta plori pro zorgo, pro ĉio, kion la granduloj kaŭzis: pensu, faligi ĉiujn arbojn kaj forlasi la teron al detruo! Ili havis sabloŝtormojn kaj la altvalora surfaca tero forblovis kun la vento. Ili havis inundon, kaj la humo estis forigita per la akvo. Kaj la tutan someron ili havis ondojn da varmego, kaj ili povis per elektraj ventumiloj kaj refreŝigiloj kaj glacikonusoj kaj per veturoj tra la lando laŭ naŭdek-kilometra rapideco hore krei venteton!

Ili reveturis sufiĉe multajn kilometrojn kaj trovis novan vojon. Ili pasis muĝetantan riveron sur ponto, kiu ĝis nun kontraŭstaris, sed tamen estis en danĝera situacio, ĉar granda parto de ruĝa kabanvando bategis kontraŭ ĝin, kaj nova parto, pli granda, estis survoje al la ponto. Rodney tre hontis, ke la aĝa gnomo devis ĉeesti tiajn tragediojn, kaj li devis konfesi, ke la granduloj tre malsperte prizorgas tiajn aferojn. Estis granda malpeziĝo por li, kiam ili forlasis tiun valon kaj

venis al la norda parto de la ŝtato, kiu ankoraŭ ne estis tute detruita de la avareco de la lignokomercistoj. Ĉi tie troviĝis netuŝitaj arbaroj, kaj post la pluvo regis ĉi tie tre agrabla ĉiela malvarmeto. En la folipintoj de la filikoj pendis fajrerantaj juveloj, kaj facila nebulo leviĝis de la velurmola tersurfaco en la arbaro.

Jen estis denove loko, kie oni povus pensi, ke gnomoj loĝas, tial ili eliris el la aŭto kaj iom serĉis. Ne estis ĉi tie gigantaj arboj kiel en Kalifornio, sed estis tamen sufiĉe multaj belaj kolosoj. Kaj ĉi tie troviĝis la krepusko de la arbaro kaj la magia bonodoro de balsamo kaj la venta susuro de la arbokronoj kaj verdaj filikoj kaj floroj — ĉio, kion amis la gnomoj. Glogo kaj Bobo ĉasis kvazaŭ sangohundoj, sed ne estis eĉ plej eta signo de la etula popolo.

Ili daŭrigis al la plej norda angulo, la ĉirkaŭaĵo de la rivero Pidgeon, kie ili trovis arbarojn tute ne tuŝitaj de homa mano. Ili restis tie plurajn tagojn kaj movis sin de loko al loko laŭ senhomaj vojoj. Nenie oni trovis postsignojn de gnomoj kaj la kompatinda miljarulo pli kaj pli profundiĝis en sian melankolion.

Por savi lin Rodney devis preni la tutan ŝuldon sur si mem.

”Mi timas, ke mi eraris,” li diris. ”Mi ne pripensis, ke la vintroj ĉi tie supre estas malvarmaj kaj severaj, kaj ke gnomoj eble ne toleras la klimaton.”

Glogo pardonis al li, kaj donis al li novan ŝancon. Ili certe trovos novajn arbarojn en iu pli varma parto de la lando. Rodney pensis pri la Ozark-montojn, pri kiuj li legis en iu revuo. Certe estos varme survoje al Arkansas, sed ili kunportos glacimalvarmajn izolbotelojn kaj loĝos en aerumitaj ho-

telĉambroj, kaj la tutan tagon la kompleza animo de la aŭto aranĝos al ili malvarmetan venteton.

Rodney konvulsie babiladis por ne esti devigata konfesi, ke lia neŭrastenikuracado fiaskis. Glogo estis jam en tiu stadio, ke li ne plu protestis — liaj amikoj ja tamen decidis. Bobo sia-vice venis al tiu stadio, ke li opiniis, ke ĉiuj partoj de Ameriko estas same ĉarmaj, kondiĉe ke estas nova parto kaj ke li povas demandi pri ĝi. Do ili turnis denove suden, kaj baldaŭ ili estis ĉe la rivero Mississippi, nomo kiun la gnomoj malfacile povis elparoli. La rivero igis Glogon senti sin pli malgaja, ju pli granda ĝi fariĝis, pro tio ke ĝi transportis ĉiam pli grandajn kvantojn da ŝlimsablo al lokoj, kie ĝi ne plu povos esti utila, nek por gnomoj nek por homoj.

Estis urboj laŭ tiu rivero, kaj unu matenon en urbo en la ŝtato Missouri okazis io, kio renversis ĉiujn iliajn planojn. Rodney estis plenuminta sian promeson al panjo, ke li veturos singarde. Sed li ne havis eblecon malhelpi iun, kiu urĝis, veturi kontraŭ ruĝa lumo kaj kolizii kun la flanko de la gnomaŭto, rompi la skusorbilon kaj premi unu malantaŭan radon tiel, ke ĝi fariĝis oblikva.

La gnomoj sidis en siaj korboj, kaj ili fariĝis priskuitaj kaj timiĝintaj, sed ili ne vundiĝis. La aŭto ne ricevis pli gravajn difektojn. Ĝi transportiĝis al aŭtoriparejo kaj povos esti preta post kelkaj horoj, diris Rodney. La veraj malfacilaĵoj komenciĝis unu minuton poste, kiam policisto premis sin tra la popolamaso kaj nepre volis kapti la viron, kiu koliziis kun Rodney. Al la oficialaj devoj de la policisto apartenis ankaŭ tiu, ke li devis noti la numeron de la gnomaŭto kaj ankaŭ la nomon de Rodney kaj lian adreson. Dum li skribis, li subite

ekhavis penson kaj komencis fiksrigardi la junan viron. "Sinsabow! Sinsabow? Ĉu mi ne aŭdis tiun nomon ie?"

"Ne estas tre kutima nomo," diris Rodney kaj sentis sin same kulpa kiel ĉekfalsigisto aŭ bankrabisto.

"Mi memoras, ke mi legis ion pri Rodney Sinsabow en la gazeto. Ho, nun mi scias! La reĝaj abisenaj anseroj! Ĉu ne estis vi, kiu posedis ilin?"

Rodney devis konsenti, ke tiel estas — li ja ne konis la leĝojn de la ŝtato Missouri kaj la eventualan punon por mensogo al policisto.

"Ho, vere," diris la policisto. "Ĝojigas min renkonti vin. Estis interesa historio. Bedaŭrindaj anseroj!"

"Ĉu pro tio, ke ili aperas sur scenejo?"

"Ne, mi pensas pri ilia fatala morto. Ĉu vi ne legis pri tio en la gazeto?"

"Ne, tion mi ne atentis!"

"Jes, estis tiel, ke estis brulego en la teatro, kaj la anseroj pereis en la flamoj."

"Ho, vere!" ekkriis Rodney. "Estis ja terure! Kaj kiom da tempo mi oferis por instrui ilin!"

"Sed, ĉu vi ne havas kvanton da iliaj ovoĵoj?"

"Jes, mi havas kelkajn."

"Tion mi ankaŭ vidis en la gazeto. Ili volis kontakti vin por ekscii, kio okazis kun la ovoĵoj."

"Ĉu vere?" diris Rodney, kaj sentis sin kiel la ĉekfalsigisto aŭ bankrotisto, kiam la mankatenoj fiksiĝas sur liaj manartikoj.

"Kio okazis kun la ovoĵoj, sinjoro Sinsabow?"

"Ili restas en sekura loko."

"Ĉu ili ne baldaŭ elkoviĝos?"

”Jes, la tempo estas proksima.”

”Tiaokaze vi baldaŭ estos posedanto de kelkaj reĝaj abisenaj anseridoj, ĉu ne?”

”Tion mi esperas.”

”Tiuĵ birdoj havas altan valoron. Gardu ilin bone!”

Homamaso kolektiĝis ĉirkaŭ ili kaj aŭskultis scivoleme. Ili atendis ion multe pli interesan ol kolizio inter du aŭtoj. Ordinara usonano legas pri okazintaĵoj en la mondo, sed li povas vivi sian tutan vivon sen eĉ unu fojon vere havi kontakton kun vera famulo. Kiam tamen tio okazas, li fariĝas tre ekscitata. Ĉiu homo en la grupo opiniis, ke tiu, kiu havos la eblecon manskui kun Rodney havos ion por rakonti al konatoj kaj nekonatoj dum semajnoj poste.

Tie staris la bedaŭrinda lignaĵheredonto, modesta kaj elektema juna viro kun sia difektita gnomaŭto, kiu devis esti fortransportita por ne malhelpi la trafikon. Li devis resti kaj gardi ĝin, ĝis savaŭto venos por tiri la gnomaŭton al aŭtomalsanulejo, kaj poste lia nevino devos porti la korbojn al hotelo kaj mendi ĉambrojn kaj atendi ĝis la aŭtokirurgo finfaros sian operacion.

Rodney kompreneble enskribis ilin sub iliaj inkognitonomoj Timotheus T. Pettigrew kaj Pamela Pettigrew. Sed ĉifoje li ne havis multan esperon pri sukceso. Li komprenis, ke la policisto perfidos lian sekreton, kiam li venos al la stacio, kaj la gazetistoj ĉiam tenas kontakton kun la policejoj. Kiam la ĵurnalistoj nur ekhavis spuron, ili facile povas ekscii, kien la gnomaŭto estis transportita, kaj kiam ili ekscios, ke la pasaĝeroj portis du grandajn salikokorbojn, estos facila ludo trovi la hotelon, kie ili enskribiĝis. Rodney nun sciis, ke la hoteloj ĉiam kunlaboras kun la ĵurnalistoj.

Pro tio li tute ne miriĝis, kiam la telefono sonoris kaj ĝentila voĉo demandis: "Ĉu estas sinjoro Sinsabow?"

"Vi certe venis al malĝusta ĉambro," respondis Rodney.

"Ĉu eble estas sinjoro Pettigrew?"

"Jes, estas."

"Jes, sinjoro Pettibow — pardonu, sinjoro Sinsagrew — estas tiel, ke mi estas ĵurnalisto de *La Vespera Fulmo*, nia loka gazeto, kaj mi volonte farus kelkajn demandojn pri la reĝaj abisenaj anseridoj."

"Mi bedaŭras," diris Rodney, "sed tio bedaŭrinde ne eblas."

"Kial ne, sinjoro Pettibow?"

"Fulmas tiel terure ĉirkaŭ mi."

"Mi komprenas — ha ha ha! Sed serioze dirite, sinjoro Sinsapet, vi ne povas imagi, kian intereson la reĝaj abisenaj anseridoj kaŭzis. Ĉiuj gazetoj en la tuta lando provis kontakti vin. Ĉu vi povas rakonti, ĉu ĉiuj ovoj estas elkovitaj kaj ĉu vi havas dektri anseridojn?"

"Fulmas ankaŭ ĉirkaŭ la anseridoj."

"Ĉu vi havas ilin en tiuj korboj, sinjoro Pettisin?"

"En la korboj mi havas filikojn."

"Sed kara sinjoro Abbysin, ĉu vi ne povas rakonti al mi, ĉu la anseroj kuŝas sur la filikoj?"

"Mi bedaŭras, sed mi ne havas tempon babili kun vi. Kunboligu vian historion tute laŭplaĉe."

"Sed, sinjoro Abbygrew ..."

"Jes, certe vi faros tion multe pli bone ol mi. Vi havas praktikon."

"Ĉu estas serioze?"

"Kiun signifon havas la fakto, ĉu mi estas serioza aŭ ne?"

Rodney remetis la telefonon, kaj Elizabeto kaj Bobo skuiĝis

pro rido. Kiam ili provis diveni, kion la ĵurnalisto nun kreos per sia fantazio, ili subridis kaj ridis pli kore. Bobo opiniis, ke la gazetoj de la granduloj havas ĉarmajn nomojn — *La Vespera Trumpeto* kaj *La Vespera Fulmo*.

La tempo proksimiĝis al la dekdua, kaj Rodney diris, ke la historio post du horoj estos konata ĉie en la urbo. Ili devos forlasi tiun lokon kiel eble plej baldaŭ. Li iris al la gnomaŭta malsanulejo por kontroli, kiel la operacio progresis. Kiam li revenis, li aspektis tre ĉagrenita. La difektoj estis pli severaj ol oni kredis, kaj ili devos havigi novan malantaŭan akson el iu proksima urbo. Ne eblos ricevi la gnomaŭton antaŭ la vespero.

”Ni havos novan batalon kun la fotistoj,” diris la lignaĵ-heredonto. ”Mi jam elektis dikan viron en la vestiblo.”

Rodney kunportis iom da manĝaĵo, ĉar ili ja ne povis kunpreni la gnomojn en restoracio. Ili manĝis sian lunĉon. Antaŭ ol ili estis pretaj, la telefono sonoris denove, kaj estis korespondanto de telegramagentejo, kiu volis koni la nomojn de la dektri reĝaj abisenaj anseridoj.

”Nu, bone,” diris Rodney, ”ĉu vi estas preta skribi?”

Li komencis dikti:

”Alfa, Beta, Gama, Delta, Epsilon, Zeta, Eta, Teta — mi forĝis la sekvantajn, sed se vi havas grekan gramatikon en la kontoro vi povas trovi ilin mem Kapa, Lambda, Mi, Ni, Omikron. Estas literoj de la greka alfabeto, kaj la du unuaj donis al ni la vorton alfabeto”.

”Sed tio estas dekkvar, sinjoro Sinsabow.”

”Tiaokaze vi povas forigi Omikron.”

La ĵurnalisto volis scii, ĉu la anseridoj jam ricevis siajn okuldentojn. Rodney respondis, ke li igis alian ĵurnaliston la-

bori pri tiuj detaloj, kaj se li lasus du labori pri la sama afero povus okazi, ke ili venos al malsamaj rezultoj. Bedaŭrinde Rodney ne memoris la nomon de la unua ĵurnalisto, sed la historio tre baldaŭ malkovriĝos, kaj kia ajn ĝi estos, ĝi tamen estos korekta. Poste Rodney remetis la telefonilon kaj petis la hotelan telefonistinon, ke ŝi ne servu plurajn interparolojn al li, kaj li pendigis la ŝildon: "Ne ĝenu!" sur la porda anso.

Post du horoj Rodney malsupreniris kaj havigis posttagmezan gazeton. En ĝi troviĝis denove unu el tiuj fantaziaj raportoj, kiuj ridigis la tutan landon. La ĵurnalisto rakontis, kiel la ekscentra juna milionula filo muntigis kovaparaton en la malantaŭa luko sur sia multekosta aŭto kaj en ĝi kovis la ovojn de la reĝaj abisenaj anseroj, dum li faris rondveturon en Usono. Li havis nun dektri reĝajn abisenajn anseridojn en du grandaj salikokorboj, kie ili kuŝis sur filikoj, kiujn li kunportis de la altaj montoj.

Ĉiuj tiuj etaj estaĵoj havis helruĝajn vangojn kaj orajn kronojn sur la kapoj same kiel iliaj tiel malfeliĉe mortintaj gepatroj. Ili jam lernis balancigi la vostojn, respondi demandojn, kaj nun ili survojas al fama kirurgo, kiu fendigos iliajn langojn, tiel ke oni povos instrui al ili paroli. La lignaĵheredonto valorigas ilin ĝis du mil dolarojn por unu paro, kaj li komunikis, ke li celas donaci ilin al Verda kruco, kiam ilia instruado estos finita.

Post kiam Elizabeto kaj Bobo finridis pri tiu historio, ili devis dediĉi sin al la grava problemo, kiel liberigi sin de la ĵurnalistoj. Ĉar la aŭto havis registronumeron de la ŝtato Vaŝingtono, ili estus rekonataj en ĉiu urbo, kie ili aperos, kaj ili estos persekutataj kaj neniam havos pacon aŭ kvieton en iu hotelo. Elizabeto diris, ke ilia sola ebleco estos veturi en la kam-

paron kaj aĉeti dektri anseridojn, farbi ilin kaj fari novan aŭkcion. Glogo diris, ke li ne eltenas kaŭzi al siaj amikoj tiom da ĝenoj kaj elspezoj — la sola ĝusta ago estus kiel eble plej baldaŭ reiri al la sekvojaj arbaroj. Sed Rodney diris, ke ĉi tio estas nur stultaĵoj, li neniam en sia vivo tiel amuziĝis — estis ludo, kiun li ludas kun la gazetoj. Bobo kaj Elizabeto samopiniis kun li, kaj la miljara gnomo retiriĝis en sian korbon.

Dekunua ĉapitro

En kiu la gnomkaptantoj kaptas sian ŝancon

Ili estis daŭre okupitaj en la diskuto, kion ili faru por veni al la Ozark-montoj, kiam ili aŭdis frapon sur la pordo. Bobo retiris sin en sian korbon kaj Elizabeto metis la kovrilojn sur ambaŭ korbojn. Rodney iris al la pordo, sed li ne malfermis.

”Kiu tie?” li demandis.

”Iu kiu volas trafi sinjoron Pettigrew,” aŭdiĝis voĉo.

”Ĉu vi ne vidas, ke mi pendigis ŝildon kun la teksto: ‘Ne ĝenu!’ ”

”Sed ĉi tio estas tre grava, sinjoro Pettigrew.”

”Kion vi volas?”

”Ĉu mi ne povas paroli kun vi, nur momenton?”

”Pri kio vi volas paroli?”

”Mi volas aĉeti la reĝajn abisenajn anseridojn.”

”Ili ne estas vendotaj.”

”Mi estas preta pagi la plenan prezon,” sinjoro Pettigrew, ”dektri mil dolarojn por la tuta grupo.”

”Mi ne estas interesita.”

”Pago per atestita ĉeko, sinjoro Pettigrew — aŭ per kontanta mono, se vi tiel deziras.”

”Mi ne havas anseridojn por vendo.”

”Mi povas eventuale altigi mian proponon, sinjoro Pettigrew.”

”Mi ja diras, ke ne tuŝas min, kion vi proponas.”

”Vi parolas kun unu el la plej grandaj kanonoj en la branĉo

de plezurado, sinjoro Pettigrew, kaj fakte ne estas saĝe de vi forpuŝi min sen eĉ aŭskulti.”

”Mi ja diras, ke mi ne estas interesita. Bonvolu foriri, kaj ne plu frapu sur mian pardonon.”

Fariĝis silento, kaj post kelkaj minutoj Rodney silente sur piedpintoj iris al la pordo en la alia ĉambro. Li malfermis ĝin singarde kaj rigardis en la koridoron por esti certa, ke neniu staras aŭskultante.

Ili reprenis la diskuton, kiel ili povu eviti ĵurnalistojn kaj aliajn ĝenajn malagrabraĵojn. Rodney diris, ke li devas iri por havigi iom da mono. — Sen mono estas maleble eviti malagrabraĵojn en la mondo de granduloj. — Li admonis Elizabeton resti ĉe la gnomoj kaj malpermesis al ŝi sub iaj ajn pretekstoj malfermi la pardonon de iu el la du ĉambroj. Poste li forrapidis.

Elizabeto kaj Bobo ĉiam bone amuziĝis kune. Bobo faris multajn demandojn pri la mondo de la granduloj kaj postulis tiom da klarigoj, ke estis vere utila eduko por knabineto provi kontentigi lin. Nun li volis scii ĉion pri eminentuloj en la branĉo de amuzado, kio ili estas kaj kion ili havas por montri kaj kiam kaj kiel. Ĉu ili gajnas monon, kaj en tiu okazo kiom? Ne estis facile por Elizabeto respondi demandojn de tiu speco.

Kiam Rodney ricevis sian monon, li revenis. Li ankaŭ kunportis vespermanĝon. Ili manĝis kaj poste ili sidis dum iom da tempo kaj kartludis, kaj poste Rodney iris rigardi, kiel la riparado de lia aŭto prosperis. Denove li admonis la nevinon resti ĉe la gnomoj kaj ne malfermi la pardonon.

Kelkaj minutoj pasis, kaj Elizabeto kaj Bobo estis meze de ludo, kiam la telefono sonoris kaj ŝi respondis. Subite ŝi eli-

gis vokon de teruro kaj paliĝis. Ŝi aŭdis viran voĉon en la telefono, kiu diris:

”Via onklo Rodney estas surveturita de aŭto. Vi devas veni ĉi tien tuj.”

”Ho, kie, kie?” kriis Elizabeto.

”Ĉe la Ĉefstrato,” respondis la voĉo. ”Du kvartalojn okcidente de la hotelo. Venu tuj.”

Elizabeto lasis la telefonilon. Ŝi estis proksima al sveno.

”Ho, Bobo, Glogo! Rodney estas surveturita de aŭto. Eble li mortis!”

”Ĉu ni povas kuniri?” kriis Bobo.

”Ne, ne,” ŝi respondis. ”Vi ne povas veni sur la straton. Atendu ĉi tie, mi revenos kiel eble plej rapide.”

Kaj sen plua hezito ŝi prenis la ĉapon, kuris el la ĉambro kaj la porda klako fermiĝis post ŝi.

Ŝi eĉ ne havis la paciencon atendi la lifton, ŝi kuregis mal-supren en la ŝtuparo kaj tra la vestiblo kaj eksteren sur la straton.

”Kie estas la Ĉefstrato?” ŝi demandis al plej proksima promenanto, kaj: ”En kiu direkto estas okcidento?” ŝi demandis alian. Ŝi kuregis sur la strato, plorsingultanta kaj duonsufokita kaj malkvieta.

Ŝi preterkuris du kvartalojn, poste ŝi haltis kaj ĉirkaŭrigardis. Ŝi atendis ekvidi aron da homoj, sed ne estis, kaj neniu signo pri io nekutima en iu el la kvar anguloj. Ŝi rigardis en ĉiujn direktojn, kaj fine ŝi kuregis al viro, kiu havis gazetbendon en proksima angulo.

”Mia onklo,” ŝi vokis, ”kie li estas?”

Kaj kiam ŝi vidis, ke la viro aspektas konfuzita, ŝi aldonis:

”Li estis surveturita de aŭto.”

”Kie?” demandis la viro.

”En tiu ĉi angulo — tion mi ĵus eksciis.”

”Ĉi tie neniu estis surveturita,” diris la viro. ”Almenaŭ ne dum mi staris ĉi tie.”

”Mi eksciis, ke ĝi okazis sur Ĉefstrato, du kvartalojn okcidente de hotelo Travelers.”

”Estas ekzakte ĉi tie,” diris la viro, ”sed ili verŝajne eraris iamaniere. Ĉi tie neniu estas surveturita. Kiu rakontis tion al vi?”

”Iu telefonis. Ho, devas esti en la proksimeco.”

Elizabeto rigardis denove en ĉiujn direktojn, kaj subite ŝi eligis fortan vokon: ”Rodney! Rodney!” kaj ekkuris kiel eble plej rapide.

Tie venis ŝia onklo vivanta, kaj li aspektis tute nevundita. Li turnis sin, kiam li aŭdis ŝin voki:

”Ho, Rodney, Rodney! Ĉu vi fariĝis vundita?”

”Vundita?” li diris kaj aspektis konfuzita.

”Mi eksciis, ke vi estis surveturigita.”

”Mi? Kiu diris tion?”

Oni aŭdis de lia voĉo, ke li fariĝis malkvieta.

”Iu telefonis al la hotelo.”

”Kiu?”

”Mi ne scias — estis viro.”

”Kaj vi lasis la gnomojn solaj?”

”Kion mi faru, Rodney? Li diris, ke mi devas rapidi al vi.”

”Venu!” vokis Rodney. Li turnis sin sen atendi.

Elizabeto kaj li kuris plejeble rapide. Elizabeto sekvis, sed li estis longe antaŭ ŝi.

Li estis jam en la ĉambro, kiam ŝi venis. Kiam ŝi vidis lian vizaĝesprimon, ŝia koro preskaŭ haltis.

”Ili estas for,” diris Rodney.

”Ve, ve!” vokis Elizabeto kaj ekploris. ”Bobo, Glogo!” ŝi kriis per ĉiuj fortoj.

”Tio ne helpas,” diris Rodney. ”Mi rigardis ĉie. Ili estas for.”

”Sed kie, Rodney?”

”Ili devas esti ŝtelitaj. Ĉu vi ne komprenas — estis artifiko por forigi vin.”

Elizabeto kaŝis la vizaĝon per la manoj kaj ploris torentajn larmojn. Rodney ŝlosis la pordon, kaj la knabino ĵetis sin sur la liton kaj singultis kvazaŭ ŝia koro volus krevi. ”Ho Bobo! Glogo!” Ŝi vokis iliajn nomojn fojon post fojo. Ŝi ne volis kredi, ke ŝiaj amiketoj ne troviĝas en la ĉambro. Sed Rodney diris, ke li serĉis ĉie. La korboj restis, sed la gnomoj estis for.

Elizabeto eksidis kun la larmoj daŭre fluantaj.

”Rodney, ni devas trovi ilin! Ni devas sciigi al la polico.”

”Tion ni ne povas, mia kara.”

”Kial ne?”

”Ĉu vi ne komprenas? Ni ne povas rakonti al la polico, ke ni havis du gnomojn en la aŭto.”

”Kial ne?”

”Ili kredus, ke mi provas moki ilin. Ne ekzistas homo, kiu kredas je gnomoj.”

”Do vi kredas, ke ili estas por ĉiam for?”

”Ne, tion mi ne kredas. Mi kredas, ke ni povos trovi ilin, sed ne per helpo de la policistaro. Vi povas esti certa, ke tiu, kiu ŝtelis ilin, havas aŭton, kaj ke li survojas al alia urbo.”

”Sed Rodney, ili mortos! Kiel terure! Kiel timige!”

”Ne, mia kara, mi ne kredas, ke ni devas timi. Ili certe estos bone flegataj.”

”Kiel vi povas scii tion?”

”Ili estas tro valoraj.”

”En kiu rilato?”

”Ili estas uzeblaj en la amuzeja branĉo. La anseridoj valoris mil dolarojn, sed la gnomoj valoras milionon. Kiu ajn posedas ilin, li zorgeme flegos ilin.”

”Sed, Rodney, kiel ili povas aranĝi sian vivon sen ni?”

Elizabeto denove ekploris. Rodney provis klarigi al ŝi, ke larmoj ne helpas. Ili devas teni siajn kapojn malvarmaj kaj pricerbumi, kion ili povas fari por siaj amiketoj.

”Ne estas malfacile kompreni, kio okazis,” li diris. ”La varieteulo provis aĉeti la anseridojn, kaj kiam tio malsukcesis, li decidis ŝteli ilin, aŭ pagi iun, kiu faru tion por li. La ŝtelisto havis skatolon aŭ vojaĝsaketon kun si kaj ĉefŝlosilon, per kiu li povis veni en la ĉambron, kaj kiam li ekvidis la gnomojn, li tuj komprenis, ke li trovis ion multe pli valoran ol la anseridoj.”

”Ho, Rodney. La etaj kompatinduloj devas esti plenplenaj de timego.”

”Tion mi apenaŭ kredas,” diris Rodney. ”Glogo ne multe atentis, kio okazas al li, kaj Bobo jam scias, kion li volas. La viro baldaŭ komprenigos al ili, ke li ne intencas fari ion malbonan.”

Elizabeto denove ekploris kaj riproĉis sin amare pro sia malsingardo. Sed Rodney diris, ke estis vere ruze planita artifiko kaj ke ŝi apenaŭ povus agi alimaniere. Kaj kiam Elizabeto poste pripensis, kiel timigita kaj senespera ŝi fariĝis, kiam ŝi pensis, ke Rodney eble mortis, ŝi preskaŭ fariĝis gaja.

Ili havis la senton, ke ili ne agis korekte al siaj amiketoj, kiam ili nur sidis tie sen fari ion en tiu malfacila situacio. Sed Rodney diris, ke se ili alarmus, ili eble logus la ŝtelistojn al

drastaj rimedoj. Ne estus malfacile por ili liberigi sin de la etuloj kaj enterigi la korpojn, aŭ ili povus kaŝi ilin kaj pli poste veturi kun ili al fremda lando. Sed se Rodney kaj Elizabeto atendos, la ŝtelistoj povos supozi, ke ili ne havas multan intereson pri la gnomoj, kaj ke ili ankaŭ ne volas okazigi skandalon.

Rodney parolis kun sia nevino kaj petis, ke ŝi diru sian opinion, kvazaŭ ŝi estus jam plenkreska persono. Li faris tion por konsoli kaj distri ŝin, ĉar vere li sentis same kiel ŝi, ke la malapero de Glogo kaj Bobo lasis vakuon en ilia vivo. La hotelĉambroj ne plu estis kiel pli frue, kaj la gnomaŭto ankaŭ ne estos kiel pli frue. Rodney komprenis, ke li devas babili kaj ŝerci laŭ povo. Li diris, ke li legis pri infanŝtelistoj, sed tio estis la unua fojo li aŭdis pri gnomŝtelistoj.

La plej bona metodo spuri la gnomojn estus per detektiva agentejo. Ne estas dubo, ke varietea viro estis la ŝtelisto aŭ tiu, kiun li dungis. Ne estos malfacile ekscii, se iu el la granduloj en la branĉo de amuzado vizitis la urbon. Kio estis lia nomo, kaj kie li loĝas? Ĉu li anoncis sin ĉe la akcepteja tablo antaŭ ol li supreniris kaj frapis al la pordo de Rodney?

Ĉu li subaĉetis iun en la servistaro? Ĉi tiujn problemojn privatdetektivo devus povi solvi.

Kaj kion la viro intencis fari kun la gnomoj? Li ne povis ion gajni per ili, se li ne montros ilin ie, kaj tio baldaŭ estos konata. Se li reklamos ilin kiel gnomoj, estus granda sensacio, kaj ĉiuj gazetoj tuj ĵetus sin sur la historion. Kaj eĉ se li nomos ilin pigmeoj, ili estus la plej malgrandaj pigmeoj, kiujn oni iam vidis kaj vekus atenton en la plej vastaj rondoj. La branĉo de distrado havas fakgazetojn, en kiuj oni povas vidi, kio oka-

zas en tiuj sferoj, kaj frue aŭ malfrue tiuj gazetoj skribos ion pri tiuj mistikaj uletoj.

Elizabeto denove ekploris. Estis timige pensi, ke ŝiaj amiketoj devos sin prezenti en cirko aŭ muzeo aŭ kio estos. Rodney diris, ke li ne kredas, ke Bobo kontraŭas tion, kaj koncerne Glogon, por li estis egale, kie li troviĝas.

Rodney klarigis: "Mi kompreneble ne volas fari lin malgaja dirante tion, sed inter ni, mi ne kredas, ke ekzistas aliaj gnomoj, kaj krome mi ne kredas, ke Bobo ŝatas daŭre vivi kiel gnomo. Glogo estos iom post iom pli malkontenta kun sia nepo."

Elizabeto kunsentis, ke ĉi tio estas verŝajna. Rodney do iris al la telefono kaj telefonis al la ĉefo de detektiva agentejo en St. Louis. Li petis ilin sen prokrasto sendi duon de siaj spurserĉistoj. La viroj devus tuj sidiĝi en aŭton kaj veturi al la urbo, kie Rodney estas, kaj li atendos ilin post du horoj.

"Kaj nun," diris Rodney, "ni devas aranĝi, ke ni forlasos la historion kun la anseroj. La vestiblo estas plenplena de homoj, kiuj atendas okazon fiksrigardi nin, kaj tion mi volas eviti."

Li telefonis al la redaktoro de *La Vespera Fulmo* kaj diris, ke li kun ĝojo akceptus viziton de ĵurnalisto. Kiam tiu alvenis, Rodney faris unun el siaj dignaj, bone pripensitaj paroladoj. Li diris, ke li malŝatas tumulton kaj homamasigojn, kion inter alie ankaŭ la anseridoj faras. Ili estis sentemaj etaj estaĵoj, kiuj facile timiĝas kaj ne havas kutimon aperi publike. Rodney tial estis transportinta ilin al kampara bieno, kiu apartenas al amiko, kaj interkonsentis kun li, ke ili restos tie kaj vivos sanan kamparan vivon kun sufiĉe da suno kaj freŝa aero kaj tiom da lakto kaj butero kaj ovoĵoj kaj freŝaj fruktoj kaj legomoj

kiom anseridoj bezonas. Kiam ili estos pli aĝaj, Rodney edukos kaj instruos ilin, kaj fine li transdonos ilin al Verda kruco. Estas la tuta historio, kaj Rodney esperis, ke la gazetoj kaj la publiko respektos la rajton al privata vivo por la anseridoj.

La ĵurnalisto kompreneble volis scii, kie tiu kampara bieno situas, sed Rodney diris, ke li estas tre malĝoja, sed se li rakontus tion, lia tuta plano estus neniigita. La viro tiam demandis, ĉu la bieno situas ie en ĉi tiu regiono. Rodney diris, ke tiun aferon li lasas al la divenkapablo de la ĵurnalisto. Lia sola celo estis konvinki la gazetaron, ke la anseridoj ne troviĝas en lia hotelĉambro. Rodney estis forpreninta la kusenojn el la korboj sed lasinta la filikojn. Kaj nun li montris ilin al la ĵurnalisto kaj petis lin traserĉi la ĉambron por konvinki sin, ke ne troviĝas kaŝitaj anseridoj. Rodney diris, ke lia plej varma espero estas, ke la publiko forgesos lin. La trompita ĵurnalisto malaperis.

Du fortaj severaj viroj baldaŭ aperis kaj montris siajn vizitkartojn, kiuj klarigis, ke ili estas privatdetektivoj el St. Louis. Smith kaj Guggins ili nomiĝis, kaj ili gapis pro surprizo, kiam la lignaĵheredonto komunikis al ili, ke la 'reĝaj abisenaj anseroj', kiuj kaŭzis unupaĝajn titolojn en la tuta lando dum la lasta monato, fakte estis pura fantaziaĵo por kaŝi la ekziston de du etaj pigmeoj, kiuj entreprenis rondvojaĝon en la lando per la aŭto de la lignaĵheredonto.

Kiam la du viroj eksciis, ke ekzistas du estaĵoj, kiuj aspektas ekzakte kiel homoj, sed kiuj estas apenaŭ kvardek centimetrojn altaj, kvankam ili estas plenkreskaj kaj povas iri kaj paroli, ili malfacile povis decidi, ĉu ĉi tio estas serioza komisiono aŭ nova ŝerco de tiu juna viro, kiu ŝajnis havi pli da mono ol cerbo.

”Bedaŭrinde mi ne povas rakonti al vi, kie mi trovis Bobon kaj Glogon,” daŭrigis Rodney. ”Mi povas nur diri, ke ili ekzistas kaj ke ili estas ŝtelitaj kaj ke mi volas rehavi ilin. Krom tiu sumo, kiu mi ŝuldos al via firmao, mi estas preta pagi al vi mil dolarojn po persono, se kaj kiam vi sukcesos trovi ilin.”

Ĉi tio sonis kiel negoco. Rodney daŭrigis klarigi, kiajn gvidfadenojn li havas. La viroj interkonsentis, ke li agis saĝe tenante la aferon sekreta, kaj ili diris, ke ili tuj komencos labori kaj raporti ĉion, kion ili trovos.

Montriĝis esti simpla afero. Vizito ĉe la loka redaktoro de la gazeto donis la sciigon, ke bonkonata grandulo en la branĉo de distraĵoj, sinjoro Morris Quakston estis vizitinta la urbon. Li posedis ĉenon de etaj kinejoj kun la ĉefoficejo en Ĉikago, kaj la gazeto havis intervjuon kun li, kiu ankaŭ prezentis lian bildon, kio estis je granda helpo. Montriĝis ankaŭ, ke li loĝis en hotelo Travelers, kio faris la aferon pli facila.

En la vestiblo unu detektivo diris al la pordisto, ke li estas sendependa fotisto kaj ke li volis havi kontakton kun sinjoro Quakston. Tiam li aŭdis, ke tiu forlasis la hotelon antaŭ du horoj. Li estis kune kun iu sinjoro Charles Willowby, kaj tiu forveturis samtempe. La detektivo ricevis ankaŭ priskribon de la sinjoroj. Dumtempe la alia detektivo serĉis la parkejon, kie Quakston parkis sian aŭton kaj eksciis, ke li ne havis alian personon en la aŭto, kiam li forlasis la urbon. Elirante el la supozo, ke riĉa kaj bonkonata viro ne riskus sian renomon ŝtelante kelkajn anseridojn, la detektivo faris demandojn inter la vendistoj de uzitaj aŭtoj, kaj eksciis, ke viro, kies aspekto akordiĝis kun Willowby, estis aĉetinta etan aŭton sub la nomo Alfred Post kaj ekveturis malfrue en la posttagmezo.

La detektivoj reiris por doni raporton al Rodney kaj Eliza-

beto. Sendube Willowby ŝtelis la pigmeojn, kaj li faris tion laŭ komisiono de Quakston, opiniis la detektivoj. Kaj Quakston certe volis gajni monon per prezentado de la pigmeoj. Kaj nun estis demando, kion Rodney volis fari pri la afero.

Rodney respondis sen hezito, ke li volas rehavi la gnomojn — tio signifas la pigmeojn. La kaŝitaj rigardoj de Guggins kaj Smith montris al Rodney, ke ili rimarkis lian eraran esprimon, sed ili diris nenion. Ĉu li volis enigi la du virojn en malliberejon? ili demandis. Ne, diris Rodney, li nur volas savi siajn amiketojn. Tio simpligas la aferon, diris la detektivoj — en tiu okazo la kontraŭuloj ne faros same fortajn kontraŭagojn.

Smith iris paroli kun unu el la purigistinoj en la hotelo. Li rakontis kortuŝan historion pri la eta Elizabeto, kiu kreskis kune kun du invalidaj pigmeoj, kiu amis ilin tiel ege, ke ŝi preskaŭ volis morti pro ĉagreno, ke ili estas ŝtelitaj. Ŝi volis, ke neniu estu punata, kaj se la purigistino volos helpi ŝin, ĉio estos kaŝita al la publiko, kaj jen ŝi akceptu dudekdolaran bileton kun bondeziroj de la knabineto. Tio persvadis la purigistinon kaj ŝi konfesis, ke sinjoro Willowby estis dirinta, ke li estis dungita de la sekreta polico kaj ke Rodney tute ne estis milionulo, sed danĝera maskita falsigisto, kaj ke la korboj enhavis ilojn por fari falsan monon. Kaj ĉar tiu historio estis sekvata de nefalsa dekdolara monbileto, la purigistino donis al li la ŝlosilon de la ĉambro de Rodney.

Tio decidis la aferon.

”Ni veturos al Ĉikago,” diris Rodney.

La detektivoj konsentis, ke tio estas la ĝusta daŭrigo. Kaj al Elizabeto Rodney diris:

”Nun ni metos niajn manojn sur la gnomŝtelistojn.”

Dekdua ĉapitro

En kiu la gnomŝtelistoj estas trovitaj

La sekvantan matenon la gnomaŭto estis preta, kaj la ekspedicio startis. La du korbojn — kaj, ve, kiel malplenaj ili sentiĝis, kaj kiel malplena la gnomaŭto sentiĝis, kiam estis silente en la malantaŭa sidloko dum la tuta tago. Neniu, kiu povis nombri bovinojn kun Elizabeto! Neniu, kiu faras demandojn pri ĉiuj mirigaĵoj, kiujn ili preterpasis dum la veturo.

Sed multon ili tamen havis por pripensi lige al tiu nova aventuro. Elizabeto kompreneble plurfoje estis en kinejo, kaj tial ŝi sciis sufiĉe multe pri krimuloj — kiel ili aspektas kaj kiel ili parolas kaj kiel ili vivas. Ŝi konis diversajn metodojn ĉasi ilin kaj kapti ilin. Kaj nun ŝi subite aperis en vera filmo, ŝi ludis veran detektivon, kaj du veraj detektivoj postsekvis ilin en alia aŭto. Estis tute nature, ke ŝi ekscitiĝis en la streĉo de tia aventuro. Elizabeto tute ĉesis sin okupi pri infanecaj aferoj, kiel veti pri aŭtonumerojn kaj simile, kaj aplikis celkonscie la monduman manieron de virina spurhundo.

Kie oni povis pensi, ke unu el la grandaj kanonoj en la branĉo de distro kaj amuzado konservas du ŝtelitajn gnomojn? Kiu ŝtelis ilin por li, kie kaj kiam? Ĉu li eble timigis ilin, batis ilin aŭ ĉu li provas esti afabla al ili por gajni ilian konfidon? Kiel li intencas aranĝi la prezentadon, kaj kia speco da homoj vizitos lin por proponi negocojn? Oni devas scii multajn aferojn, se oni volas aperi kiel sukcesa 'spurhundo'.

Rodney vizitis gazetaran budon kaj aĉetis numeron de *Va-*

riety, la landkonata organo por tiuj, kiuj vendas distron kaj amuzadon. Li kaj lia nevino amuziĝis reĝe, kiam ili provis deĉifri tiun strangan lingvon, kiun ĉi tiuj homoj uzas por makleri negocon. En *Variety* plej multo esprimiĝas per mallongigoj, ĉar la spaco estas multekosta. Elizabeto faris sian plejblon por kiel eble plej rapide penetri en tiun novan lingvon. Ili nome esperis, ke ili en tiu gazeto povos trovi novaĵojn pri siaj amiketoj, kaj estus ja granda malfeliĉo, se ili legus tiun gravan sciigon sen kompreni ĝin!

Ili venis al Ĉikago en la sama vespero. En la hotelĉambro ili havis novan diskuton kun Smith kaj Guggins. Ili aŭskultis la proponojn, kiujn tiuj valoraj sinjoroj elpensis, kaj aldonis siajn proprajn vidpunktojn. Ili komprenis, ke viro de amuzado, kiu fariĝis kulpa de gnomŝtelo, kompreneble atendas detektivojn je siaj kalkanoj, kaj ke li, almenaŭ por kelke da tempo, devos esti tre singarda koncerne novaj konatuloj. Mallerta provo kontakti lin povus do ne nur esti senrezulta, sed tute malbona. Ili decidis, ke la Ĉikaga kontoro de la detektiva entrepreno sendu virinan spurhundon por provi kontaktiĝi kun tajpistino ĉe la kontoro de Quakston. Krome Smith devos kontakti diversajn personojn en la branĉo de amuzado kaj ekscii ĉion pri la firmao de Quakston kaj liaj dungitoj. Guggins devas havigi ĉiujn eblajn sciojn pri foiroj en urbetoj kaj aliaj aranĝoj, kiuj povas havi intereson pri prezentado de pigmeoj.

Rodney kaj Elizabeto enskribis sin denove inkognite en la hotelo. Sed nun ne plu estis ŝerco, kial ili elektis nomojn, kiuj ŝajnis prudentaj kaj komunikis, ke ili estas el Novjorko. Rodney kredis, ke la gnomŝtelistoj vidis ilin en la urbeto en Missouri, tial ili restis en siaj ĉambroj kaj uzis la tempon kolek-

tante sciigojn pri la amuzeja branĉo en revuoj kaj gazetoj kaj per telefonado.

En la vespero Smith venis kun proksimume plena raporto pri la Quakstonaj entreprenoj. Inter alie li eksciis, ke Quakston ankaŭ havas kabineton de kuriozaĵoj, kiu interalie enhavis 'la gigantan damon', 'la barban damon', du pigmeojn kaj unu kvinkruran bovidon, kaj ke tiu kabineto rondiras inter lokoj, kie oni atendas multajn homojn.

"Mirigus min, se Bobo kaj Glogo iun belan tagon ne apartenos al tiu grupo," diris la detektivo.

La virina detektivo postsekvis la sekretariinon de Quakston al restoracio, kie ŝi manĝis sian lunĉon kaj komencis paroli kun ŝi. Ĉar la sekretariino ne sciis, ke ŝia ĉefo faris krimon, ŝi ne havis kialon esti suspektema. La virina detektivo interkonsentis pri renkontiĝo kun ŝi, kaj ili iris al varietea prezentado, kaj dum la daŭro de la vespero ili interbabilis pri la branĉo de distro. La detektivo rakontis, ke ŝi havas amikon, kiu laboras en la sama branĉo kaj je konvena okazo ŝi prezentos tiun amikon — kiu ne estis iu alia ol sinjoro Smith — al la sekretariino de Quakston.

Iom post iom la detektivoj eksciis pli multe pri la agado de Quakston. Ili eksciis, ke li havas novan logaĵon, kiun li kaŝis eĉ por sia sekretariino. Kaj ne daŭris longe antaŭ ol ili eksciis, ke tiu logaĵo estis konfidita al Charlie Willowby, asistanto de Quakston, kiu tenas ĝin en dometo, kiun li havas en la kamparo. Preskaŭ samtempe ankaŭ Guggins aŭdis dirojn pri tiu logaĵo, kaj li provis lupreni ĝin por montri ĝin al publiko en kampara foiro en Kentucky.

Smith asertis, ke li kiel knabo estis lerneja kamarado de Willowby. 'Olda Charlie', li nomis lin, kaj proponis kunpre-

ni la sekretariinon kaj veturi por viziti lin dum dimanĉa posttagmezo.

Ili veturis al la bieno de Willowby kaj eksciis, ke li estis tie en la pasinta tago, sed li forveturis sen diri kien. Smith sentis sin trompita, sed la sekretariino diris, ke ŝi plej malfrue post du tagoj povos scii, kien li veturis. Pli malpli frue venos telegramo aŭ telefona interparolo aŭ letero.

Rodney kaj Elizabeto, kiuj ricevis tiujn raportojn ĉiutage, opiniis, ke tio vere meritas la pagitan monon. Sed du tagojn poste ili spertis, ke ĝi ne estis pli valora ol matena gazeto. Rodney sidis ĉe sia matena kafo kaj rostita pano, kaj subite li ekkriis: "Jen ni havas Bobon!"

Elizabeto ekspiregis kaj tenis la spiron, dum Rodney legis mallongan noticon el Johnston, Pensilvanio, kiu komunikis, ke oni en foiro, kiu malfermiĝis pasinttage montris pigmeon, kiu laŭ diro estas la plej malgranda homa estaĵo, kiu iam ekzistis. Li estis ekzakte tridek ses centimetrojn kaj du milimetrojn alta, sed malgraŭ tio en ĉiuj detaloj bone kreita knabo, kiu parolas saĝe kaj prudente kun ĉiuj. Li estas adopta filo de bone konata pigmeino, Flossie French, kiu kaŝis lian ekziston, ĉar ŝi ne volis lasi lin prezentiĝi antaŭ publiko, antaŭ ol li estis sufiĉe aĝa.

La gigantaj homamasoj, kiuj alvenis por rigardi lin la unuan tagon preskaŭ krevigis la cirkan tendegon.

"Ho, ĉu vi vere estas certa, ke estas Bobo?" elkriis Elizabeto.

"Ĉu povas esti iu alia?"

"Sed kie estas Glogo?"

"Mi supozas, ke li opinias, ke estas plej sekure komenci per unu. Vi vidas, ke ili donis al li patrinon — supozeble pro tio,

ke ili volas fari el li infanon — eble esperas ricevi leĝan kontrolon super li.”

”Ho, Rodney, tion ili ja ne povas fari?”

”Mi ne scias, kion ili povas fari. Ion ili certe celas. Supozeble ili ne povas kredi, ke ni pli aŭ malpli frue ne trovos lin.”

Rodney telefonis al la detektivoj, rakontis, kion li legis kaj petis ilin sekvi lin al Johnston. Li eble bezonos atestantojn aŭ korpgardistojn — kiu povas scii, kiel ĉio disvolviĝos? La du viroj kompreneble volis rigardi la etulojn, pri kiuj ili tiom aŭdis. Rodney promesis krome, ke ili ricevos mil dolarojn persone, kvankam estis li, kiu unue legis la gazeton. Tio ĉi kontribuis ne malgrave por stimuli ilin.

Dektria ĉapitro *En kiu Bobo enkluzas ilin*

La du aŭtojn ekmoviĝis, kaj du tagojn poste ili estis en ĝis troigo plenplena urbo en la montaro de Pensilvanio, kiu estis konstruita en mallarĝa valo, kie du riveroj kunfluas kaj kie la montoj estas plenaj de karbominejoj kaj fumo de ŝtaluzinoj. La foiro okazis sur herbejo, kiu situis iom fore ekster la urbo.

Kiam ili alvenis tien, ne estis malfacile trovi Bobon. La enirbileto al la foiro kostis kvindek cendojn, kaj se oni pagis ankoraŭ dek cendojn oni rajtis rigardi 'la plej malgrandan homan estaĵon en la historio de la homaro'. Estis strato rezervita por malgrandaj prezentadoj, kaj kiu nomiĝis 'La meza vojo'. Ĉe tiu strato estis granda tendo, kiu estis kovrita per grandaj afiŝoj, kiuj montris la plej malgrandan homan estaĵon kompare kun Petro Fingreto kaj aliaj hometoj, pigmeoj kaj etuloj. La tendo havis grandan enirejon kun pluraj biletĝiĉetoj kaj pluraj elirejoj.

Oni devis atendi kelkajn minutojn antaŭ ol ili enlasis ilin; la vico etendiĝis laŭ tuta 'Meza vojo'. 'La publiko enkluziĝis' kiel la homoj en tiu branĉo esprimis sin. Ekster la tendo staris kelkaj krianoncistoj, kiuj kriis:

"Sinjorinoj kaj sinjoroj, ne perdu la paciencon, la vicoj movas sin rapide, kaj ili movas sin ofte. Ne foriru antaŭ ol vi vidis la plej strangan kaj plej mirindan vidindaĵon, kiu iam montriĝis sur scenejo."

Kelkaj viroj iris laŭ la vicoj kaj vendis biletojn, tiel ke la spektantoj povis eniri rekte sen halti ĉe la biletbudoj.

Rodney kaj Elizabeto ekstaris en la vico kun siaj korpogardistoj kaj aĉetis biletojn kaj atendis sian vicon. Kiam ili venis en la tendon, ili vidis scenejon en la fono, kaj sur ĝi staris tablo kovrita per velura tuko. Antaŭ la scenejo oni metis ŝnuregon por eviti amasiĝon tro proksime al la scenejo. Seĝoj ne estis en la tendo, la spektantoj staris pacience atendantaj.

Subite la kurteno tiriĝis flanken, kaj viro en ornamita ruĝa livreo aperis portante pleton. Sur tiu pleto staris la plej malgranda el ĉiuj homaj estaĵoj. Aŭdiĝis murmuro pro mirego — preskaŭ nekredemo de la kolektitaj — kaj poste sekvis aplaŭdoj kaj aproboj kaj ĉarmiĝaj ridoj, kiam la eta, eta viro riverence kaj ridetante desaltis la pleton kaj proksimiĝis.

Estis vere Bobo — Bobo en sia eta bruna jako kaj sia mallonga pantalono. Li aspektis tre kontenta kun sia ekzisto, kaj tute ne embarasita, perfekta eta distriga artisto.

”Gesinjoroj,” li diris per sia eta pepa voĉo — ĝi estis tiel malforta, ke la publiko ne povis percepti ĝin, sed per helpo de mikrofono kaj laŭtparolilo ĝi fortiĝis, tiel ke ĝi plenigis la tendon kun sufiĉe forta sono.

”Gesinjoroj, ege ĝojigas min stari ĉi tie kaj vidi tiom da bonaj kaj afablaj vizaĝoj. Kompreneble surprizigas vin vidi tiel malgrandan personon kiel mi. Sed mi certigas vin, ke mi en ĉiuj rilatoj similas al la granduloj. Mi pensas kaj sentas, kiel vi. Kompreneble havas siajn problemojn esti tiel malgranda. Mi ekzemple ne povus eliri sur la straton kiel aliajn infanojn. Sed jen mi staras, kaj mi volas diri, ke ĝojigas min paroli al vi kaj rakonti pri mia vivo.”

Kaj tiel plu. Vere ne estis multo, kion Bobo rakontis, sed li

riverencis, gestadis, ridis kaj kantis iomete. Li faris sufiĉe da ĉio, por ke la publiko vidu, ke li estas vera, kaj li sciis, kion li faras kaj komprenis, kion li diras. Kiam li finis, la publiko ŝtorme aplaudis kaj la pedelo, kiu staris malantaŭ la tablo, alportis la pleteton. Bobo stariĝis sur ĝi kaj la pedelo portis lin malantaŭ la kurtenojn. Poste la anoncantoj eklaboris:

”Jen la vojo al la elirejo, sinjorinoj kaj sinjoroj. Moviĝu kiel eble plej rapide, bonvolu, estas aliaj, kiuj atendas por eniri kaj rigardi ĉi tiun mirindan prezentadon. Kaj ne forgesu rakonti al viaj geamikoj kaj admoni ilin veni ĉi tien kaj vidi la plej malgrandan el ĉiuj vivantaj estaĵoj!”

Rodney kaj Elizabeto kaj la korpgardistoj eliris kun la aliaj kaj serĉis kvietan lokon en la foira tereno, kie ili povis diskuti la situacion.

”Ŝajnas, ke ili tute ne timigis Bobon, sed tute male persvadis lin al libera kunlaboro,” diris Rodney. ”Ŝajnas, ke li estas kontenta kun tio, kaj eble estas ĝuste tio, kion li dum la tuta tempo volis fari.”

”Mi estas certa, ke li ne volis forlasi nin!” kriis Elizabeto.

”Ni ne havas multon, kion ni povas proponi al li, krom rekonduki lin al la sekvoja arbaro, kaj mi jam dum kelka tempo sentis, ke li ne plu sopiras tion. Ni ne povas preni Bobon kaj Glogon kun ni kaj proponi lokon al ili en mia hejmo — ni estus sieĝotaj de ĵurnalistoj kaj scivolemaj homamasoj, kiel vi jam vidis. Ni devas esti pretaj kompreni, ke Bobo elektis vivisian propran vivon.”

Ili interkonsentis trakti la aferon pli poste. Ili aĉetis biletojn por vidi la prezentadon ankoraŭ foje, kiel multaj aliaj faris. Ili premis sin en la plej antaŭan vicon, kaj kiam la prezentado de

Bobo proksimiĝos al la fino, Elizabeto plonĝu sub la ŝnuregon kaj kuru al Bobo kaj salutu lin.

”Ili ne provos malhelpi knabineton,” diris Rodney, ”kaj se ili faros tion, ni tri staros pretaj por kunhelpi.”

”Kion vi volas, ke mi diru, Rodney?”

”Parolu tute nature kun li. Diru, kio venos en vian kapon. Demandu, kiel li fartas kaj ĉu li volas, ke ni helpu lin iamaniere. Diru, ke se iu traktis lin malbone, li diru tion, kaj ke ni ĉiuj staras malantaŭe kaj kontrolas, ke li fartas bone. Se li estas timigita, lasu lin kompreni, ke li ne timu.”

Estis miriga informo por juna knabino, kiu estis edukita en la plej ekskluzivaj rondoj kaj instruĝis, ke ŝi sub ajnaj cirkonstancojn ne rajtas konduti tiel, ke ŝi vekas atenton. Kion kompatinda panjo dirus, se ŝi devus travivi tion ĉi? Aŭ se ŝi legos pri tio en la morgaŭaj gazetoj? Sed iamaniere Elizabeto tute forgesis pri la ekzisto de panjo, ŝi pensis nur pri Bobo. Panjo ne havis problemojn ĝuste nun, sed tion havis Bobo.

Ŝi staris plej ekstere ĉe unu flanko kaj apud la ŝnuro, sed ŝi kaŝis sin malantaŭ la larĝa sinjoro Guggins, por ke Bobo ne vidu ŝin tro frue. En la ĝusta momento, ekzakte kiam ŝia amiketo finis sian prezentadon, ŝi plonĝis sub la ŝnuregon, grimpis sur la podion kaj kriis:

”Bobo!”

Li haltigis sian parolon kaj eligis ĝojokrion:

”Elizabeto!”

Ŝi prenis lin en siajn brakojn. Kia ĝuo estis brakumi unu la alian tutkore!

Tio fariĝis bela fino de la ”prezentado”. La publiko ne povis diveni, ĉu estas vera renkontiĝo aŭ ĉu estas parto de la programo.

La pedelo en la ruĝa orumita uniformo staris tute mirigita. Ne daŭris longe antaŭ ol du aliaj viroj venis kurante tra la kurtenoj. Samtempe Rodney kaj la du privataj detektivoj rampis sub la ŝnuregon kaj proksimiĝis al la scenejo sen forlasi la atenton eĉ por momento. Sed ŝajnis, ke neniu klare scias, kion fari en tiu situacio. Elizabeto daŭrigis brakumi Bobon kaj Bobo daŭrigis brakumi Elizabeton, kaj ambaŭ esprimis sian ĝojon.

”Ho, Bobo! Ni estis tiel malkvietaj pri vi!”

”Mi ankaŭ estis sufiĉe maltrankvila. Sed poste mi komprenis, ke ĉio estas en ordo. Neniu faris ion malbonan al mi.”

”Do ili ne traktis vin malbone?”

”Ne, ne! Ili estas en la distra branĉo. Ilia sola deziro estas gajni monon.”

”Kaj vi — vi bonfartas?”

”Jes, sed mi tre atendis sciigon de vi. Ĉu vi ricevis la leteron?”

”Kiun leteron?”

”Ni skribis al Rodney al lia hejmo en Seattle. Mi ne konis alian adreson, al kiu mi povus skribi. Mi kredis, ke vi reiris tien.”

”Ne, ni provis trovi vin. Ho, Bobo, vi ne scias, kiom ni malhavis vin!”

”Nu, nun ĉio estas en plej bona ordo. Neniu kaŭzo por malkvietiĝo. Sed kie estas Rodney?”

”Jen vi havas lin,” Elizabeto diris. Kaj Rodney bezonis nur rampi sur la scenejon.

Ne estis malfacile vidi, kio vere okazis. — Bobo fariĝis konscia pri sia valoro. Bobo estis la plej granda teatra altirilo en la mondo, kaj Bobo devis esti tenita je bona humoro, alie ne

estos pluraj prezentadoj tiun posttagmezon, bonvolu esti afablaj!

Viroj ne kondukas kiel knabinoj. Ili ne ĵetas sin en la brakojn unu de la alia kaj kisas unu la alian, sed ili havas aliajn manierojn por montri, kiel gajaj ili estas. Rodney manskuis kun Bobo kaj batis lian dorson — per unu fingro — kaj diris: "Saluton al vi, olda artisto! Kiel la mondo traktas vin?"

Kaj Bobo respondis fiere kaj memfide:

"Ĉio marŝas, kiel vi vidas! La biletoj enspezigas proksimume mil dolarojn ĉiun tagon, kaj ni dividas duone-duone."

"Ĉu tion vi diras?" diris la lignaĵheredonto respektplene.

"Vi povas esti certa, ke mi tion diras," diris Bobo. "Ili provis trompi min, sed mi kontrolis, tiel ke ili ne sukcesis. Mi ricevas mian parton, alie mi kuŝiĝas en mia korbo, kiel Glogo."

"Kie estas Glogo?"

"En hotelo. Vi scias, kia li estas — li ne ŝatas ĉi tiun amuzaĵ-industrion. Mi tre ĝojas, ke vi venis, Rodney, kaj vi, Elizabeto, ĉar vi estas la solaj, kiuj povas helpi lin. Li tute ne estas vigla, kaj hieraŭ li havis svenatakon."

"Ho, kara Dio!" Elizabeto diris. "Bedaŭrinda aĝa Glogo!"

"Mi faris ĉion, kion mi povas por li," klarigis la nepo, "sed nenio helpas — li nun diras, ke li vivis tro longe."

Kiam ili venis al tiu punkto, unu el la viroj el la distra branĉo kuraĝis interrompi ilin.

"Ni ne sukcesas malplenigi la tendon," li diris.

La ĉiam praktika kaj efektiva Bobo respondis: "Vi tute pravas. Ni tiru nin malantaŭ la kurtenojn. Kaj miaj amikoj sekvos."

Elizabeto portis lin malantaŭ la scenejon. Tie estis pli malgranda tendo kun kelkaj tendoseĝoj kaj por Bobo tablo, kiu

funkciis kiel ĉambro por li kaj sur kiu staris pupseĝo kaj korbo kun kuseno. Ĉio estis belaspekta kaj taŭga, kaj la plej malgranda el ĉiuj homaj estaĵoj invitis siajn amikojn senti sin kiel hejme. Sinjoro Smith kaj sinjoro Guggins estis prezentitaj al li, kaj li prezentis al ili sinjoron Charles Willowby.

"Ne, sed vidu, 'honesto olda Charlie'," kriis Rodney. "Ĉu vi scias, ke vi estis lerneja kamarado de sinjoro Smith?"

"Ĉu?" diris Charlie kaj rigardis la privatdetektivon. "Mi petas pardonon, sed mi fakte ne memoras. En kiu lernejo estis?"

"Sinjoro Smith estas bona amiko de la sekretariino de Quakston," daŭrigis Rodney, kiu ĝojis senmezure.

"Ĉu vere?"

"Ni veturis al via bieno por viziti vin la pasintan dimanĉon, sed vi jam estis forveturinta."

"Mi bedaŭras," diris Charlie. Oni vidis, ke li komencis senti sin skuita.

"Kaj sinjoro Guggins ĉi tie," daŭrigis Rodney, "intertraktas kun sinjoro Quakston pri prezentado de Bobo ĉe kampara foiro en Kentucky."

"Ĉu, kion mi aŭdas?" diris Willowby. "Tre interese!"

"Vi vidas, ke ni de la komenco estas sinceraj al vi, Charlie."

"Ŝajnas tiel," diris la amuzeja korifeo, kiu fariĝis pli kaj pli malkvieta.

En la sama momento asistento aperis por atentigi, ke estas tempo por nova prezentado. La pedelo venis kun la pleto, kaj Bobo estis preta stariĝi sur ĝi, sed tiam intervenis Rodney.

"Ĉu vi iel kontraŭas, ke Elizabeto enportu vin, Bobo?" li demandis.

"Estus ĉarme," diris Bobo. "Ĉu vi volas?"

”Tion mi volonte faros,” Elizabeto diris, kaj tiel la plej malgranda el ĉiuj homaj estaĵoj estis prezentita de knabino, kaj tuj malantaŭ la kurtenoj staris tri grandaj fortikaj viroj por kontroli, ke neniu levas fingron por forporti la vireton.

Kiam la prezentado estis finita, Bobo daŭrigis sian agrablan interparolon kun Elizabeto, kaj Rodney prenis ”honestan oldan Charlie” flanken kaj havis sinceran interparolon kun li. Por faciligi la etoson li tuj diris, ke lia sola intereso estas certiĝi, ke Bobo bonfartas, kaj se estas la vera deziro de Bobo daŭrigi en la branĉo de distrado, Rodney ne kontraŭas tion kaj li volonte volos forgesi kaj pardoni. Tio igis Willowbyn konsiderinde pli bonhumora. Li ne konis la punleĝojn por gnomŝtelo, sed li havis senton, ke ili eventuale estas severaj. Li rapidis klarigi, ke ili faras ĉion, kion ili povas, por ke Bobo estu kontenta. Se sinjoro Sinsabow kaj lia nevino volos helpi lin en lia strebado, li estos tre dankema. Kaj ili certe ne bezonas timi, ke iu estos malbona al la etuloj aŭ ke ili estos tenataj en konstanta timo. La afero estas nome, diris honesta olda Charlie, ke oni baldaŭ lernas, ke oni neniam atingas rezulton per tiaj metodoj en la branĉo de amuzado. Ili funkcias nek kun homoj nek kun bestoj, neniu laboras bone, se li ne estas feliĉa kaj bonfartas.

”Mi ankaŭ volas certiĝi, ke Bobo havas kontentigan solvon rilate siajn rajtojn,” diris Rodney. Kaj denove Charlie rapidis kvietigi lin.

”Vi tute ne devas esti malkvieta pri tiu eta komercisto, sinjoro Sinsabow,” li diris. ”Mi ne scias, kie li lernis ĉion, kion li scias pri ĉi tiu afero, sed vi povas esti konvinkita, ke estis li, kiu diktis la kondiĉojn. La ĉefo preskaŭ volis forŝiri la harojn en pura malespero, antaŭ ol ni venis al interkonsento. Neniu

mono, neniŭ prezentado, diris la eta viro, kaj se vi ne agas korekte kun mi, mi rakontos tion al la publiko je la unua okazo, kaj petos ilin voki la policon. Do, kion ni povis fari?"

"Ĝojigas min aŭdi, ke li tiel bone pledis por siaj interesoj," diris Rodney. "Kie vi havas la kontrakton?"

"Li ne volis subskribi kontrakton. Li diris, ke li laboras tagon post tago, tiom longe ke li ricevas sian interkonsentitan parton de la taga enspezo. Je diablo, kiel li sukcesis lerni tiom pri la amuzeja industrio?"

"Li demandis min pri ĉio inter ĉielo kaj tero," respondis Rodney, "sed mi devas diri, ke mi ne havis antaŭsenton, por kio li intencos uzi siajn konojn."

"Sed, kredis min, li mem havis tute klaran celon," diris Charlie, "kaj ne estas dubo, ke li uzas siajn sciojn ĝuste. Baldaŭ li fariĝos sia propra ĉefo, li havos superflue da mono kaj povos havigi al si ĉion, kion li deziras en la mondo."

Bobo revenis en la sama momento de la scenejo kaj petis pardonon, ke li havis malmulte da tempo por siaj amikoj.

"Sed kiel vi komprenas, la prezentado devas daŭriĝi," li diris. Li demandis, ĉu ili ne volus fari viziton ĉe la avo kaj provus vigligi lin.

"Ni havos unuhoran paŭzon je la sesa," li diris, "kaj tiam ni povos paroli serioze."

Rodney aludis, ke la nuna ĉefo de Bobo eble faros provon forkonduki lin, sed Bobo forigis tion per rido. Quakston kaj Willowby havis bonegajn enspezojn per li. Ili restos ĉi tie, pri tio li estis konvinkita, kaj provos persvadi lin subskribi kontrakton longdaŭran. Sed Bobo dum la tuta tempo atendis, ke Rodney venu, li nome volis peti de li konsilon.

"Mi devas lerni pli bone legi," li diris, "kaj mi devas ankaŭ

lerni administri mian monon. Estas multaj aferoj, pri kiuj mi devas demandi vin. Vi scias, kiel estas, Rodney. Ĉiam estas homoj, kiuj volas vidi min, kaj estas ja nur kutima saĝa prudento, ke ili ankaŭ pagu por tio, kaj devas troviĝi pagitaj asistantoj, kiuj prizorgas min. Mi devos vivi en la grandula mondo post ĉi tio. Mi ne plu estas eta sovaĝulo, kiu loĝas en arbaro, kaj mi ankaŭ ne intencas reiri al tiu vivo, tion mi povas veti je via kapo. Ho ne, kaŝi sin en truitaj arboj ne plu estas la melodio por ĉi tiu gnometo”.

Dekkvara ĉapitro

En kiu unu el niaj amikoj adiaŭas

Rodney kaj Elizabeto ekiris al la hotelo, kie Glogo troviĝis, flegata de la fratino de Willowby. Ne estis multo, kion oni povis fari, la miljara gnomo kuŝis silenta en sia korbo, kaj fraŭlino Willowby okupis sin legante filmĵurnalojn. Bedaŭrinda aĝa Glogo — la neŭrastenio tute venkis lin, kaj li nur fermis la okulojn kaj lasis ĝin regi laŭvole.

Li skuiĝis, kiam Elizabeto diris lian nomon, malfermis la okulojn kaj provis eksidi. Jes, li estis tre kontenta vidi ilin. Li dum la tuta tempo estis certa, ke ili venos, sed li timis, ke estos tro malfrue. Post kiam li estis dirinta tion, li devis kuŝiĝi denove, li nome sentis sin tre malforta.

Elizabeto rigardis riproĉe al li. "Glogo," ŝi diris, "mi kredas, ke vi ne manĝas sufiĉe."

"Mi ne havas tre bonan apetiton," konfesis la maljuna gnomo.

"Sed ni atentos, ke vi komencos manĝi denove, Glogo."

"Kial mi manĝu? Ĉu estas io, kio restas al mi por fari en la vivo?"

"Ni ja provos trovi pliajn gnomojn," provis Rodney.

Glogo ridetis pale:

"Estas tre bone kaj afable de vi ambaŭ. Sed vi scias same bone kiel mi, ke ni ne havas iajn ŝancojn. La tempo de gnomoj estas pasinta."

"Sed vi ja ne povas kuŝi ĉi tiel!" ekkriis Elizabeto.

”Vi provis mistifiki min, kaj tion mi ankaŭ mem provis. Sed nun mi devas serioze rigardi la situacion. Mi vivis tro longe.”

Li ripetis siajn vortojn per pli malforta voĉo:

”Tro longe. Tro longe.”

”Ĉu vi volas, ke ni veturigu vin reen al la sekvojoj, Glogo?”

”Ne,” li diris. ”Mi volas tute nenion.”

Fariĝis longa silento. Fine Elizabeto, kiu ne volis permesi, ke la interparolo finiĝu, diris:

”Ni vizitis Bobon.”

”Bobo trovis vivon, kiu taŭgas por li,” diris la avo per voĉo, kiu similis al flustro.

”Estis fakte la sola, kion li povas fari, Glogo,” diris Rodney.

”Jes, mi scias. Mi ne mallaŭdas lin. Mi ne ŝatas tion, sed mi ne devas vidi ĝin tro longe.”

La neŭrastenio estis venkinta. Glogo denove fermis la okulojn, kaj ĉio estis silenta kaj kvieta.

Ili provis trovi ion por diri, kio povus vigligi lin, sed tio estis malfacila. Fine ili aŭdis malfortan flustron el la korbo:

”Vi ambaŭ estis tre bonaj al mi, kaj mi dankas vin por ĉio — mi dankas vin el mia tuta koro. Sed nun vi ne plu povas fari ion por mi. Mi estas tro laca, mi ne povas paroli. Nun vi devas adiaŭi.”

Tio estis ordono, kaj ili povis nur obei. Larmoj fluis laŭ la vangoj de Elizabeto — konvinkita, ke tio estis la lastaj vortoj, kiujn ili aŭdis de la maljuna gnomo.

”Adiaŭ Glogo,” ŝi murmuris kaj tuŝis la malfortan kaj velkantan manon, kiu jam sentiĝis malvarma.

”Adiaŭ Elizabeto, adiaŭ Rodney,” aŭdiĝis la malforta voĉo.

Ili forlasis la ĉambron silente sur la piedfingroj, ili reiris al

mondo loĝata de homoj, kiuj ankoraŭ ne vivis tro longe aŭ almenaŭ ne sciis, ke ili tion faris.

De la sesa ĝis la sepa estis paŭzo en la prezentadoj. Bobo ne pensis ĝismorte labori dum sia unua engaĝiĝo, li atentigis.

Li estis mendinta manĝon por si mem kaj siaj amikoj, kaj lia ordono plenumiĝis sen protestoj, ĉar Bobo estis riĉa gnomo, kaj li parolis kun la memklara aŭtoritateco, kiun li lernis de Rodney. Kaj Rodney estis amuzita kaj surprizita, kiam li vidis, kiom la eta favorito sukcesis ensuĉi dum ilia kunestado.

La prezentado denove komenciĝis. Rodney kaj Elizabeto dum kelkaj minutoj restis en la malantaŭa tendo en agrabla interparolo kun honesta olda Charlie. Ili venis al silenta interkonsento rigardi la de li plenumitan gnomŝtelon kiel pura eraro. Charlie aludis, ke li volonte scius, kie kaj kiam Rodney kaj Elizabeto estis trafintaj Bobon kaj Glogon, sed Rodney diris, ke Bobo povas rakonti kiom ajn li volas pri tiu afero.

Meze en ĉio venis sendito de fraŭlino Willowby, kiu komunikis, ke maljuna Glogo trankvile mortis en sia korbo. Rodney kaj Elizabeto estis antaŭsciintaj pri tio — la laca miljarulo klare petis ilin lasi lin morti en paco. Nun Elizabeto sidis tie kun larmoj en la okuloj, dum Rodney kaj la varietea viro diskutis la praktikajn vidpunktojn pri enterigo de gnomo. Ili interkonsentis ne sciigi Bobon antaŭ ol la prezentado estos finita por la tago je la deka. Sinjoro Willowby proponis imponan enterigon, kiu certe allogus inter ducent aŭ tricent personojn al la foira loko. Sed Rodney decide oponis sin al tio kaj diris, ke li tute ne volas enmiksiĝi en tian utiligon de la morta korpo de bedaŭrinda aĝa Glogo. La aĝulo dum sia vivo ja ĉiam esprimis profundan malamon al la amuzeja branĉo kaj ĉio, kio koncernas monon.

Honesta olda Charlie fine lasis sin konvinki, ke tio estas la ĝusta maniero rigardi la problemon. Ili enterigos Glogon sen grandaj aranĝoj.

Li miris, ĉu ili devas havi oficialan permeson por la enterigo. Rodney opiniis, ke la gnojmoj ne estas rekonitaj de la mondaj leĝaroj, kaj plej saĝe estos lasi lin kuŝi en sia korbo, kiu estis lia lito, kaj enterigi lin sub iu granda arbo. La arbaro kaj la arboj ja ĉiam estis lia granda amo.

Je la deka ili rakontis al Bobo, kio okazis, kaj li havis la saman opinion pri la enterigo. Rodney kaj Elizabeto estis la solaj veraj amikoj de lia avo, li diris, kaj ili certe scias, kion li mem volis.

Noktomeze ili portis la korbon el la hotelo, kaj enteriga procesio, konsintanta el tri aŭtoj, veturis en la kamparon. Unu el ili estis veturigita de Rodney, la aliaj de Guggins kaj Charlie. Ili haltis, kiam ili trovis ĉarman lokon en la montaro. La luno lumis malforte inter la arboj, estis silente kaj sole, kaj la aero estis plena de ĉiuj arbaraj odoroj, kiujn Glogo amis. Viro de la varieteo kunhavis fosilon, kaj ili trovis belan aĝan ulmon, kaj sub ĝi ili fosis profundan truon. Ili metis la korbon en ĝin kaj staris silentaj kun malkovritaj kapoj.

Neniu el ili sciis, kiu ritualo estas aplikebla ĉe gnomenterigo, kaj Bobo ankaŭ ne povis helpi ilin. Rodney tial limigis sin al paroladeto, en kiu li diris, ke ilia maljuna amiko estis arbarulo, ke li konstante sopiris reen al la arbaro, ke la arbaro nun tenos lin en sia sino. Kaj antaŭ ol ili reagis, Rodney staris tie kaj legis poemon:

*Sub la krono de l'arbo ripozas
membro de l'gnomaro.*

*La sango lia kun la tempo
fariĝos suko de l'arbaro.*

*La manoj liaj ŝanĝos sin
al filikoj kun folioj,
Kaj softe tremos
la arbaraj melodioj.*

*La tutan vivon ni
en la arbaroj vidis
Kun aĝa gnomo
nun reunuiĝis.*

*Lia kor' en ĉiu eta
birdo batas*

*Kaj lia saĝo en la aro
de l'floroj restatas.*

*Abela aro portas
lian amon harmonie.*

*Per sopiro li sukcesis
la perfidon neniigi*

*Kaj heroojn, la falintajn,
en arbaro restarigi.*

Per tio la enteriga ceremonio estis finita. Charley laŭdis Rodneyon por la bela poemo kaj Elizabeto havis la saman opinion — ŝi ĉiam admiris la poemojn de sia onklo. La viroj remetis la fosilon en la aŭton kaj estis pretaj hejmenveturi. Subite Elizabeto kriis:

”Kie estas Bobo?”

Bobo estis for! Ili lumigis la lumojn de la aŭto. Elizabeto prenis la poŝlampon kaj kuris tien kaj reen inter la arboj kaj vokis per forta voĉo. Sed Bobo ne videblis.

Ŝi kaptiĝis de paniko, sed subite ŝi aŭdis el arbustaro bone konatan voĉon flustri:

”Elizabetho, ps, ps!”

Ŝi fleksis la genuojn kaj flustris:

”Kio estas, Bobo?”

”Iru iomete for de la aliaj — rekte en la arbaron. Mi devas paroli kun vi.”

Ŝi faris, kiel li petis. Kiam ŝi estis ekster videblo de la aliaj, la eta scenaristo venis al ŝi kaj diris:

”Elizabetho, estas gnomoj en ĉi tiu arbaro.”

”Ho, Bobo. Ĉu vi vere kredas tion?”

”Mi povas flari ilin. Ili trovigas ĉie — devas esti granda aro da ili.”

”Ho, kie vi kredas, ke ili estas?”

Elizabetho estis tiel ekscitita, ke ŝi ne sciis, kion fari.

”Ili ne forlasas sian kaŝejon dum la granduloj restas ĉi tie.”

”Kion vi volas, ke mi faru?”

”Mi devas ricevi tempon por serĉi ilin. Vi devas ĉiuj veturi hejmen kaj lasi min ĉi tie.”

”Ĉu vi restos ĉi tie la tutan nokton?”

”La nokto estas la tempo de gnomoj. Ĉu vi povos reveni morgaŭ matene — kiel eble plej frue?”

”Kompreneble, Bobo, se tio estas, kion vi volas.”

”Diru al la aliaj, ke mi volas pasigi la nokton kun la animo de Glogo. Kiam vi estos sola kun Rodney, vi povos rakonti al li pri la gnomoj, sed la aliaj devas absolute nenion scii pri ili. Tiam ili venus ĉi tien por provi kapti la gnomojn kaj montri ilin en siaj prezentadoj.”

”Vi pravas, tion ili farus,” diris Elizabetho. Imagu, kiel ruz-

lerta Bobo estas, kaj kiel rapide li lernis taksi la konduton de la homoj!

”Ne lasu iun el la viroj de la merkata tendo sekvi vin morgaŭ matene,” aldonis Bobo. ”Nur vi kaj Rodney. Se venos aliaj, mi ne intencos montri min.”

”Do, bone,” ŝi diris. ”Atentu pri vi mem! Mi esperas, ke vi trovos kelkajn bonajn gnomojn.”

”Mi ne kredas, ke ekzistas malbonaj gnomoj,” diris Bobo. ”Ekzistas nur homoj, kiuj estas malbonaj.”

Elizabeto reiris al la aliaj, kiuj daŭrigis la serĉadon, kunigis ilin kaj diris:

”Mi ĵus parolis kun Bobo. Li kaŝas sin kaj volas pasigi la nokton en la arbaro kun la animo de Glogo.”

Charlie aspektis, kiel falinta de la nubetoj.

”Ĉu estas malbona artifiko?” li demandis.

”Mi ne scias,” Elizabeto diris. ”Mi scias nur, kion Bobo petis min komuniki. Li igis min promesi, ke mi revenos ĉi tien frue morgaŭ matene, kaj li diris, ke neniu krom Rodney kaj mi venu, kaj se iu alia kunestos, li ne montros sin.”

Ĉi tio estis malagrabra surprizo por honesta olda Charlie. Li furiozis, sed kion li povus fari pri la afero?

”Mi certigas, ke ĉi tio venis kiel plena surprizo por mi, sinjoro Willowby,” certigis Rodney. ”Devas esti unu el la kapricoj de Bobo. Ni ja scias, kia li estas — li devas havi, kion li volas.”

”Sed mi havas prezentadon ĉi tie, sinjoro Sinsabow, kaj la publiko krevigos la pordojn —”

”Eble, sed se li estas for dum mallonga tempo, mi ne kredas, ke tio kaŭzos damaĝon. Vi povas ja diri, ke okazis gno-

moŝtelo — pripensu nur, kian sensaciegon vi povas fari el tio! Vi scias — tiaj aferoj fakte okazas.”

Tio estis sufiĉe malica pikilo, kaj honesta olda Charlie ne estis pli stulta ol ke li komprenis ĝin.

”Kion vi intencas fari al tio ĉi?” li demandis.

”Mi certigas al vi refoje, ke mi ne havas la plej etan ideon pri la celo de Bobo, kaj mi kredas, ke mia nevino ne havas, aŭ kiel estas, Elizabeto?”

”Mi scias absolute nenion,” certigis Elizabeto kun granda seriozeco. ”Bobo flustris al mi, ke ni ĉiuj devas veturi hejmen, kaj ke Rodney kaj mi devas reveni morgaŭ matene, kaj ke ni ne rajtas kunhavi iun alian — se ni ne faros kiel li diris, li ne montros sin.”

”Tiel statas tiu afero,” diris Rodney. ”Bobo faros tute kiel li volas, kaj vi povas esti konvinkita, ke ni helpos lin laŭ nia povo.”

”Kaj kiel vi kredas, ke tio influos al mi, sinjoro Sinsabow?”

”Mi kredas, ke kion vi povas fari, estas atendi ĝis morgaŭ matene. Vi certe ne havas la plej etan ŝancon trovi Bobon ĉi tie en la arbaro — li kaj lia popolo tenis sin kaŝitaj en la arbaro dum miloj, eble milionoj da jaroj. Li agos tute kiel li mem decidis.”

Ne estis multo plia por diri pri la afero — sed tio ne malhelpis, ke Charlie remaĉadis ĉion, fojon post fojo, ĝis li fine lasis sin persvadi, ke li ne havas iun ajn utilon de la remaĉado. Li kaj liaj viroj eniris sian aŭton — kaj atendis ĝis Smith kaj Guggins eniris sian, kaj Rodney kaj Elizabeto sian aŭton. La diversaj grupoj estis suspektemaj unu al la aliaj. Ĉiuj volis certiĝi, ke neniu restas kaj serĉos Bobon kaj forportos lin.

Tuj kiam Elizabeto havis okazon paroli kun sia onklo sen

aliaj aŭskultantoj, ŝi malkaŝis la streĉan novaĵon, ke Bobo trovis spurojn de novaj gnomoj. Tiam Rodney fine komprenis, kiel ĉio pendas kune. Kompreneble li estis kontenta, estis ja la origina intenco kun ilia veturo. Li diris, ke estas feliĉe, ke ili retenis la du detektivojn ĉe si, oni eble bezonos ilian servon la venontan matenon.

”Ni ne elmetu nin al kromaj gnomŝtelistoj,” li diris.

Dekkvina ĉapitro *En kiu Bobo renkontas Sissin*

Elizabeto opiniis, ke estas tiel streĉe, ke ŝi apenaŭ povis dormi dum la tuta nokto. Kiam la pordisto telefonis por veki ŝin la sekvantan matenon je la kvina, ŝi kure saltis el la lito, kaj se ŝi ne estus memorinta la solenajn promesojn, kiujn ŝi donis al sia patrino, ŝi eĉ ne estus uzinta tempon por brosi la dentojn. Rodney kaj ŝi eĉ trasaltis la matenmanĝon kaj kuregis rekte en la vestiblon, kie la fidelaj Smith kaj Guggins staris atendante. La du aŭtoj forrulis el Johnston, Pensilvanio, longe antaŭ ol la suno leviĝis super la montaj pintoj, jes, longe antaŭ ol venis taglumo en la valojn.

Ili venis al la tombo de Glogo, kaj tie Rodney starigis la du detektivojn por kontroli la vojon kaj instrukciis ilin, ke se Willowby aŭ iu el liaj viroj aperos, Rodney tuj ricevu raporton. Poste li kaj Elizabeto iris en la arbaron kaj iris kiel eble plej proksimen al tiu loko, kie Bobo estis parolinta kun Elizabeto. Ili vokis lin, kaj ne daŭris longe antaŭ ol ili aŭdis lin respondi. Ili trovis lin kaŝita en arbustaro kun bela sovaĝa laŭro, arbusto, kiu estas tre kutima en tiuj montregionoj.

”Mi renkontis gnomojn!” estis la unuaj vortoj de la eta favorito.

”Ho Bobo! Ĉu vere?”

”Jes vere, ĉi tie estas miloj da gnomoj!”

”Kiel ĉarme!” ekkriis Elizabeto. ”Mi esperas, ke estas afablaj gnomoj.”

”La plej bonaj, kiujn oni povus deziri. Ili havas la plej mirindan civilizon.”

”Ho, do estas civilizitaj gnomoj?”

”Ili loĝas en urbo minimume same bela kiel Johnston.”

Nun kaj Rodney kaj Elizabeto opiniis, ke Johnston estas fuma urbo, sed ili ne volis ofendi la sentojn de Bobo.

”Tio sonas ja ege streĉa, Bobo!” kriis la knabino. ”Ĉu vi jam vidis ilian urbon?”

”Ili montris al mi ĉion!”

”Ĉu ni ankaŭ povas vidi ĝin, Bobo?”

”Mi tre bedaŭras, Elizabeto, sed vi komprenas, ĉi tiuj gnomoj neniam montris sin al granduloj — tio estas leĝo ĉe ili jam de la pratempo. Mi timas, ke mi ne povos persvadi ilin dividi siajn sekretojn kun la granduloj. Vere, ili eĉ ne volis lasi min iri ĉi tien pro timo, ke mi povus perfidi ilin.”

”Ho Bobo, kiel terure! Mi ne scias, kion mi farus, se vi ne estus reveninta.”

”Nu, jes, fine mi tamen sukcesis persvadi sinjoron Margon — li estas la granda kapitalisto, kiu posedas iliajn ŝtaluzinojn.”

”Milda ĉielo!” elkriis Rodney. ”Ĉu vi diras, ke ili konas ŝtalon?”

”Ili ja vivas en ĉi tiuj montoj, kiuj enhavas feran ercon kaj karbon,” diris Bobo. ”Do, kial ili ne faru ŝtalon?”

”Tio estas sufiĉe komplikita operacio,” respondis Rodney. ”Tre interesus min lerni, kiel tio okazas.”

”Sidigu vin, kaj mi rakontos,” diris Bobo.

Estis malsekete en la arbaro tiel frue en la mateno, sed la zorgema Rodney kunprenis la plejdon, kaj li ankaŭ ne forgesis la korbbon de Bobo kun termoso. Ili sternis la plejdon kaj eksidis. Bobo diris, ke li preferas sidi en la laŭro, povas ja oka-

zi, ke honesta olda Charlie neantendite aperos kaj enmiksiĝos en la interparolon.

Poste ilia amiketo rakontis la tutan streĉan historion pri sia nokta aventuro. Per helpo de sia flaro li trovis la fendon en la monto, kiun la gnomoj uzas por veni internen aŭ eksteren, kaj kiam li englitis, li trovis tutan serion da grotoj, kiuj enhavas la urbon Gnomoburgo, kun karbominejoj kaj ŝtaluzinoj kaj fabrikoj. Kompreneble lia apero vekis grandan tumulton. La policĉefo estis vokita kaj li eskortigis Bobon al la urbestro, kiu siavice sciigis al sinjoro Margo, la granda bankdirektoro kaj kapitalisto en la regno de gnomoj. Bobo pasigis la ĉefan parton de la nokto parolante kun tiuj sinjoroj kaj krome alia kun longa blanka barbo, kiu mirige similis al aĝa Glogo, kaj kiu ankaŭ montriĝis esti episkopo de la gnoma eklezio en la eparkio Pensilvanio.

”Ĉu ili estis ĝentilaj al vi?” demandis Elizabeto malkviete.

”Jes, tre ĝentilaj,” respondis Bobo. ”Ili opiniis, ke estas tre interese renkonti gnomon el Kalifornio.”

”Ho jes, ili do aŭdis pri Kalifornio?” demandis Rodney

”Kiu ne aŭdis pri Kalifornio? Montriĝis, ke iliaj prapatroj venis el la sekvojaj arbaroj antaŭ pluraj miloj da jaroj. Ili havas skribajn pruvojn pri tiu afero kaj bildojn de la gigantaj arboj.”

”Tiel interese,” Elizabeto diris. ”Sed mi ne povas akcepti, ke ni neniam povos rigardi ilian urbon.”

”Mi ne kredas, ke vi havus multan ĝojon de tio, Elizabeto. Vi komprenu, en multaj lokoj estas malalte ĝis plafono en tiuj grotoj — ili estas tre taŭgaj por gnomoj, sed vi havus viajn vestojn detruitaj, kaj vi eĉ povus fiksiĝi iuloke, kaj poste oni devus elfosi vin. Kaj krome, la etoso tie por la momento ne

estas tre agrabla. Ili nome havas malfacilan krizon, la senlaboreco estas granda, kaj multaj gnomoj havas malfacilaĵojn.”

”Ĉu vere! Ili havas ekonomie bonajn kaj malbonajn periodojn ankaŭ en Gnomoburgo!” eldiris Rodney. ”Sufiĉe surpriza!”

”Mi certigas, ke ili en ĉiuj rilatoj sekvis sian tempon,” klarigis Bobo kun granda seriozeco. ”Vere dirite ili havas plurajn eltrovaĵojn, pri kiuj la homoj ankoraŭ nur havas palan antaŭsenton. Ili ne plu devas iri en la arbaron por kolekti filikajn semojn. Ili fabrikas ion, kion ili nomas sintezaj nutraĵoj — ĉu vi konas tiun vorton?”

”Jes certe,” diris Rodney, ”Niaj sciencistoj ankaŭ laboras per tiu problemo.”

”Nu bone, ili fabrikas siajn nutraĵojn el ŝtonkarbo kaj gudro, kaj ili estas fakte tre bongustaj. La gnomoj de tiu raso ĝuas la plej bonan sanon.”

”Krom tiuj, kiuj estas malsanaj, kompreneble?” miris Rodney.

”Kompreneble,” respondis Bobo. ”Tiujn ni ne kalkulas.”

Ekestis paŭzo. Poste Elizabeto volis scii, ĉu tie ankaŭ estas gnominoj.

”Kompreneble,” respondis Bobo denove, kaj ĝuste tion li opiniis plej ĉarma el ĉio.

”La afero estas, Elizabeto, ke mi neniam konis aliajn gnomojn krom Glogo. Mia patrino mortis, kiam mi estis suĉinfano, kaj la aliaj malaperis unu post la alia antaŭ ol mi estis tiom aĝa, ke mi povus ricevi iun impreson de ili. Kiam Glogo kaj vi kaj Rodney babilis pri gnominoj, tio fakte ne multon signifis por mi. Sed nun — ho, estis surpriza sperto!”

”Do, vi vere renkontis gnomknabinon?”

”Mi renkontis la plej ĉarman etulinon — ŝi fakte tre similas al vi, Elizabeto — nur ĉirkaŭ sepdekjara, kaj ŝi havas orbrunan hararon kaj dolĉajn afablajn bluajn okulojn, kaj ŝi havas robon el klarblua sinteza materialo, kiun oni faras el ŝtonkarba gudro, same kiel la nutraĵoj.

”Kiu ŝi estas, Bobo?”

”Ŝi estas la sola filino de sinjoro Margo, kaj ŝi loĝas en bela palaco kaj ĉirkaŭveturas en plej ĉarma eta sportaŭto.”

”Ĉu ŝi estas bona al vi?”

”Kara Elizabeto, eble ne estas tute korekte, ke mi rakontu pri tio, sed ...”

”Pri tio vi ne pensu,” admonis Rodney. ”Ni estas malnovaj geamikoj, kaj ni devas scii, kia estos via vivo.”

”En tiu okazo — estas tiamaniere: Mi venas el Kalifornio kaj mi rondveturis en tuta Usono kaj akiris multajn sciojn, kaj mi prezentigis en cirko kaj aperis en gazetoj kaj ĉio tio — kaj tio kaŭzis, ke ili iamaniere pritraktas min kiel heroo, aŭ kiel vi eble dirus, kiel romantika figuro. Kaj tial mi kredas, ke mi povas diri, ke Sissi Margo ...”

”Ĉu tiel ŝi nomiĝas, Bobo?”

”Ĉu vi ne opinias, ke estas bela nomo por filino de industria magnato kaj kapitalisto? Nu bone, tio kio okazis estas, ke sinjoro Margo petis min reveni kaj edziĝi kun lia filino.”

”Ho, tio venis sufiĉe subite.”

”Estas ekzakte, kion mi diris. Sed la afero estas, ke ili estas tre malkvietaj, ke mi perfidos ilin, ke la granduloj venos kaj kaptos ilin ĉiujn kaj devigos ilin fari prezentadojn en cirkoj. Sed ili ankaŭ timis perforte reteni min, ili ja komprenas, ke vi tiuokaze komencos serĉi min. Kiam ili fine decidis fidi al mi, sinjoro Margo prenis min flanken kaj diris, ke li volas fari min

sian filon kaj instrui al mi ŝtalm manipulado, kaj ke mi heredos liajn entreprenojn kaj ke mi eble povos helpi lin solvi la problemon pri — kiel vi nomas tion, Rodney?”

”Ekonomiaj supren- kaj malsuprenperiodoj.”

”Do, ĉu vi akceptis lian proponon?” demandis Elizabeto.

”Jes, kion alian mi povus fari?”

”Kompreneble, Bobo — estas ja ĝuste tio, kion ni ĉiuj esperis. Sed ni kredis, kompreneble, ke vi trovos arbargnomojn kaj ke vi volos daŭrigi vian liberaeran vivon.”

”Jes, tion mi komprenas. Sed la tempoj ŝanĝiĝas, kaj mi devas adaptiĝi al ili.”

”Mi kredas, ke vi faris tre prudentan decidon, Bobo,” diris Rodney, ”kaj mi esperas, ke vi kaj Sissi vivos feliĉaj dum ĉiuj viaj tagoj.”

”Sed diru, Bobo, ĉu mi neniam povos vidi ŝin?” demandis Elizabeto.

”Ne estas facile aranĝebla,” respondis Bobo serioze. ”Kiel vi komprenas, Margo kaj lia filino estas gnomoj de certa signifo, kaj same kiel ĉe vi homoj, ili devas atenti pri gnomŝtelistoj. Sed kiam ili konos min pli bone, ili eble fidus pli bone al mia prijuĝo koncerne miaj amikoj.”

”Kiel ni renkontiĝu?” demandis Elizabeto.

”Mi pensis pri la afero. Ĉu vi ne volus veturi al Johnston — lasu min diri — post unu jaro ek de hodiaŭ ...”

”Pri tio vi povas fidi, Bobo,” respondis Rodney kaj Elizabeto unuvoĉe.

”Tiaokaze ni povas ja diri, ke ni renkontiĝu ĉe la tombo de Glogo ekzakte unu jaron post la entombigo. Mi estos tie, kaj eble mi povos persvadi mian edzinon kaj ŝian patron kunveni.”

”Do, bone,” diris Rodney. ”Estas interkonsentite.”

Kaj post eta paŭzo li aldonis:

”Kaj nun mi kredas, ke vi urĝas reiri al via fianĉino.”

”Dankon por via penso!” diris Bobo. ”Estas tre bone pensite de vi. Mi povas rakonti al vi, ke ili estas tre maltrankvilaj kaj timas, ke mi pentos min kaj rompos mian promeson.”

”Adiaŭ, malnova amiko!” diris Rodney kaj etendis fingron, kiun Bobo skuis.

La du viroj similis unu la alian, kiam temis pri sinrego, kaj ili ne montris siajn sentojn. Sed Elizabeto ekploris, kvankam ŝi tuj provis klarigi, ke tio parte dependas de tio, ke ŝi tiel ĝojas pri la feliĉo de Bobo. Ŝi devis klini sin, kaj la eta gnomo elkuris el la laŭra arbustaĵo kaj brakumis ŝin — liaj brakoj memkompreneble ne atingis ĉirkaŭ ŝia kolo, sed li faris sian plejblon kaj kisis ŝian frunton kaj skuis unu fingron post la alia — estis kortuŝa sceno, kiam ili adiaŭis unu la alian sur la montdeklivo super la Conemaugh-rivero. La lasta vidaĵo, kiam ili reiris al la aŭto, estis eta silka naztuko, kiu svingiĝis en la arbustaro kun la helruĝaj laŭrofloroj.

Poste Rodney reveturis al la urbo kaj pagis al Smith kaj Guggins, kion li ŝuldis kaj dankis ilin por la helpo. Post tio ili devis sciigi al honesta olda Charlie la korŝiran novaĵon, ke la plej eta el ĉiuj vivantaj homaj estaĵoj ne plu estas je dispono por prezentadoj. Kaj li ne rakontis, pri kio Bobo nun okupos sin. Ili informis nur, ke li decidis ne plu reveni al la cirko. Kompreneble Willowby kredis, ke Rodney kaj Elizabeto ŝtelis lian trezoron, sed estis nenio, kion li povis fari pri la afero, kaj minacojn li ankaŭ ne povis apliki.

Rodney telefonis al patrino kaj rakontis, ke ili nun survojas

hejmen, kaj poste ili ekveturis, ĉifoje laŭ la norda vojo, kiu estis pli malvarmeta.

Ĝi kondukis ilin refoje al Minesoto. Kaj ĉiufoje, kiam Elizabeto vidis la bovinojn de Bobo paŝtiĝi ĉe la vojrandoj, ŝi rimarkis, ke ŝi sentas sin sola. En la malantaŭa sidloko ili havis la korbon de Bobo kun ĉiuj liaj posedaĵoj. Elizabeto decidis konservi ilin kiel memoro de la veturo per la gnomaŭto — kiu kompreneble ne plu estis gnomaŭto sed tute ordinara aŭto. Same estis kun ĉio — paliĝis la brilo de la montoj kaj lagoj kaj arbaroj, de benzinpumiloj kaj piknikoj kaj preterveturantoj kaj kio okazis sur la ŝoseoj — kiam ne troviĝis kelkaj etaj estaĵoj en la malantaŭa sidloko, kiuj kuris de unu flanko de la aŭto al la alia kaj faris demandojn.

Sama etoso regis en ilia hejma ŝtato Vaŝintono — regiono kie preskaŭ ĉiam pluvas — kaj en la altaj Cascadomontoj, kiuj estas kovritaj de senlimaj arbaroj. La ŝtata vojo pasis alte situantan pinton, de kiu oni havas elrigardon super altegaj montoj, ĉeno post ĉeno, kaj kun arboj tiel dikaj, ke ili similas lanugon de veluro. Ili eliris la aŭton por admiri tiun pejzaĝon, kaj Elizabeto ekkriis:

”Ho Rodney, kiel ĉarmigita Glogo estus vidi ĉi tion!”

Kaj poste ŝi aldonis solene:

”Kiam mi estos plenkreska, mi dediĉos mian tempon por savi la arbarojn kaj zorgi, ke ili ĉiuj denove estos plenaj de ĉarmaj etaj gnomoj!”

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-115-1